

# evangeliaj kajeroj

**KOMUNIKADO**



**4**  
1988

## EVANGELIAJ KAJEROJ

*Internacia revuo en Esperanto*

*listo de la planataj sekvantaj numeroj*

- 5 LA REGNO DE DIO, ĉia veno, kiam ? kiel ?
- 6 ARKEOLOGIO, radikoj de la historio
- 7 LA SANKTA SPIRITO, donaco de Dio
- 8 LA PEZA EKLEZIA HISTORIO, la ŝarĝo de la tempoj
- 9 APOKALIPSO, kiel kompreni ?

Ni daŭre serĉas kunlaborantojn. Se vi deziras kunlabori, vi povas peti instrukciojn. La *artikoloj* estas petataj, sed vi povas libere sendi mallongajn *kontribuojn, recenzojn, noticojn*, kiuj iel rilatus al la temo.

La aŭtoroj respondecas pri la propra artikolo.

Redakcio, administracio : Philippe Cousson, Le Hameau des Plaids, Nouaillé-Maupertuis, 86340 La Villedieu du Clain, Francujo ; tel. 49 46 80 21, el eksterlande 33 + 49 46 80 21.

*Directeur de la publication : M. Philippe Cousson.*  
*Dépôt Légal : novembre 1988.*  
*Editeur : Philippe Cousson, Nouaillé-Maupertuis.*  
*Imprimé par : Eta Brun, Poitiers (12 rue des Frères Lumière, Beaulieu, BP 352, 86006 Poitiers Cedex).*

Paradokso de nia epoko estas, ke ju pli la rimedoj por komuniki disvolviĝas, des malpli la homoj efike sukcesas komuniki.

Oni dungas homojn por zorgi pri la komunikado en entreprenoj. La grandaj firmaoj volas fari al si bildon. Politikistoj ne plu reklamas pri la programo, pri la ideoj, sed pri la bildo, pri la maniero, kiel oni vidu ilin. Sed, la plej efika rimedo restas la inter-kvar-okula komunikado, kaj eĉ, malsamaj antaŭaj pensoj povas konduki al miskomprenoj.

Kaj meze de ĉio ĉi tio, kristanoj provas atesti pri sia fido, pri la vivo, kiun ili ricevis, pri tiu homo, same homo kaj Dio, kiu estras ilian vivon, kiu estas ilia vivo. Ili uzas, kelkfoje la modernajn rimedojn, kaj/aŭ la amikecajn konversaciojn, sed finfine, tio restas afero inter Jesuo Kristo kaj la homo, inter la Sankta Spirito kaj la homa spirito. Neniu kristano fanfaronu pri la efikeco de sia metodo evangelizi, komuniki la Evangelion. Li nur laŭdu Dion, kiam homo venas, aŭ revenas, al la fido.

Kion ajn komuniki, se ne la veron ? Kiel ? Certe ne per ŝajno !

P.C.

## ALVOKO POR KUNLABORADO

\*\*\*\*\*

La temo de la 6-a numero de EVANGELIAJ KAJEROJ, aperonta teorie oktobre 1989, estos :  
"ARKEOLOGIO, radikoj de la historio".

Mia peto estas, ke vi proponu al mi artikol-temon pri kiu vi verkas, aŭ nomon kaj adreson de eventuala aŭtoro. Kontaktu min sufiĉe rapide. Vi poste ricevos la liston de la petataj artikoloj, kaj mi atendos ilin por junio/julio.

Por doni ideojn pri la pritrakteblaj temoj, kaj ankaŭ pri kontaktotaj eventualaj aŭtoroj, jen kelkaj proponoj de artikol-temoj, listo tute ne kompleta :

- Arkeologio, historio sen tekstoj,
- Kion serĉas arkeologo ?
- Interpreti ŝtonojn kaj cindrojn
- Kiel koni la antikvajn religiojn ?
- Spuroj de la bibliaj rakontoj
- La Biblio : historia dokumento
- Historieco de la Biblio
- Filozofio de historio
- Vero en historio
- Antaŭjuĝoj en historio

## LA BIBLIO - SKRIBA KOMUNIKAĴO DE DIO

"Jam de frua infaneco vi konas la Sanktajn Skribojn, kiuj povas fari vin saĝa por savo per la fido." (2 Tim 3:15)

Tiel skribis la apostolo Paŭlo al pli juna viro, kies avino Lois, kaj patrino Eŭnike estis fidplenaj judinoj (1:5). La Sanktaj Skriboj, kiujn Timoteo lernis de ili, estis kompreneble tio, kion ni nomas la Malnova Testamento. Paŭlo nomis ĝin "la orakoloj de Dio" (Rom 3:2).

Nia Sinjoro Jesuo Kristo diris al la sadukeoj,

"Vi eraras, ne sciante la Skribojn, nek la potencon de Dio." (Mat 22:29)

Al aliaj li diris,

"Vi esploras la Skribojn, ĉar vi opinias, ke en ili vi havas eternan vivon ; kaj ili estas tio, kio atestas pri mi." (Joh 5:39)

En ĉi tiu kvara evangelio, dek unu foje ni trovas la vorton "Skribo". Plejofte oni povas trovi la parton de la Skriboj, kiun Johano citas. "La disĉiploj kredis la Skribon" (2:22). "La Skribo diris" (7:38 kaj 7:42). "La Skribo ne povas esti nuligita" (10:35). "Por ke plenumiĝu la Skribo" (13:18 ; 17:12 ; 19:24 ; 19:28 ; 19:36). "Kaj ankoraŭ alia Skribo diras" (19:37). "Ili ankoraŭ ne komprenis la Skribon" (20:9).

Kelkfoje en la Malnova Testamento oni legas, "Aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante" (Jef 3:16 ; 6:1 ; 7:1 ; 11:14 ; 12:1,17,21,26 ; 13:1 ; 14:2,12 ; 15:1 ; 16:1 ; 17:1 ; 18:1 ; ktp.). La judoj hezitis ĝis 90 p.K. agnoski la sanktecon de la profeta libro de Jeŝekel, sed finfine ili rekonis ke vere Dio komunikis al li Sian mesaĝon, kaj per li al Sia popolo.

Ofte unu frazo de la Skriboj venas al ni kiel vorto de Dio. Se iu ideo venas al ni, kiu por ni estas nova, estas saĝe kompari ĝin kun vortoj, kiujn ni scias el la Sanktaj Skriboj, por konfirmi, ke la nova vorto estas vere de Dio (1 Joh 4:1). Oni parolas pri la kanono de la Skriboj en tiu senco, ke oni komparas aliajn ideojn kun tiuj, kiujn ni nepre akceptas.

Ni devas konsideri la kuntekston, por decidi al kiu la originalaj vortoj estis dirataj, kaj se ili validas ankaŭ por ni. Teksto sen kunteksto povas esti preteksto ! Ni devas nek tordi la Skribaĵojn, al nia propra pereco ( 2 Pet 3:16), nek falsi la Vorton de Dio por erarigi aliajn (2 Kor 4:2).

Por klarigi niajn ideojn, aŭ prefere por klarigi tion, kion Dio volas diri al ni, ni ofte devas kompari unu diron kun alia (vidu en 1 Kor 2:13). Se ni bone konas la Biblion, ni povas esti kiel dom-mastro, kiu elportas el sia trezorejo objektojn novajn kaj malnovajn (Mat 13:52), kaj preĝo iĝas dudirekta afero. Ni ja alparolas Dion, sed kiam ni uzas la Biblion, aŭ meditas pri ĝia enhavo, Dio per ĝi povas alparoli nin.

Islamanoj kredas ke Dio eterne havis kun Si en la ĉielo librojn, kiujn la anĝelo Gabriel malkaŝis unu al Adam, unu al Ĥanof, unu al Noa, unu al Abraham, unu al Moseo, unu al David, ktp. Kristanoj ne devas pensi tiel. "Homoj, movataj de la Sankta Spirito, parolis laŭ Dio" (2 Pet 1:21), ili parolis en la nomo de Dio (Dan 8:6), sed ili "esploris kaj serĉis" (1 Pet 1:10). Ili reagis al la respondoj de siaj aŭskultantoj (Jes 7:11-14), aŭ inkluzivis aludojn al bonekonataj eventoj (Amos 1:3-2:8). Kelkaj mem skribis aŭ diktis la mesaĝon (Jer 29:1 ; 36:4). Pliofte la profetoj eldiris la mesaĝon, kaj iliaj aŭskultintoj skribis ĝin (Jes 8:16).

La libroj, kiujn ni havas en la Malnova Testamento, ofte enhavas pruvetojn, ke nekonataj redaktoroj kunmetis la librojn, aŭ aldonis kelkajn rimarkojn post la morto de la persono, pri kiu la libro temas. Ekzemple, Moseo mem ne skribis Read 34:5-12, kaj Josuo ne skribis pri sia morto (Jos 24:29-31). Neniu el la juĝistoj skribis Juĝ 21:25, kaj Samuel certe skribis nenion post 1 Sam 25:1 ! Ŝajne la lasta redaktado de ĉiuj tiuj libroj, kaj de la du libroj de Reĝoj, okazis proksimume en la jaro 500 a.K. La kompletigo de tiu historio devas esti post la lasta evento (2 Reĝ 25:27), kiu okazis en 561, kaj tiuj libroj ne mencias la proklamon, kiun Ciro ordonis en 539 (vidu kontraste Ezra 1:1-4 aŭ 2 Kro 36:22-23 ; tiuj du libroj kompletigis multe da jaroj post la alveno de Ciro).

"Dio multafoje kaj multamaniere parolis en la profetoj" (Heb 1:1).

"Li sciigis Siajn vojojn al Moseo, Siajn farojn al la Izraelidoj" (Psa 103:7).

Li instruis ankaŭ per vortoj de saĝuloj (Sen 22:17). En la Biblio ni trovas ĉiun specon de literaturo. Prozo kaj poezio, faktoj kaj fabeloj, historio kaj eldiraĵo.

"Ĉio estas utila por nia instruo" (2 Tim 3:16).

Ofte ni ne komprenas la plenan signifon de tio, kion ni legas. La profetoj mem kelkfoje ne tute komprenis tion, pri kio ili parolis (1 Pet 1:11). Ofte en la Psalmoj, ni trovas vortojn pri reĝo (45:1 ; 72:1), aŭ pri la Sanktoleito de la Eternulo (2:2 ; 84:9). Ŝajne la psalmisto pensis pri reĝo, kiun li konis, sed ni

povas diri, ke la vortoj estas eĉ pli veraj pri la filo de David, kiu mortis por ni sur la kruco.

Antaŭnelonge Hugh Schonfield mortis en Anglujo. Li estis judo, kiu eldonis sian propran tradukon de la Nova Testamento en la anglan. Li verkis ankaŭ libron kun la titolo *The Passover Plot* (La paska komploto). Mi ne konsentas pri kelkaj el liaj teorioj, sed eble li prave emfazis la frazon, kiu troviĝas ofte en la kvar evangelioj : "Tio okazis, por ke plenumiĝu la Skribo." Jesuo admonis la sanigitojn, ke ili ne konatigu lin (Mat 12:16) ; Li parolis per paraboloj (13:34) ; Li sendis du disĉiplojn por alkonduki azenidon (21:2) ; Li diris al Petro : "Remetu vian glavon" (26:54) ; Li estis arestita (26:56) ; Ĉiam "por ke plenumiĝu la Skriboj". Li bone sciis tion, kion la Skriboj diris, kaj lia respondo estis :

"Jen mi venis (En la rulaĵo de la libro estas skribite pri mi), por plenumi Vian volon, ho Dio !" (Heb 10:7).

Al tiuj, kiuj iris al Emaus, li diris :

"Kristo devis suferi ĉion tion, kaj eniri en sian gloron" (Lk 24:26).

Kiam Jesuo estis tentata li respondis :

"Estas skribite : Ne per la pano sole vivas homo, sed per ĉiu vorto, kiu eliras el la buŝo de Dio."

"Estas skribite : Ne provu la Eternulon, vian Dion."

"Estas skribite : Al la Eternulo, via Dio, vi adorkliniĝu, kaj al Li sola vi servu."

La tri respondojn oni trovas en Readmono (8:3 ; 6:16 ; 6:13), kaj oni povas facile konjekti, ke Jesuo antaŭnelonge parkerigis ilin, kiel Dia vorto por li. Ĉu simile, dum la semajno antaŭ la krucumigo Jesuo parkerigis versiklojn el la profetaĵo de Zefarja (9:9 ; 11:12 ; 12:10 ; 13:7) ?

La Nova Testamento citas el 21 de la 24 libroj de la hebrea Malnova Testamento. En la Esperanto-Biblio la sama enhavo aperas en 39 libroj, aranĝitaj iomete malsame. La apokrifaj (dukanonaj) libroj, kiuj inkluziviĝas nur en grekaj aŭ latinaj biblioj, ne citiĝis en la Nova Testamento. Multaj trovas en ili ekzemplojn de bona konduto, sed prave hezitas bazi sur ili iun ajn doktrinon.

Estas klare ke Jesuo Kristo alte taksis la Malnovan Testamenton, sed ĉu li diris ion pri la parto de nia Biblio, kiu ankoraŭ ne skribiĝis ? Se temas pri la evangelioj, li diris :

"La Sankta Spirito, kiun la Patro sendos en mia nomo, instruos vin pri ĉio, kaj vin rememorigos pri ĉio, kion mi diris al vi". (Joh 14:26)



Se temas pri la Agoj de la Apostoloj, li diris :

"Kiam venos la Parakleto, kiun mi sendos de la Patro al vi, la Spirito de la vero, kiu devenas de la Patro, tiu pri mi atestos ; kaj vi ankaŭ atestas." (15:26)

Se temas pri la epistoloj aŭ la Apokalipso, li diris :

"Kiam venos li, la Spirito de la vero, li gvidos vin en ĉian veron ; ĉar li ne parolos de si mem ; sed kion ajn li aŭdos, tion li parolos ; kaj li anoncos al vi venontajn aferojn." (16:13)

En la lasta ĉapitro de Apokalipso, oni trovas aserton, ke neniu aldonu al la vortoj de ĉi tiu libro (22:18). Sendube la unua signifo estis ke neniu aldonu al Apokalipso, sed tiuj vortoj nun troviĝas sur la lasta paĝo de nia Biblio, kaj estas saĝe ke ni akceptu la Bibliion tiel, kiel ĝi estas. En la dua jarcento nekonataj homoj provis verkii novajn librojn, kiel ekzemple la *Evangelion laŭ Petro*. Oni povas facile vidi ke la kvalito de tiaj libroj ne estas egala al la akceptitaj libroj. Dum postaj jarcentoj multe da kristanoj verkis utilajn librojn, sed neniu libro havas la saman aŭtoritaton, kiun posedas la Sankta Biblio.

Kiam la reĝino Elizabeth (Elizabeta) kroniĝis en London en 1953, oni prezentis al ŝi bibliion dirante : "Jen la plej valora libro, kiun ofertas ĉi tiu mondo." Multaj elkore konsentis, ĉar ili mem spertas, ke per ĝi Dio komunikas hodiaŭ Sian volon.

David Featherstone, Britujo

David FEATHERSTONE (*dajvid feĉestoun*), reĝa stipendiulo de Westminster School, London, licenciulo pri teologio en la universitato de Oxford (*oksf*, Oksfordo), kolegia kaj universitata lekciisto, nun emerita, laboris en Hindujo kiel Bibli-societa sekretario dum kvin jaroj, kaj poste instruis en Anglujo. Li estas prebitero en sia evangelika eklezio en suda London.

MI JAM ESTAS PLI OL 80-JARA, sed mi estas juna kaj malfermita al ĉiuj nuntempaj problemoj. Mi estas la plej malnova Esperanto-revuo daŭre aperanta.

IKUE, Via Berni  
9, I-00185 Roma RM (Italia).

Jarabono: 25  
svisaj fr. aŭ egalvaloro; nepagipovaj skribu por interkonsento.

**espero**  
**katolika**

## JESUO - LA MODELA KOMUNIKANTO

Ke Jesuo Kristo venis ne nur por vivi sed ankaŭ por komuniki la veron al ni estas klare surbaze de unu el liaj kromnomoj : la Vorto (HO LOGOS en la greka). Tiel la Sankta Skribo anoncas :

"Kaj la Vorto fariĝis karno kaj loĝis inter ni, kaj ni vidis lian gloron, gloron kvazaŭ de la solenaskita de la Patro, plena de graco kaj vero." (Joh 1:14)

La Savanto estis homo kun mesaĝo. Estas homoj, kiel monaĥoj, kiuj rilatas principe kun Dio. Sed Jesuo komunikas same al Dio (per preĝo) kaj al homo. Kiel li komunikis al la homo ? En lia tempo ne estis amas-komunikiloj, kiel televido, gazetaro aŭ radio. Kaj li ne dungis heroldojn aŭ skribistojn por disvastigi sian mesaĝon. Ne, li mem proklamis sian mesaĝon per sia propra buŝo. Estas vere, ke li foje sendis siajn disĉiplojn por proklami la mesaĝon, sed esceptokaze. En tio manifestiĝas la humileco de la Filo de Dio, kiu disponas ĉiujn armeojn de la sanktaj anĝeloj. Ili povus facile anonci la tutan mesaĝon al la homaro. Kaj la Diablo fakte tiel tentis lin, ĉar tiu diris al li :

"(La mondon) mi donos al vi, se vi faligos vin kaj ador-kliniĝos al mi" (Mat 4:9).

Sed kiam li estis sur la Tero, tio ne okazis, ĉar Jesuo tiam venis ne por monro de monda aŭ ĉiela potenco. Vane la Diablo tentis lin, ke li uzu sian potencon.

La vorto komuniki kaj siaj derivaĵoj estas gravaj vortoj hodiaŭ. Nia generacio preferas parolojn al silento, kaj okazadas ĉirkaŭ la mondo senfinaj intertraktadoj. Gravus pli ofte por ni kvanto (da vortoj) ol kvalito. Sed por niaj prauloj estis kvalito pli grava. Al ni pli grava estas la perilo (komunikilo) ol la enhavo. Ni ŝatas, kiam mesaĝo estas bone pakita kaj volvita en brilaj afektoj. Ĉu la mesaĝo estas vero aŭ ne, tio preteras nian menson. Mi ne volus kondamni niajn tre efikajn modernajn rimedojn de komunikado. Ili vere utilas. Sed ilia alesto kaŭzas, ke ni ofte pli atentis ilin ol la mesaĝojn, kiujn ili enhavas.

Vi ne trovos la vorton komuniki en la Biblio, kvankam mi ne havas Esperantan biblian konkordancon kaj ne povas do certigi tion. Sed la ideo komuniki nepre subkuŝas sub la multaj bibliaj vortoj, kiel kompreni, mesaĝo, parabolo, famo, disvastiĝi, novaĵo, klara, senco, instrui. Komuniki signifas havigi al iu informojn. Ĝi baziĝas sur la latina vorto COMMUNIS (komuna). La interrilato estas klara : igi ion (antaŭe nekonata) komuna.

Kiel dirite supre, estas granda intereso nuntempe pri la rimedoj de komunikado, sed oni ne atentis la mesaĝojn. La komunikiloj de la antikva socio estis kutime mesaĝistoj (heroldoj) kaj oratoroj. Pasis multaj tagoj por mesaĝo disvastiĝi. Sed tiuj komunikaĵoj povis esti efikaj. En Readmono 13 estis instrukcioj al la Izraelidoj ekstermi iun ajn samlandanon, kiu turnis sin al idoloj. Kaj la rezulto :

"Kaj la tuta Izrael tion aŭdos kaj ektimos, kaj oni ne plu faros tiun malbonan agon inter vi." (v. 11, emfazo mia)

Se la tuta Izrael povis aŭdi, tiam la komunikado (kvankam malrapida) estis ja efika. En la tempo de Jesuo estas la socio multe pli proksime kunplektita ol la moderna individuisma socio, do grava novaĵo disvastigita buŝe atingis preskaŭ la tutan popolon. Pro tio, ne estas miro post la releviĝo de Jesuo, kiam li iradis kvazaŭ inkognite kun du el siaj disĉiploj, ke unu el la du diris :

"Ĉu nur vi sola loĝas en Jerusalema, kaj ne scias tion, kio tie okazis en ĉi tiuj tagoj ?" (Lk 24:18)

Kompare kun tio, nia hodiaŭa komunikado suferas malavantaĝon, ĉar oni ne povas teknike certigi, ke grava mesaĝo atingos la tutan celatan popolon de la moderna socio.

Mi difinis la vorton komuniki. Nun mi volas konsideri ĝin en ĝia kunteksto en la Biblio, kaj montri, kiel ĝi rilatis al Jesuo. Por simpligi tiun taskon, mi konsideros tiujn demandojn : kion komuniki, kiam komuniki, kiel (kiamaniere) komuniki, kial komuniki, kaj al kiu komuniki ? Tiam ni detale esploros Johanon 4:1-26 por vidi Jesuon en la rolo de granda komunikanto.

Kion komuniki ? Hodiaŭ tio ofte estas reklamaĵoj aŭ ideologio. Sed Jesuo komunikis la Evangelion, la bonan novaĵon de la savo al ĉiu, kiu fidis al li kaj turniĝas for de siaj pekoj. Liaj disĉiploj disvastigis la sanan mesaĝon. Ho ve, se la Eklezio, la Korpo de Kristo, komunikas iun ajn alian mesaĝon ! Ĉar ne estas pli grava mesaĝo. La homo devas eskapi la inferon kaj iri al la ĉielo, kaj nur la Evangelio instruas al li aŭ ŝi la savon, kiel fari tion. Bedaŭrinde iuj partoj de la Kristana Eklezio hodiaŭ plivole komunikas aliajn aferojn ol la Evangelion.

Kiam komuniki la Evangelion ? Hodiaŭ, ne morgaŭ, ĉar :

"Vi ne scias, kio morgaŭ okazos" (Jak 4:14).

La Regno de Dio ne permesos prokrastojn. Al iu prokrastemulo diris Jesuo :

"Sekvu min, kaj lasu la mortintojn enterigi siajn mortintojn." (Mat 8:22)

La Evangelio postulas obeon, ĉar ĝi estas la Vorto de Dio. Same, en la Malnova Testamento, Dio donis siajn Dek Ordonojn, ne siajn Dek

Proponojn. Tamen, estas vere, ke Jesuo kaj siaj apostoloj kutime preferis komuniki la Evangelion je la sabata tago, ĉar la popolo estis kune en la sinagogo kaj ne distrita per aliaj aferoj. Kaj aliaj limigoj validas : Ne havas sencon komuniki la Vorton de Dio, kiam oni ne pretas fari tion. Tiel, Jesuo ne predikis la Vorton, ĝis kiam li atingis la aĝon de tridek jaroj. Kaj ne havas sencon prediki al malsatulo aŭ al alia speco de korpe suferanta homo, kiu unue bezonas materialan helpon. Jesuo unue resanigis homojn, tiam montris al ili la volon de Dio.

Kiel komuniki la Evangelion ? Tiu demando havas plurajn partojn. Per kiuj komunikiloj ? En kiuj lingvoj ? En kiu maniero ? Certe, per ĉiu homo aŭ teknika rimedo havebla. Sed mi opinias, ke la plej efika rimedo estas la personaj interparoloj aŭ la predikadoj antaŭ kunvenoj. Ilin kompreneble plifaciligas la modernaj rimedoj de transporto. Ĉiu homo lingvo taŭgas por komuniki la Evangelion, ĉar ĉiu havas parolantojn. Estas plej bone komuniki la Vorton de Dio en la indiĝena (gepatra) lingvo, ĉar tiu estas la plej komprenebla por la ricevanto. Tiel, bonvenaj estas la grandaj klopodoj nuntempe traduki la Biblion en ĉiun lingvon de la mondo. Estas 5000 da ili ! *Wycliffe Bible Translators* (Bibliaj tradukistoj Wycliffe) rolas grave en tiu laboro.

En kiu maniero komuniki ? Sincere fidante je la helpo de Dio.

"Kaj mia parolo kaj mia prediko estis ne en allogaj paroloj de saĝeco, sed en elmontro de la Spirito kaj potenco, por ke via fido estu ne laŭ la saĝeco de homoj, sed laŭ la potenco de Dio." (1 Kor 2:4)

Estas priplorinde, kiam la Evangelio estas predikata pro kialoj de profito aŭ malamo, sed Dio povas utiligi eĉ tion (Fil 1:15-18). Certe Jesuo neniam flatis iun ajn aŭ mildigis sian mesaĝon por gajni la favoron de la homamaso.

Kial komuniki la Evangelion ? Ni jam klarigis, ke ĝi estas la plej grava mesaĝo en la mondo. Preter tio, estas tute nature dividi bonan novaĵon kun iu alia. Jesuo Kristo volas nepre obei la volon de sia Patro, kaj predikado estis la Dia volo.

Kaj al kiu paroli la Bonan Novaĵon ? Al ĉiu homo, sen favoro aŭ distingo de personoj. La mesaĝo havas universalan aplikeblon, ĉar la Palo estas enkarceriginta ĉiun en la ĉerkon de la peko. Estus bone, se eduko aŭ racio aŭ scienco aŭ medicino aŭ riĉo aŭ virto povus revivigi la mortintojn, sed tiuj montriĝas senpovaj, kiel povas atesti iu ajn kristano. Nur la Evangelio revivigas la pekanton. Tiel do, Jesuo predikis al riĉuloj kaj al almozuloj, al la saĝaj kaj al la malsaĝaj, al justuloj kaj al ĉiesulinoj. Jesuo jes limigis

sian paroladon al preskaŭ nur la judoj, sed li diris :

"Lasu unue satigi la infanojn" (Mk 7:27) ;

alivorte, la judoj estis la infanoj de Dio, kaj meritis unue aŭdi la Evangelion. Poste, Jesuo ordonis prediki al la nacioj.

Ni konsideru parton de la Skribo rilate la komunikadon de Jesuo, la konatan tekston Johano 4:1-26, kie Jesuo parolis kun virino ĉe puto, nejudino. Laŭ tiu rakonto, Jesuo sidis ĉe puto post laciga matena marŝado tra Samario, kaj liaj disĉiploj forestis. Virino venis kaj ĉerpis akvon el la puto, malatentante tiun judan fremdulon. En versiklo 7 li subite ekparolis al ŝi :

"Donu al mi trinki."

Moderna angla versio de la Biblio (*New International Version*) kredigas, ke tiu frazo estas peto, ne ordono. Kiel ajn, Jesuo agis por establi komunikon kun ŝi. (Se li ne dirus ion ajn, estas certe ke la samarianino forirus sen paroli al li) La peto aŭ ordono estas tute ordinara, sed la principo estas, ke ni ofte (kiel Jesuo) devas rompi la baron de silento por starigi komunikadon. Ho ve, kiom ofte ni kulpas pri tio, kaj animo foriras en la fajron !

La samarianino estis al li tute fremda, de nacio neŝatata de la judoj (kaj reciproke), de la mala sekso, kaj malĉasta. La moroj tiam ne permesis virojn (precipe rabenojn) kunparoli kun virinoj judaj, eĉ sen paroli pri la "hundoj", la nacioj. Denove Jesuo lasis al ni ekzemplon, ke ni devas ne malestimi personon pro ties malsameco aŭ alieco aŭ malsupra stato.

Tiam ni legas :

"La samarianino do diris al li : Kiel vi, estante judo, petas trinki de mi, kiu estas samarianino ? ... Jesuo respondis kaj diris al ŝi : Se vi scius la donacon de Dio, kaj kiu estas tiu, kiu diras al vi : Donu al mi trinki, vi petus lin, kaj li donus al vi vivan akvon" (9-10).

La virino respondas per nesurpriza (preskaŭ antaŭprogramita) demando, kaj la respondo de Jesuo estas tute miriga : li donus ian "vivan" akvon. Li do kaptas la atenton de la virino per tute neatendita respondo. Tiel ankaŭ ni devus strebi por ne banaligi la Evangelion. Notu ankaŭ, ke Jesuo direktas atenton al si mem, ne al iu aŭ io alia. Tiel ankaŭ ni devus havi Jesuon en la centro de la Evangelio. Sen Jesuo ni tute ne havas la Bonan Novaĵon.

Plue :

"La virino diris al li : Sinjoro, vi neniam ĉerpilon havas, kaj la puto estas profunda ; de kie do vi havas tiun vivan akvon ? Ĉu vi estas pli granda ol nia patro Jakob, kiu donis al ni la puton, kaj trinkis mem el ĝi, kiel ankaŭ liaj filoj kaj liaj brutoj ? Jesuo respondis kaj diris al

ŝi : Ĉiu, kiu trinkis el ĉi tiu akvo, denove soifos ; sed kiu trinkis el la akvo, kiun mi donos al li, tiu neniam soifos ; sed la akvo, kiun mi donos al li, fariĝos en li fonto de akvo, ŝprucanta supren por eterna vivo." (11-15)

La virino miskomprenis la vortojn de Jesuo, ĉu intence aŭ ne, estas malfacile juĝi. Oni ja ne ĉerpos tiun "vivan akvon" el truon en la tero. Plue, ŝi provis devoĝigi la interparolon, direktante atenton al iu detalo en la historio de la judoj, malgrava rilate la Evangelion. Jesuo do lerte tuj klarigis la naturon de tiu viv-dona akvo, ignorante la vortojn pri Jakob. Ho, kiom ofte ni kredantoj lasas nin deflankiĝi de la kerno de la Evangelio kaj foriras en malgravajn detalojn ! Ni enplektiĝas en argumentojn pri romkatolikismo, pri bapto, pri evoluismo, aŭ pri io ajn. Sed Jesuo denove turnis la atenton al si mem, la donanto de la viva akvo. Notu plue, ke li enkondukas la temon de eterna vivo, al kiu tiu viva akvo kondukas. Ja devas esti substrekite, ke per la Bona Novaĵo venas eterna vivo. Ne estas miro, sekve, ke la Malnova Testamento estis grandmezure silenta pri la eterna vivo. Dio ne volis ŝajngi, ke la eterna vivo venus pere de la Leĝo.

"La virino diris al li : Sinjoro, donu al mi ĉi tiun akvon, por ke mi ne plu soifu, kaj ne devu traveni ĉi tien, por ĉerpi. Jesuo diris al ŝi : Foriru, voku vian edzon, kaj revenu ĉi tien." (15-16)

Dubeblas, ĉu la virino kredas lin, kaj ŝi certe ne komprenas lin. Ŝi pensas tere, kiel havi subĉielan paradizon, sed la Evangelio estas spirite kaj direktas la koron ĉielen. Oni devas neniam ligi la Evangelion al iu ajn promeso pri pli komforta tera vivo. Multaj kristanoj povas atesti male, ke ili suferas diversajn elprovojn kaj afliktojn. La respondo de Jesuo unue sonas strange : kial ŝi bezonas nun sian edzon ? Sed la klarigo tuj sekvas en la plej proksimaj versikloj.

"La virino respondis kaj diris al li : Mi ne havas edzon. Jesuo diris al ŝi : Vi prave diris : Mi ne havas edzon ; ĉar vi havis kvin edzojn ; kaj tiu, kiun vi nun havas, ne estas via edzo ; ĉi tion vi diris vere." (17-18)

Jesuo scias, kio enestas en la koro de la homo, do ne estas miro, ke li enmetas en la lumon la malvirtan pasintan vivon de tiu ĉi virino. Li ne denuncis la pekon de la virino, li simple asertis ĝin. Sed kial ? Ne por kondamni ŝin. Pli ĝuste, verŝajne por igi ŝin fidi je li (Ne eblas, ke li scius antaŭe tiajn detalojn de la virino, ĉar la judoj kaj la samarianoj ne interklačadis). La Evangelio efikas por igi homojn agnoski siajn vivojn de pekado. Sen iu vekigo al nia stato de pekeco kaj perditeco, ne facile eblas ajna



reala respondo al la mesaĝo de la Bona Novaĵo. Kompreneble, la plejmulto da kristanoj ne estas profetoj aŭ ne havas donacon de kono, sed ni povas ja montri al pekantoj, kiom alta estas la normo de Dio koncerne la homan konduton, kaj kiel ni maltrafas tiun normon.

"La virino diris al li : Sinjoro, mi ekvidas, ke vi estas profeto. Niaj patroj adoradis sur ĉi tiu monto ; kaj vi diras, ke en Jerusalemo estas la loko, kie oni devas adori. Jesuo diris al ŝi : KREDU al mi, virino ; venas la horo, kiam nek sur ĉi tiu monto, nek en Jerusalemo, vi adoras la Patron. Vi adoras tion, kion vi ne konas ; ni adoras tion, kion ni konas ; ĉar el la judoj estas la savo. Sed venas la horo, kaj jam estas, kiam la veraj adorantoj adoras la Patron laŭ spirito kaj vero ; ĉar la Patro serĉas tiajn por esti Liaj adorantoj. Dio estas spirito : kaj Liaj adorantoj devas adori Lin laŭ spirito kaj vero." (19-24)

La virino agnoskis, ke Jesuo estis profeto, sed tuj provis elturniĝi, levante disputon inter la judoj kaj la samarianoj pri la ĝusta loko por adorado. Ŝi ne volis, ke ŝia vivo de spirita mallumo plene elmontriĝu. Sed ni devas konfesi la pekon kaj niajn misuzatajn vortojn. Tiel Paŭlo skribis :

"Sed se ĉiuj profetos, kaj envenos nekredanto aŭ neklerulo, li estos konvinkata de ĉiuj ; la sekretoj de lia koro estos elmontrataj ; kaj sekve li falos sur sian vizaĝon kaj adoros Dion, deklarante, ke Dio ja estas ĉe vi." (1 Kor 14:24-25)

Jesuo denove ne permesas deflankiĝojn de la dialogo. Li rifuzis eniri en disputon pri la ĝusta loko por adorado. Anstataŭe, li deklaris, ke Dio multe pli interesiĝas pri la stato de la adoranta koro, ol pri ties geografia loko. Kaj li havigis admonon al la virino, ĉar ŝia popolo adoradis blinde : "kion vi ne konas". Kaj li insistas, ke el la judoj, kaj ne el ŝia nacio, venas la savo. Tia admono certe ne povis ĝojigi ŝin, sed la Evangelio devas esti komunikata en vero. La homo ne estas humila estaĵo. Ni ne volas agnoski, ke ni estas senpovaj savi nin. Sed la Bona Novaĵo nepre premias, ke ni bezonas savon. Ĝi ankaŭ aldonas, ke Dio "serĉas" adorantojn, kiuj vere adoras Lin. Jen grava punkto : Dio volas, ke ni venu al Li ! Li ne estas ĉiela ermito, kiu nur toleros nian alestadon. Kaj kiel ni venu al Li ? Sincere, ne por uzi Lin por havigi al ni ion alian.

La nekono ne estas beninda. Jesuo ne aprobis la malscion de la samarianoj. Kiel la granda puritano Richard Baxter (*riĉ'd bakstr*) notis, ke superfluo da scio povas foje esti neutila, eble eĉ malutila. La homo povas fieriĝi. Sed la manko de scio, precipe pri la Evangelio, povas esti katastrofa. El tio sekvas la bezono proklami

la Bonan Novaĵon al ĉiu homo.

"La virino diris al li : Mi scias, ke venas la Mesio (kiu estas nomata Kristo) ; kiam tiu alestos, li anoncos al ni ĉion. Jesuo diris al ŝi : Tiu estas mi, kiu parolas al vi." (25-26)

Tiu ĉi demando de l' virino ankaŭ estas deflankiĝo, sed almenaŭ ŝi komencas pensi pri vera religio. Ŝi atendas, ke tiu Mesio solvos ĉies problemojn. Kaj Jesuo tuj malkaŝis sin al ŝi ! Leviĝas la demando, kial li rekte anoncis sian mesiecon nur (kiom ni scias) al nejudino ? Verŝajne pro tio, ke nur nejudoj malhavas malĝustajn ideojn pri la Mesio, kiu devis unue suferi, antaŭ ol eniri sian gloron. Ĉiukaze, la principo estas, ke ni devus rekte anonci la Evangelion al homoj, sen vualoj kaj kriptaj vortoj. Aliflanke, ni devus ne uzi vortojn, kiuj miskondukos la aŭskultantojn pro kromsignifoj kaj emociaj nuancoj. Tiel agis Jesuo.

Unu afero notinda en tiu johana dialogo estas, ke al Jesuo neniam mankas vortoj. Li ĉiam scias kion diri. Li neniam diras : Momenton, mi devas pripensi vian respondon. Kaj kiam li parolis, ĉiu vorto alportas oran veron. Li ne malŝparis vortojn. Tiel el tio eble estas parta klarigo por la raporto de la oficuloj al la fariseoj, kiam ili diris :

"Ankoraŭ neniam tiel parolis homo." (Joh 7:46)

Plue, Jesuo perfekte sciis la Skribojn, ne bezonante konsulti ilin. Li ofte estis citanta el ili responde al siaj demandantoj. Tio estas instruo al kristanoj hodiaŭ, ĉar ni tro ofte apogas nin sur la skribita Vorto, kiel la skribistoj. Ni ne dediĉas tempon al parkerigo de la Bibliaj versikloj, kio estas bedaŭrindaĵo.

La Skriboj montras Jesuon kiel la persona komunikanto, kiu alĝustigis sian mesaĝon al la aŭdantoj. Li ne parolis al la virino de Samario per pompaj teologiaj vortoj, kiel satisfakcio, mono-teismo, mizerikordo, sed tiel, ke ŝi povis kompreni. Sammaniere, la apostolo Paŭlo alĝustigis sian mesaĝon depende de tio, ĉu li parolis al la judoj aŭ al la nacioj. La alĝustigo koncernas la fonan scion de aŭskultantoj, kiom ili bezonas scii, kaj ne la bazan veron de la Evangelio.

Resume, Jesuo, la perfekta kaj obeema filo de Dio estis ankaŭ la perfekta komunikanto. Li parolis ĉiam vere, sincere, sencoplene kaj ĝustatempe. Petro skribis :

"Trompo ne troviĝis en lia buŝo." (1 Pet 2:22)

Li sciis, kiel komuniki kun la riĉulo kaj la malriĉulo, kun sklavo kaj registro. Ne eblas, ke liaj servantoj iam ajn atingus lian esprimivon, sed li ja estas nia modelo.

Doug Portmann, Usono



**2a Vatikana Koncilio: Dekreto pri la  
ekumenismo.**

Eldonanto: Bernhard Eichkorn.  
Tradukisto: D-ro Guido Holz.  
1985, krampite, DIN A 5,  
ISBN 3-926633-07-7,  
Mendo-N-ro. 2207, 5.-- DM.

**Pri la homa laboro.**

Johannes Paul 2-a,  
Tradukis el la pola:  
Prof. Tyburcjusz Tyblewski,  
En sia multelegata encikliko la Papo  
aplikas la eklezian instruon al la nuntem-  
pa vivo substrekante la homan dignon de  
la laboro.  
1985, 90 paĝoj, broŝura, 21x14,8 cm,  
ISBN 3-926633-02-6,  
Mendo-N-ro. 2302, 15.-- DM.

**Max Josef Metzger, sacerdoto,  
matiro por paco, pioniro de  
ekumenismo.**

Prelego de Walter Mudrak, Wien, legita  
en Meitingen okaze de 6-a Ekumena Espe-  
ranto-Kongreso Augsburg 1985.  
Kun aldonoj.  
Editoro: Bernhard Eichkorn omage al  
100-jarigo de M.J. Metzger, naskita 1987.  
1987, 32 paĝoj, krampite, DIN A 5,  
ISBN 3-926633-09-3,  
Mendo-N-ro. 2309, 5.-- DM.

**Kasedo kun prelego de  
d-ro Werner Bormann: La Evoluo de  
Esperanto kaj la Akademio**

Prelego okaze de la seminario  
de Germana Esperanto-Instituto en  
Konstanz 30. September 1984.  
1985, C 60,  
ISBN 3-926633-05-0,  
Mendo-N-ro. 2801, 7.-- DM.

**La Evoluo de Esperanto kaj la  
Akademio.**

Publikaĵoj n-ro 7 de Germana Instituto.  
1985, 16 paĝoj, krampite, DIN A 5,  
ISBN 3-926633-05-0,  
Mendo-N-ro. 2805, 3.-- DM.

**Kompletorio de la semajno.**

Po unu Kompletorio de 7 semajntagoj laŭ  
la Breviero.  
Kompilis kaj tradukis  
Bernhard Eichkorn.  
1987, 36 paĝoj, krampita, DIN A 5,  
ISBN 3-926633-10-7,  
Mendo-N-ro. 2210, 5.-- DM.

Barbaro ? En la etimologia vortaro<sup>a</sup> verkita de Ernest Weekley  
mi trovis difinon jenan :

"Barbaro, barbara, de la greka vorto βαρβαρος (barbaros)  
kiel aludo al nekomprenebla parolado (BAR-BAR)."

Komparu en sanskrito BARBARA, estas 'balbuto' aŭ 'nearja'. La etim-  
ologia vortaro de Eric Partridge<sup>b</sup> konfirmas kaj ankaŭ aludas al  
Berberujo, Norda Afriko de la okcidentaj limoj de Egiptujo ĝis la  
atlantika marbordo, de la latina BARBARIA 'barbareco', 'pri fremdaj  
landoj'. La traduko en la italan lingvon, eldonita de la Brita kaj  
Alilanda Biblia Societo (British and Foreign Bible Society), uzas  
la vorton BARBARO, kiu ankaŭ signifas 'kruela', 'kruda', 'maldeli-  
kata', 'neciviliza'. The Barbarians (La Barbaroj), verkita de Prof.  
Malcolm Todd<sup>c</sup> indikas ilin kiel gotojn, frankojn kaj vandalojn, kiu  
loĝis en nordokcidenta Eŭropo preter la landlimoj de la romia  
imperio. De la dua jarcento antaŭ Kristo Caesar (Cezaro) estis la  
unua verkisto, kiu priskribis la ĝermanojn kiel ekstreme sovaĝajn  
(FERI, sovaĝaj, necivilizitaj, kruelaj) ; la gaŭloj povis iĝi  
civilizitaj per kontakto kun Roma, sed la ĝermanoj restis FERI.

En la antikva eklezio la plej kutima signo estis parolado per  
(nekonataj) lingvoj, kaj tiamaniere la eklezio iĝis loko, kie oni  
ne komprenas, kiel kun la lingvo de barbaroj. La korintanaj epis-  
toloj ne emfazas lokan eklezion aŭ reganton, kvankam tiu mem havas  
aŭtoritaton laŭ 1 Kor 5:3-5. Pri komunio ne estas reganta frato, kaj  
estas kvazaŭ ĉiuj ricevis la Spiriton, kaj ili povas profeti, paroli  
per lingvoj, kaj interpreti ilin, kaj ĉi tiuj ne havas reganton,  
laŭ D-ro F. J. Foakes Jackson<sup>d</sup>. En la listo de diaj donacoj en Rom  
12:6-7, iuj estas dirataj, por klarigi la volon de Dio, ne por kaŝi  
ĝin. Estas προφητεία (profeteja, profetado), διδασκαλία (didaskalja,  
instruo) kaj παρακλήσις (paraklësis, admono). Ĉi tiuj aspektoj  
rilatas al Dio ; la Kreinto, kiu diris kaj tio fariĝis ; la Instru-  
isto, kiu estis διδασκαλος (didaskalos) en la Nova Testamento, uzita  
pri Jesuo Kristo, de la antikva radikalo δαω (daō, lerni), duplikata  
silabo por formi la igan : instrui ; la Sankta Spirito, la Parakleto  
(vokato apuden por helpi).<sup>e</sup> En ĉio Dio ne volas kaŝi sed malkaŝi.

La barbaroj ankaŭ havis religiajn regantojn aŭ pastrojn, kiuj  
devis trakti pri aŭguroj kaj paroli publike, puni ofendojn kaj pri-  
zorgi la sanktajn boskojn<sup>f</sup>. Dum bataloj ili havis publikajn devojn.  
Notu ankaŭ, ke la melitanoj (maltanoj), kiuj parolis punikan lingvon,  
estas barbaroj en Agoj 28:4<sup>g</sup>.

"Mi estas ŝuldanto al grekoj kaj al barbaroj, al saĝuloj kaj al senprudentuloj." (Rom 1:14)

"Ĉar tiu, kiu per lingvo parolas, ne al homoj parolas, sed al Dio; ĉar neniu komprenas, sed en la Spirito li parolas misterojn." (1 Kor 14:2)

"Tamen en la Eklezio mi preferus paroli kvin vortojn per mia intelekto, por ke mi instruu ankaŭ aliajn, ol dek mil vortojn per lingvo." (1 Kor 14:19)

Laŭ Pastro J. Pettingell<sup>4</sup>, la signo de parolado per lingvoj estas citita inter homoj rilate al judaismo (Agoj 2:10,19), tiamaniere indikanta la potencan agantan ĉeeston de la Spirito, konfesitan de tiuj, konsidere ke ili estis bridataj kaj formalaj en adorado, kaj tiamaniere la signo estis pruvo, ke la Spirito trabatis kaj trarompis. Aliflanke, pri tiuj kiuj avide "serĉis" kaj praktikis en la entuziasmo de emocia eksceso, ofta inter adorantoj de idoloj, povus esti signo de tre senspirita "adorado".

Ĉi tio estas la kialo, pro kio Paŭlo deziras emfazi ĉe la korintanoj, ke adorado, kaj speciale publika adorado, devas esti regata de la menso, kaj ne devas esti nur ekstazo de emocia ekscito. La lango indikas ĉu la tuta korpo estas regata. Adorado, kaj speciale la publika, devas esti regata de la menso (1 Kor 14:1-20). La Spirito de la profeto devis esti "sub la tuta regado de la profeto". Ne estas penso, ke devas esti alimaniere rilate al lingvoj. Do, kristanoj ne devas "senbridiĝi", sed adori per regata abundo. Kp. 1 Kor 14:26:33. Paŭlo ĝojis, ĉar li parolis per lingvoj "pli ol ĉiuj" sed klare ne laŭ ilia ne regata ekscesa maniero, kaj neniam publike (v. 18-19). Ĉi tio klarigas, ke parolado per lingvoj estas ĉefe donaco por helpi en privata adorado, kaj kiel ĉiu formo de adorado, devas esti regata kaj retenata por eviti la "spiritajn danĝerojn" de eksceso. Do, estos eble ke oni regu la tutan korpon, se oni regas la langon, kaj ne estos kiel barbaro.

Pri la parolado de la Agoj, ni devas rimarki, ke Dio tiamaniere kunigis homojn, kiuj parolis diversajn lingvojn. Ĝoje ĉiu aŭdis sian propran lingvon individue. Pentekosto estis je tiu tempo la plej populara el la tri ĉefaj festoj. Tiamaniere la Sinjoro prenis ĉiun membron, kiel ageman atestanton de la nova vivo en la Spirito.

Senutila parolado? Certe ni parolas por informi, kaj deziras ke ili komprenu. Estas simila afero kiam ni preĝas. Kiam ni instruas niajn infanojn pri preĝo, ni emfazas, ke ni devas paroli en simplaj vortoj. Eble ili diros: "Sed ni ne ĉiam povas kompreni, kiam Paĉjo kaj Panjo preĝas." Bedaŭrinde kiam la tuta familio preĝas kune, ni forgesas. Vidu kiom da vortoj ni uzas, kiuj estas komplikaj.

Simplaj vortoj estas kompreneblaj. Eble ni pensas, ke ni ne volas paroli tiel simple. Sed estas alia avantaĝo; okazoj estis kiam fremduloj diris, ke ili ŝatas mian preĝon aŭ predikon. La vortoj estas de la vortaro de la komencanta lingvo. Tamen mi povas kompreni ke devas esti okazoj pri komplikaj temoj, kiel profetaĵo aŭ judaj instruoj. Eble mi ne parolis per lingvoj, sed eble oni ne komprenas pro lingvistikaj terminoj aŭ citaĵojn pri lingvoj, kiuj estas fremdaj.

Por la korintanoj barbaro estis parolanto de fremda lingvo, kiun oni ne povis kompreni. Estas multaj malsamaj lingvoj, kaj neniu estas sen signifo, sed ĉiuj estas senvaloraj, se nescio pri la lingvo malebligas komunikon<sup>1</sup>. Estas laŭ iuj tradukoj la parolado de ĵargono. Tamen, ne kontraŭu la Spiriton, ĉar ĉi tion Dio ne povas pardoni.

Estas ĉiam la normo de la Eklezio, ke la vera kredanto estu akceptita. Ekz-e, se oni parolas en la Spirito, oni devas decidi laŭ la instruo de la dek du disĉiploj, la DIDAKĤE, ĉapitro 11, ĉu li estas vera kristano. Ĉi tiu havus la konduton de la Sinjoro, kaj indikus ke li estas kristano, ĉar li farus tion, kion li instruas (D-ro Percy Gardner)<sup>1</sup>. Eĉ frue homoj malveraj kaj avidaj pretendis labori per la Spirito. Ĉu la parolantoj en la Spirito ne estas similaj?

Eble la predikanto diras, ke lia vorto ne estas sufiĉe simpla por la eklezio, kie oni tendencas prediki la bazajn temojn. Tamen ni devas memori, ke estas vorto donita de Pastro Gaiser de Stuttgart:

"Ni estas donitaj unu al la alia, por aldoni unu kun la alia reciproke en lia servado."

Se mia prediko estus malsama, mi povus diri: "Estas nur barbara," sed pli precize estas malsama, por ke mi sciu la gravecon de la alia. Komparu la diversajn specojn de muziko? Eble unu parto de programo pretigas nin rilate al alia, kaj la fina esprimo estas, ke muziko estas eĉ pli mirinda! La Sankta Spirito tiel bone kunligas ĉion, ke ni povas vidi similajn, ne malsimilajn.

Mi estis iom interesata, kiam mi iam studis la hungaran lingvon. Kiel ĉe multaj aliaj, oni devas aldoni sufiksojn por esprimi prepozician rilaton. Ekz-e, por esprimi "en (io)" sen movo, oni aldonas -ben, kaj por esprimi "en (ion)" kun movo, oni aldonas -be, sed, laŭ la antaŭa vokalo, la sufiksoj fariĝas -ban kaj -ba. Se fremdulo ne memoras ĉi tion, ĝi estas kiel barbara lingvo!

Ankaŭ, laŭ kutima interpreto, la Vorto de Dio povas esti stranga, sed estas nova apliko. Ĉiam ni devas atenti ĉi tion. Ekz-e la





# eldonejo sivron

P.O.K. 231 80, IL-91 231 Jerusalem, Israel.

Vi ricevos 37%-an rabaton sur ĉiuj prezoj de ĉi tiu pago.



**Ortodoksa esperantismo; La lukto por unueco, Ercio Daraka.** Jerusalemo: Eld. Sivron, 1985. 9p. Mimeo. 15cm. Escio pri la evoluo de la esperantismo dum la fruaj jaroj; kun notoj kaj bibliografio. Prezo: 4,20 gld.

**Zamenhof and Esperanto, Norman Berdichevsky.** Jerusalemo: Sivron, 1986. 10p. 15cm. Prezo: 4,20 gld.

**Zamenhof et l'esperanto, Norman Berdichevsky.** Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1986. 10p. 15cm. Broj. Prezo: 4,20 gld.

**Zamenhof and Esperanto, Norman Berdichevsky.** Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1986. 10p. 15cm. Broj. Prezo: 4,20 gld.

**Zamenhof y el esperanto, Norman Berdichevsky.** Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1986. 10p. 15cm. Broj. Prezo: 4,20 gld.

**Historio de la Esperanto-movado en Israelo (reprezo el Israela Esperantisto, 1982), A. Wundel (1954).** Jerusalemo: Sivron, 1986. 8p. 15cm. Prezo: 2,10 gld.

**Lingvo kaj religio; Studo pri la frua esperantismo kun speciala atento al L.L. Zamenhof, Jeremi Gishron (1948).** Jerusalemo: Sivron, 1986. 212p. 14cm. Prezo: 16,00 gld.



**Urba oazo, D. Mager (1954) kaj J. Gishron (1948).** Jerusalemo: Sivron, 1986. 10p. Ilus. 15cm. Originalaj poemoj. Prezo: 4,80 gld.

**Mia kara molto! Amikaj poemoj, Ercio Daraka.** Jerusalemo: Eld. Sivron, 1986. 12p. Ilus. 15cm. Originalaj poemoj. Prezo: 4,80 gld.

**Eli kaj Jahu; Poemoj el la Sankta Lando, Ercio Daraka kaj David Mager.** Jerusalemo: Eld. Sivron, 1986. 15p. Mimeo. 15cm. Originalaj poemoj, plejpartite ritataj al Esperanto. Prezo: 6,30 gld.

**Kosma ano, Josef Kohen-Cedek (1903).** Originalaj poemoj. Jerusalemo: Sivron, 1986. 14p. Ilus. 15cm. Prezo: 6,30 gld.

## LA VORTO DE DIO ENKARNIĜINTA EN HOMAN LINGVON

Dio kreis kaj estigis ĉion per Sia Vorto. Li kreas, savas kaj sanktigas ĉion, konstante, per Sia Vorto. Inter Dio kaj ĉio (kosmo, naturo, ĉielo, tero, homaro, k.a., estiĝinta per Li) kaj inter ĉio ĉi tio, estas komunikado. En la ĉinaj menso aŭ ideoj, ĉielo kaj homo estas respondemaj, konformemaj kaj unuemaj. Ĉi tie, ĉielo estas Dio, kosmo, naturo, la medio ekologia, kaj kreita, ĉirkaŭ la homaro. Kaj la ĉielo kaj la homo konstante evoluas al pli da riĉiĝo kaj plenumo. Inter ili estas komunikado.

Homo, ekde sia bebeco, ĉiam serĉas signifon de aĵoj. Ĉina antikva poeto, Qu Yuan (*Ĉju Juan*, ĉ. 340-278 aK) ĉantis:

"Ho la vojo estas senlima kaj malproksima,  
Mi serĉos supren kaj malsupren."

La homa serĉo de la signifo de estiĝo iras al vero kaj bono kaj belo, al fido kaj espero kaj amo, al fina signifo, al Dio. Plue, Dio konstante serĉas homon. En Eden, homo kaŝiĝis, Dio serĉis kaj vokis (Gen 3:8-9). Kiam homo erarvagis kiel perdita ŝafo, Li serĉis, ke neniu pereu (Mat 18:12-14). Dio Vortigas, revelacias, instruas, punas, elaçetas, liberigas, benas. Li komunikas, Li amas, al la kosmo, al ĉio, kaj al la homaro. Li diris en Jesuo Kristo al ni:

"Vi ne elektis min, sed mi elektis vin, kaj starigis vin, por ke vi iru kaj donu frukton, kaj ke via frukto daŭru". (Joh 15:16)

Jen nia preĝo: "Elserĉu vian sklavon". (Psa 119:176)

Dio komunikas per diversaj rimedoj. Inter ili la kulmino estas Jesuo Kristo, tiel ke Dio, kaj Lia Vorto, fariĝis karno kaj loĝis inter ni, t.e. la enkarniĝo. La enkarniĝo estas necesajo en la Dia celo kaj intenco por la kosmo. Iuj okcidentaj teologoj opiniis, ke la enkarniĝo fariĝus eĉ se ne estus homa peko. Homaro, kiel parto de la kosmo kreata kaj savata kaj sanktigata de Dio, akceptas kaj konas la enkarniĝon, kun Jesuo Kristo kiel ĝia koro. Ni alte priatentas la intiman kunligiĝon inter la enkarniĝo kaj la savo. Jesuo nomiĝis ĉi tiel: "Ĉar li savos sian popolon de ĝiaj pekoj". (Mat 1:21) Ni preĝas, kiel li instruis nin: "Liberigu nin de la malbono". Tamen ĉiaokaze, la enkarniĝo ja estas kulmino kaj koro de la Diaj komunik-rimedoj, revelacio, Providenco, Amo.

Jesuo estas tute homa, sin malplenigis, servis kaj donis sian vivon, kiel elaçeton por multaj. Tiel li unuiĝas kun la fina signifo, la bazo de homa estiĝo kaj ekzisto. Ĉisence, li estas tute

dia. Li manifestas al la homaro la promeson de fido kaj espero kaj amo, en ĉio per similitaĵo kaj samiĝo al ni homoj, tamen sen peko (Heb 2:17 ; 4:15).

Tiel la enkarniĝo ankaŭ manifestiĝas riĉe en fizika kosmo kaj partikulare en karna fizika homaro, plurflanke kaj plurdimensie en homa vivo kaj konstruo, en homaj kulturoj. Lingvo estas unu el la gravaj flankoj aŭ dimensioj de homa vivo kaj konstruo, kaj de homaj kulturoj. Ĉina antikva filozofo Zhou Dunyi (周敦頤, 1017-1073 pK) notis: "lingvaĵo por porti TAON". TAO, la sama ĉina ideogramo (aŭ ideografiaĵo), kiel en taoismo, iu ĉina religio, signifas ideon aŭ doktrinon, ofte konfucean (Kong Fu Ceŭ) aŭ konfuceanisman doktrinon, kaj en la ĉinlingva Biblio, ankaŭ Vorton de Dio, LOGOS-on, vojon kiel en "la vojo, la vero kaj la vivo" (Joh 14:6). Plue, Dio parolis kaj daŭre komunikas al ni, en Sia Filo Jesuo Kristo, en la Sankta Spirito, kaj ankaŭ multfoje kaj multmaniere. Li ankaŭ uzis kaj daŭre uzas homan lingvon. Tial homa lingvo kaj lingvaĵo estas por porti la Vorton de Dio, la TAO-n, la LOGOS-on.

Tial, per la Biblio kiel Diinspirita skribaĵo en homaj lingvoj, per instruo de la Sinjoro Jesuo, per la leĝo kaj la profetoj kaj la apostoloj kaj la sanktuloj de la generacioj, ni komprenas la Vorton de Dio, la mesaĝon de la Evangelio, la komision kaj predikon kaj ateston, kaj la preton de la vojo de la Eternulo kaj la rekon de Liaj irejoj. Jen komunikado per homa lingvo uzata de Dio, inter Dio kaj homo, inter la homaro.

Per homa lingv(a)ĵo la Vorto de Dio estas alportata, en argilaj vazoj trezoron ni havas. Tiel Dio enblovis en homan nazon spiron de vivo, kaj la homo fariĝis viva animo. Tiel ni en karno estas gracon ricevintaj, tra krucumiĝo pardonitaj, denove naskitaj, kaj ni trovas la spiritan vivon. Tiel mi, vi, li, ŝi, ili, ni vivas, jam ne ni mem, sed Kristo en ni.

Same kiel homa lingvo, homaj kulturoj ĝenerale estas donaco de Dio. Homaj kulturoj, procezentaj en homa serĉo kaj en homa vivo kaj konstruo, estas grundó de Evangelio, kun nutraĵo riĉiganta nian ateston, kunecon kaj komunikadon. Kristanoj de ĉiu lando kaj epoko nepre denove pripensas kaj la mesaĝon predikatan interpretas tra siaj propraj spertoj, je la nova ĉirkaŭaĵo. Tial teologio estas neeble kaj nenecese konsentata ĝenerale. Tamen, nur rilate kun la fina signifo, teologio povas esti trafa, t.e. kerneca kaj taŭga. La eklezioj kaj ties misioj en diversaj landoj eble estas malsamaj en respektivaj sociaj kaj kulturaj ĉirkaŭoj, tamen tie ĉio nepre estas kuneco de amo kaj komunikado en serĉo Dibena.

Diverseco kaj pluraleco de serĉo en vivo kaj konstruo pri mondo, kulturo, teologio, eklezio, k.a. estas Dibena. En majo ĉijare, montgrimpistoj el Ĉinio, Japanujo kaj Nepalo, denorde kaj desude, supreniris kaj kuniĝis sur la pinto de Everesto, t.e. Ĉomolangma, kulmino de nia planedo. Tiel ĉiuj formoj de vero estas koheraj kaj ne repacigeblaj. Titus Flavius Clemens (Klemento) de Aleksandrio diris, ke la rivero de vero estas unu kaj fluoj eniras ĝin ĉiflanke aŭ aliflanke. Tiel trairis la tradicio de la tuta dumiljara historio de kristanismo.

Tial kristanoj de ĉiu nacio kaj lando devas enredikigi la evangelian mesaĝon en sian kulturon, kaj doni siajn fruktojn. Tiel, kiam la sankta urbo, nova Jerusalemo, malsupreniros el la ĉielo for de Dio (Apo 21:2), granda homamaso el ĉiuj nacioj, el ĉiuj triboj, kaj popoloj kaj lingvoj eniros la sanktan urbon dise tra tri pordegoj oriente, tri pordegoj norde, tri pordegoj sude, tri pordegoj okcidente, kun siaj propraj fruktoj kaj oferoj, kiuj riĉigas nian ekumenan eklezion kaj ĝian komunikadon, kaj ĝian katolikecon kaj unuecon, ne unuforme, sed harmonie, kaj kiujn Dio akceptos favore.


Dum komunikado, ni plue pensas pri la homaj lingvoj, kiujn Dio uzis kaj daŭre uzas. La unuaj evangelizistoj, judoj, parolis plejparte greke, tiam la ĉefa lingvo. Paŭlo eĉ skribis greke al la romanoj en kies lando la latina estis la ĉefa lingvo. La greka eble estis pli riĉa, ne nur por aferoj de la ĉiutagaj vivo kaj konstruo, sed ankaŭ por profundaj pensoj kaj ideoj, kaj por moralo, signifo de estiĝo, por la Vorto de Dio. Mezepoke, en la Eklezio de Okcidento, la emo estis, ke instruiteco, Sanktaj Skribo kaj liturgio estu per la latina, kaj la aliaj lingvoj estu rigardataj kiel barbaraj. Ekde la Reformacio de la deksesa jarcento p.K., diversaj naciaj lingvoj fariĝis pli gravaj ol la universala lingvo latina, kaj seriozaj verkoj literaturaj, erudiciaj kaj religiaj estis eldonitaj diverslingve. Nun, laŭdante kaj dankante antaŭ Dio, ni havas tiel multajn lingvojn, kiujn Dio, kaj Sia Vorto, uzas kaj ŝarĝas. Kaj mi, nature, amas nian Biblion ĉin-lingvan.

Plue, nia kara lingvo, Esperanto, internacia, helpa, por serĉo kaj penso, por riĉiĝo kaj kuneco, por Evangelio kaj teologio, por la mesaĝo de la enkarniĝo kaj de Kristo, kaj por komunikado, inter kulturoj, inter rasoj, inter Dio kaj homo, estas Dibena. Dio, kun Sia Vorto, uzas kaj ŝarĝas Esperanton. Per Esperanto ni estas ĉe la fina signifo, kuniĝas kun la Amo en Kristo, la plena bildo de la Dia substanco. Do ni daŭrigos kaj antaŭenigos la signifan serĉon kaj penon de ni, K.E. (kristanoj esperantistoj) en ĉi tiuj E.K. (Evangeliaj Kajeroj), kun nia espero kaj preĝo al Dio:

"La faron de niaj manoj fortikigu al ni, kaj fortikigu la faron de niaj manoj, ĝis la veno de Via Regno."

Zhao Zhilian, Ĉinio

ZHAO ZHILIAN (ĉao ŝilian), Ĉino (1951), diplomiĝis en la Nankina Unuiga Teologia Seminario, kie li nun instruas pri kristana eklezia historio, i.a., kaj kiel redaktoro de eldonaĵoj, inkl. *Religioj* de la Centro por Religia Studo de la Nankina Universitato.



## LA SANKTA LINGVO KAJ LA INTERNACIA

Ofte diskutata temo, almenaŭ dum antaŭaj jarcentoj, estas la relativaj valoroj de diversaj lingvoj. Iel oni devas unue difini la esencon de lingvo por klarigi tiun temon.

Lingvoj estas medioj por kulturoj aŭ pli mallonge iloj por ideoj. Ne povas ekzisti lingvo kiu malhavas mesaĝon, kaj same nebla estas mesaĝo al kiu mankas lingvo por esprimi ĝin. Du kontraŭaj opinioj disvastiĝintaj en la mondo disiĝas pri kiu estas la ĉefa elemento inter la du, ĉu la lingvo, ĉu la mesaĝo. Laŭ la unua opinio estas la lingvo kiu gravas kaj oni povas, almenaŭ teorie, komuniki ian ajn mesaĝon per ĝi. La kontraŭa opinio diras ke la mesaĝo venis unue, kaj ke oni povas uzi, preskaŭ, ĉiun ajn lingvon por esprimi ĝin. La demando povas esti formulita ankaŭ alimaniere, ĉu la lingvo dependas de la mesaĝo, aŭ ĉu la mesaĝo dependas de la lingvo? Kio estas la rangordo inter la du?

En ĉi tiu artikolo mi volas iomete analizi du unuavide tre diferencajn lingvojn, kiuj tamen havas multajn komunajn ecojn, nome la hebrean kaj Esperanton. Komparante tiujn ĉi lingvojn mi provos montri kelkajn sugestojn, kiel oni eble povus solvi la starigitan demandon.

Unue ni povas konstati, ke la hebrea kaj Esperanto havas komunajn punktojn. Eble la plej grava afero estas, ke ambaŭ lingvoj havas kroman nomon, kiu diras ion pri ĝia uzado kaj karaktero.

La hebrea estas ankaŭ nomita "la Sankta Lingvo" (LAŜON HA-KODEŜ) kaj havas jam de jarmiloj multajn tradiciojn, legendojn kaj ideojn ligitaj al si, kiuj klarigas pri ĝia rolo kiel sankta lingvo. Ampleksa tradicio elkreskis pri la lingvo mem kaj pri ĝia sankteco.

Estante antikva lingvo, la hebrea fariĝis la ilo por la Dia revelacio nomita la Torao, kaj ĝi estis uzata por la verkado de la edukaj, profetaj kaj historiaj libroj de la Biblio (krom kelkaj partoj en la aramea lingvo)<sup>1</sup>. Iom post iom la hebrea estis konsiderata kiel unu el la tri angulŝtonoj de la juda kredo. Krom la juda popolo kaj la lando Israelo ankaŭ la hebrea lingvo fariĝis sankta heredaĵo. En la ĉiutaga matenpreĝo la judoj benas tuj antaŭ la dirado de "Aŝdu Israelo" (*Ŝma Israel!*) tiel:

"Ĉar vi estas Dio kiu scias savi kaj kiu elektis nin inter ĉiuj popoloj kaj lingvoj."<sup>2</sup>

Aliloke en la rabena literaturo oni lernas, ke unu el la meritoj de la judoj, kiuj sekurigis por ili la savigon el Egiptujo, estis, ke



ili ne ŝanĝis sian lingvon.<sup>3</sup> Simile el la vortoj de la Torao :  
 "Kaj instruuj ilin al viaj filoj, parolante pri ili, kiam vi sidas en via domo kaj kiam vi iros sur la vojo kaj kiam vi kuŝigos kaj kiam vi leviĝos" (Read 11:19)  
 oni povas lerni la devon instrui al la infanoj la hebrean.<sup>4</sup>

Kiel la hebrea ankaŭ Esperanto havas alian nomon, kiu rilatas al ĝia esenco, nome "la Internacia Lingvo". Tiu estis fakte (kaj ankoraŭ estas ?) la oficiala nomo de Esperanto, kaj ĝi estis ĝia sola nomo en la plej unuaj lernolibroj. Ke Zamenhof intencis vere internacian lingvon, oni povas konstati per multaj diroj kaj aludoj, interalie per lia fama devizo sur la titolpaĝo de la *Unua Libro* :

"Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia."

En la sama libreto Zamenhof poste formulis fundamentan ideon nome :

"... la verkoj, kiuj havas karakteron internacian, estus eble skribitaj rekte en ĝi."<sup>5</sup>

Pri la konstruado de la lingvo, Zamenhof konfesas, ke li prenis la plej simplan metodon eblan, uzante jam vaste konatan lingvon

"... en la ceteraj okazoj mi prenadis ordinare el la lingvo latina, kiel lingvo duone-internacia."<sup>6</sup>

Tiu internacieco fariĝis esenca trajto de Esperanto. Dum la sekvanta historio multaj homoj atestis, ke Esperanto vere havis tian karakteron interalie Ivo Lapenna, kiu aserte konstatis, ke la internacieco de Esperanto estis en ĝia strukturo mem.<sup>7</sup>

Multaj tezoj estas skribitaj provante pruvi, ke la hebrea estis la unua lingvo en la mondo, kaj la lingvo kiun parolis Adam kun Eva en la paradizo.<sup>8</sup> La fama komentariisto Raŝi (Rabeno Ŝlomo ben Jicĥak) skribis en sia komentario pri Gen 11:1, ke antaŭ la babeltura konfuzo la tuta mondo parolis la "Sanktan Lingvon", t.e. la hebrea. Se sekve la hebrea estis la unua mondlingvo (almenaŭ laŭ multaj tradicioj kaj teorioj) antaŭ la Babelturo, Esperanto celas fariĝi la laste mondlingvo, kiam foje la malbeno de Babel povus esti forigita. Ke tia estas vere la celo de Esperanto indikas interalie la vortoj de Zamenhof en la ekzercaro de la Fundamento :

"En la lingvo "Esperanto" ni vidas la estontan lingvon de la tuta mondo."<sup>9</sup>

Alia simileco inter la du lingvoj estas, ke ambaŭ havas rilatojn kun judismo. La hebrea, ĉar ĝi estas la lingvo de la Sanktaj Skriboj de judismo, Esperanto, ĉar Zamenhof estis judo, kaj ankaŭ pro tio, ke multaj aliaj judoj partoprenis en ĝia disvastigo.<sup>10</sup>

Frape rimarkinda estas ankaŭ la simileco inter (Eliezer) Zamenhof kaj Eliezer ben Jehuda, la pioniro de la moderna parolata hebrea, kaj la kompilinto de la unua moderna plena vortaro de la hebrea. Ili naskiĝis en proksimeco de unu jaro, 1859 respektive

1858. Ambaŭ kreskiĝis en la atmosfero de la *Haskala* (la hebrea lumigo) kaj ambaŭ havis krome fortajn radikojn en la juda tradicio. Ambaŭ devenis el la sama parto de la rusa imperio (Litovio) kaj ili ambaŭ estis malgrasaj modestaj homoj kun pintbarbo kaj okulvitroj. Kaj plej grave, ambaŭ estis gvidataj de simila celado por unu ideo dum la tuta vivo. Interese estas noti, ke unu jaro post la publikigo de la *Unua Libro* de Esperanto, Ben Jehuda fondis organizon nomitan *Safah Berura* (laŭ la vortoj de Cefanja 3:12 - pli pri tio ĉi sube) en Jerusalemo.<sup>11</sup> La celo por tiu organizo estis disvastigi la hebrea kiel konversacian lingvon inter plenkreskuloj kaj en la lernejoj.

Eĉ la plej elementaj eroj de la du lingvoj, nome iliaj literoj kaj alfabetoj, havas interlig-punktojn. La hebrea uzas la t.n. kvadrat-skribon kaj Esperanto la latinan. Historie ili estas ligitaj ĉar ambaŭ evoluis el iu prasemida (proto-kanaana) alfabeto. Tiu alfabeto evoluis en la fenican kaj poste tra la greka al la latina aŭ tra la aramea al la hebrea (ekzistas ankaŭ pra-hebrea alfabeto kiu evoluis rekte el la pra-semida). Zamenhof, estante hebrea, bone konis ambaŭ alfabetojn. Fakte Zamenhof ellaboris sistemon kiel ŝanĝi la hebreajn literojn de la jida al latinaj ekvivalentoj.<sup>12</sup> Tiu proponon li pretigis samtempe aŭ kelkajn jarojn post lia unua elpaŝo kun la prototipa mondlingvo "Lingwe Uniwersala."

En 1910 estis publikita libreton nomita *La Biblia profeto Cefanjaho antaŭanoncinta Esperanton*. La libreto estis anonime eldonita sed laŭ la esploroj de N.C. Maimon ŝajnas, ke estis Naŝum Slouschz (*slouŝĉ*), profesoro pri nov-hebrea literaturo en Sorbonne en 1904-1908, kiu verkis ĝin.<sup>13</sup> La libro prezentas fidelan al la originalo tradukon de la hebrea teksto de la libro de Cefanja. La versiklo, kiu interesas nin, estas Cef 3:9, kie li parolas al iu estonta lingvo :

"Ĉar tiam mi alturnos al la popoloj lingvon purigitan por ke voku ĉiuj per la nomo, Jehovon, por servi Lin unu-ŝultre."

Kvankam la plej ofta opinio estas, ke temas pri la hebrea, la Sankta Lingvo, Slouschz esprimis en sia libreto la penson, ke eble temas pri Esperanto.

Unu el la pruvoj, ke fakte temas pri la hebrea lingvo estas, ke la antaŭa versiklo (Cef 3:8) enhavas ĉiujn literojn de la hebrea alfabeto kune kun iliaj finformoj, t.e. 22 literoj kaj la kvin finformoj.<sup>14</sup> Mi devas ĉi tie rimarkigi, ke kelkfoje gramatikoj nombrigas 23 literojn anstataŭ 22 ĉar unu el ili estas duobla.<sup>15</sup> Kun dekstra superpunkto tiu litero nomiĝas ŜIN kaj kun maldekstra SIN, kaj ili estas du apartaj ne-interŝanĝeblaj konsonantoj. Tiu litero

SIN mankas en la versiklo Cef 3:8, kaj venas nur en la vorto 'lingvo' (SAFA : SIN, PE, HE) de la sekvanta versiklo :

"Ĉar tiam mi alturnos al la popoloj lingvon purigitan ..."

וְהָיָה לְהוֹרָאָה לְכָל הָעַמִּים  
וְהָיָה לְהוֹרָאָה לְכָל הָעַמִּים  
וְהָיָה לְהוֹרָאָה לְכָל הָעַמִּים  
וְהָיָה לְהוֹרָאָה לְכָל הָעַמִּים  
וְהָיָה לְהוֹרָאָה לְכָל הָעַמִּים  
וְהָיָה לְהוֹרָאָה לְכָל הָעַמִּים  
וְהָיָה לְהוֹרָאָה לְכָל הָעַמִּים  
וְהָיָה לְהוֹרָאָה לְכָל הָעַמִּים  
וְהָיָה לְהוֹרָאָה לְכָל הָעַמִּים  
וְהָיָה לְהוֹרָאָה לְכָל הָעַמִּים

16

Ni vidas, ke la hebreaj literoj havas la strukturon 22 + 5 (+ 1).<sup>17</sup> La saman strukturon oni trovas ankaŭ iomete surprize en Esperanto : A, B, C, D, E, F, G, H, I, J, K, L, M, N, O, P, R, S, T, U, V, kaj Z, jen la 22 bazliteroj. Krome oni havas kvin supersignitajn literojn : Ĉ, Ĝ, Ĥ, Ĵ, kaj Ŝ. Fine oni havas ankaŭ alian supersignon por unu sola litero, nome Ŭ. La strukturo estas 22 + 5 + 1. Se oni kalkulas ne nur ĉiujn literojn de la versiklo Cef 3:8, sed ankaŭ aldonas la SIN de la vorton SAFA (lingvo) en la sekvanta versiklo, ni havas kompletan paralelon inter la strukturoj de la hebrea kaj Esperanta alfabetoj.

Ĉu tiu struktura simileco estas hazarda aŭ ne, ni povas nur diveni, ĉar Zamenhof malmulte rakontis pri sia maniero konstrui Esperanton. Verŝajne estas, ke decidante pri la Esperanta alfabeto, li iom komparis kun aliaj alfabetoj. En lia jida latinlitera alfabeto li uzis kombinon de 22 + 4 (+1). Kvar regulaj supersignoj kaj unu turnita supersigno, t.e. la duobla formo de E kaj muta Ĕ (apartaj literoj en la jida)<sup>18</sup> Tio estas simila al lia posta elekto de U kaj diftonga Ŭ. Lian jidan Ĥ, li poste ŝanĝis en Ĵ, kaj li aldonis krome Ĝ. Tiamaniere li ŝanĝis sian jidan alfabeton en la Esperantan.<sup>19</sup> Oni povas ankaŭ kompari kun liaj diversaj pra-esperantaj provoj.

La hebrea estis frue konsiderata kiel sankta lingvo. Ĝia sankteco tiel kreskis, ke fine oni volis uzi ĝin sole por sanktaj aferoj. En la libro *Kuzari* de Judah Halevi estas rakontita, ke Abraham uzis du lingvojn, la hebrean por sanktaj aferoj, kaj la aramean por sekularaj (mondaj) aferoj.<sup>20</sup> Post la detruo de la babela turo, Dio enkondukis ĉiujn aliajn lingvojn, ĉefe por malebligi la homojn uzi la hebrean por kontraŭstari Lin.

Krom la esprimita volo gardi la lingvon, ankaŭ ĝia elekto inter multaj lingvoj indikas ĝian sanktecon. La juda tradicio rakontas, ke la Torao estis samtempe donita en 70 diversaj lingvoj, t.e. ĉiuj lingvoj de la mondo laŭ la Biblia perspektivo.<sup>21</sup> Estas la versikloj :

"Mia Sinjoro elparolas vorton ; kaj grandega estas la nombro de la anoncantoj." (Psa 68:12)

"Ĉu Mia vorto ne estas kiel fajro, diras la Eternulo, kaj kiel martelo, kiu disbatas rokon ?" (Jer 23:29)

kiuj estis interpretitaj tiamaniere (kiam la martelo batas la rokon ekestos 70 fajreroj). Inter ĉiuj tiuj lingvoj la hebrea estis elektita por la Sanktaj Skriboj. En la babiblonas Talmudo, traktato Sanhedrin 21 b, oni rakontas pri la donado de la Torao :

"En la komenco estis la Torao donita al Izraelo en hebreaj literoj kaj en la Sankta Lingvo."

Poste ĝi klarigas, ke la Torao denove estis donata dum la tempo de Ezra, sed tiam en la aramea lingvo kaj en la asira skribo, kaj ke oni fine elektis la Sanktan Lingvon kaj la asiran skribon por la izraelidoj, kaj lasis la aramean lingvon kaj la hebrean skribon por ĉiuj malkleruloj.<sup>22</sup> Estis tiu asira skribo, kiu poste evoluis en la supre menciita hebrea "kvadratskribo".

La termino hebrea lingvo ne estas menciita en la Biblio. Kiam oni priskribas la parolatan lingvon, oni uzas aŭ la terminon SPAT-KANAAN, t.e. kanaana lingvo<sup>23</sup> aŭ nomas ĝin JEHUDIT, t.e. juda lingvo.<sup>24</sup> La hebrea kiel nomo de la lingvo troviĝas unue nur en la *Libro de la jubileo*, kiu devenas de la tria jarcento antaŭ Kristo. Poste oni ofte nomis la aramean dialekton parolatan de la revenintoj el Babilono IVRIT (hebrea). Ĉiukaze la biblia hebrea tiutempe ankoraŭ vivis en Izraelo kaj esploristoj multe spekulativas, je kia grado oni ankaŭ en la post-babilona tempo uzis la hebrean kiel komunan lingvon en la lando Israelo.

Tria aspekto de la sankteco de la hebrea estas, ke kelkaj el la metodoj por kompreni la Torao postulas la hebreajn lingvon kaj skribon. Rabeno Bafya (Baŝaja), verkinto de *Ĥovot Ha-Levavot* (Devoj de la koroj) klarigis, ke la Torao estis skribita senvokale kaj seninterpunkcie, por ke ni povu interpreti ĝin diversmaniere, kaj ĉiuj eblaj interpretoj estas veraj. Ramban (Rabeno Moŝe ben Nafman) skribis, en la enkonduko al sia komentario pri la Torao, ke la Torao estis donita al Moseo en diversaj manieroj, direkte, alude, kalkulante la litervalorojn kaj laŭ la formoj de la literoj (kaj la du lastaj postulas la hebrean alfabeton). Ankaŭ rabeno Eliezer, filo de rabeno Josi Ha-Galili, diris, ke inter la tridek-du diversaj manieroj kompreni la Torao, estas kelkaj, kiuj postulas la hebrean lingvon kaj la hebrean alfabeton. La sankteco de la hebreaj literoj estas ankaŭ la temo de mistikaj tradicioj, ekzemple la libro *Sefer Ha-Jecira* (la Libro de la kreado), kie la literoj de la alfabeto korespondas kun la spiritaĵoj fortoj per kiuj la mondo estis kreita.<sup>25</sup>

Kelkaj ekzemploj por klarigi pri kio temas. La baza hebrea vort-elemento estas radiko kun tri konsonantoj. Tiuj konsonantoj povas esti ordigitaj diversmaniere kaj ankaŭ ŝanĝitaj laŭ specialaj reguloj. Tial oni trovas la interligojn kaj interpretojn de la vortoj. ZAJIN, KAF kaj REŜ povas alternative formi ZEKHER (memori), REKHEZ (koncentriĝo) aŭ KEREZ (laŭtleĝi). ALEF, CADIK kaj MEM formas alternative CAMEA (soifo), MACA (trovi) kaj OMEC (fortiĝi). Tre multiĝas tiaj kaj aliaj rilatoj inter la hebreaj vortoj. Pro tiu eco de la hebrea la saĝuloj de Izraelo kontraŭis tradukojn, kaj oni komparis la tagon, kiam la Biblio estis tradukita en la grekan kun la tago, kiam la ora bovido estis farita.<sup>26</sup>

Ankaŭ Esperanto portas, tiel mi rimarkis, ian similan eblecon de interŝanĝo de literoj, sed en ege milda grado. Atentigis min nur kelkaj unuopaj ekzemploj: SERĈI kaj ŜERCI, SANGO kaj ŜANĜO, JURO kaj JURO, JUSTA kaj ĈUSTA, GOJO kaj ĜOJO, CARO kaj ĈARO kaj kompreneble ankaŭ la evidentaj sufiksoj -IG° kaj -IĜ°. Kelkfoje temas pri ŝanĝo de la ordo, ekz-e EĈ kaj ĈE, ID' kaj DI', MON' kaj NOM', VER' kaj REV', TROV' kaj VORT', KOR' kaj ROK', MIR' kaj RIM'. Mi nur notigas la suprajn ekzemplojn, por montri eblajn signifojn por Esperanto<sup>27</sup> se oni uzus kelkajn akceptitajn manierojn delonge uzatajn por interpreti la hebrean tekston en la Biblio. Fakte multaj vortoj kaj frazoj en la Biblio estas nekompreneblaj, se oni ne uzas kelkajn el la ĉi tie skizitaj metodoj.<sup>28</sup>

Hebrea estas vorto kun la radiko AJIN, BET kaj REŜ (en tiu ordo). Tiu estas radiko kun multaj signifoj. La plej ofta estas tiu, kiun oni uzas por klarigi la terminon ABRAHAM HA-IVRI (Abraham la hebreo) en Gen 14:13, kiel "Abraham kiu transiris la riveron" kaj tiel ĝi estis tradukita en la greka versio Septuaginto, kaj tiel klarigas ankaŭ Raŝi en sia komentario. Tiu sama radiko povas tamen ankaŭ signifi flankon, fruktiĝi kaj feton aŭ unu el la diversaj partoj de la korpo. Ankaŭ kolero, la pasinta tempo kaj la hebrea lingvo<sup>29</sup> estas indikitaj per la sama radiko.

Sammaniere Esperanto devenas el la radiko ESPER' kaj signifas "la homo kiu esperas", ekzakte laŭ la sama konstruo kiel HA-IVRI, kiu signifas "la homo kiu transiris la riveron".<sup>30</sup>

Ĉi tie mi volas menci kroman koincidon inter Esperanto kaj la hebrea, ĉar ĝuste en 1887 (la jaro kiam Esperanto aperis), la fama leteroj de Tell-el-Amarna estis trovitaj de egipta virino ĉirkaŭ 300 km sude de El Qâhira (Kairo). Tie oni trovis 400 tabulojn skribitajn en la asira-babilona lingvo, kaj ili mencias la invadon de Palestino fare de tribo nomita HABIRO aŭ HAPIRU. Esploristoj konfirmas, ke tiu termino havas gravajn similecojn kun tiu de

Genezo HA-IVRI. Konsiderante, ke en la semidaj lingvoj la konsonantoj estas la ĉefaj portantoj de signifo, oni facile konstata la similecon.

Multaj aliaj tradicioj pri la sankteco de la hebrea lingvo troviĝas en la rabena literaturo. Oni klarigas la frazon *Bereŝit bara Elohim et ha-ŝamajim ve-et ha-arec* (en la komenco Dio kreis... Gen 1:1), tiel, ke ET kun la konsonantoj ALEF kaj TAV, al unua kaj la lasta litero de la alfabeto, montras, ke ĉiuj literoj de la alfabeto estis kreitaj en la komenco.<sup>31</sup>

En la babilona Talmudo, traktato Berakhot 55 a, oni rakontas, ke Becelel ricevis la taskon konstrui la tabernaklon (El 31:2-5) ĉar li "... scias kombini la literojn per kiuj estis kreitaj la ĉielo kaj la tero." Notenda estas ankaŭ, ke la Talmudo vortludas pri tio, ke Becelel signifas hebree "en ombro de Dio" (BE-CEL-EL), ĉar estante en la ombro de Dio li lernis scion: "... vi estis en ombro de Dio kaj scias (konstrui la sanktan tabernaklon)."

Zamenhof enmetas la tradukon *La Ombro (mirrakonto de Andersen)* en sia *Dua Libro*. Ĝi estas la unua tradukita rakonto, kiu aperas en Esperanto, kaj ĝi estas pri la ombro de iu sinjoro kiu eniris:

"... en la palaco de l'poezio, en la antaŭĉambro" kaj lia restado tie estis:

"... kiel se oni vivus trimil jarojn kaj legus ĉiujn verkojn poeziajn kaj instruitajn... Mi ĉion vidis, kaj mi ĉion scias."

Malgraŭ la iomete malgaja fino de la rakonto, ĉar la ombro fariĝis homo kaj fine postulis de ĝia antaŭa majstro, ke li estu reciproke ĝia ombro, temas pri la esenco de la poezio:

"Se vi tien eniris, vi ĉesus esti homo, sed mi fariĝis homo, kaj unu tempo mi ekkonis mian internan naturon, la parencecon, kiun mi havas kun la poezio."<sup>32</sup>

Ankaŭ la nomo Itiel en Sen 30:1 estas klarigita kiel "la homo kiu komprenis la literojn de Dio." Hebree la teskto legiĝas "parolado de la viro" sed en la Esperanta traduko, oni jam uzis la klarigon de la komentariisto kaj tradukas kiel "profeta parolo."<sup>33</sup>

Kio estas la kazo de Esperanto? Ĉu ĝi estas nur lingvo, kiel oni kelkfoje aŭdas, aŭ ĉu ĝi ankaŭ havas ian mesaĝon? Ĉi tie temas pri tute moderna lingvo, kiu malhavas multmiljaran historion kaj evoluitan tradicion pri sia propra signifo. Cerbumoj pri plej



profundaj signifoĵoj de Esperanto troviĝas ekster la kompetenteco de la interlingvistoj kaj esperantologoj, kiuj hodiaŭ estas la homoj, kiuj plej multe (kaj science) laboras super la lingvo.

Reirante al la komenco kaj al Zamenhof, kaj serĉante en la unuaj Esperanto-kajeroj, oni tamen certe povas konstati ian mesaĝon. Kiel ni notis supre, Esperanto dekomence havis la nomon Internacia Lingvo, lingvo destinita por uzado inter la nacioj. Temas fakte pri embrio de la mesaĝo, kiu jam dekomence iamaniere difinis la uzadon de Esperanto. Poste estis enkondukita, fare de Zamenhof, la nocio Internacia Ideo.<sup>34</sup> Provante difini tion, kion signifas tiu interna ideo, oni baldaŭ trovas ĝian fortan interligon kun la internacieco de la lingvo. La mesaĝo ŝajnas esti eĉ la antaŭdiranto de la lingvo mem. Zamenhof parolas pri iu "pli granda ideo", kiu okupis lin ekde lia juneco, kaj ke la lingvo mem estis nur parto de ĉi tiu ideo. Zamenhof mencias, ke li sola ne povas esti la kreanto de "vere" internacia lingvo, sed tia povas nur elkreski, iom post iom, per la kunlaborado de ĉiuj homoj.

"Unu homo tie povas esti nur iniciatoro sed ne kreanto.

Lingvo tutmonda devas esti pretigata paŝo post paŝo per la kunigita laborado de la tuta civilizita mondo."<sup>35</sup>

kaj tiun ideon li emis nomi eĉ sankta :

"... la lingvo internacia ne estas jam pli multe en miaj

manoj, ol en la manoj de ĉia alia amiko de la sankta ideo."<sup>36</sup>

Zamenhof kelkfoje aludas al tiu ĉi plej nobla celo, kiun li aspiris por Esperanto, ekz-e en sia artikolo *Nia afero - ĉirkaŭrigardo en La Esperantisto*, 1892, pp. 4-6 :

"Esperanto devas servi nur por komunikiĝoj internaciaj kaj por tiuj produktoj de la homa spirito, kiuj havas egalan signifon por la tuta homaro."

Ankaŭ en sia letero al W. Ostwald, 1907-11-04 (origine skribita germane, li indikas, ke li havas grandajn planojn por Esperanto :

"... dum plimulto da homoj vidas en Esperanto nur lingvon de korespondado, ĝi havas en miaj esperoj multe pli gravan celon, por kiu ĝi devas esti kiel eble plej perfekta (mi ne volas nun paroli pri tio)."<sup>37</sup>

Laŭ Zamenhof oni bezonis antaŭ ĉio iun neŭtralan bazon por internaciaj rilatoj kaj nur poste povus elkreski

"... tiu estonta unuigita kaj pure homa homaro, pri kiu revis la profetoj de ĉiuj gentoj kaj tempoj."<sup>38</sup>

Elkreskis la penso, ke post la familia sento, la socia sento kaj la nacia sento, fine alvenis la tempo por krei la homaran senton. Kiel skribis la esperanta poeto S. Szylágyi :

"... li intencis krei kulturfaktoron por la homa universo."<sup>39</sup>

Dum la tempo de Zamenhof la mondo jam komencis malgrandiĝi kaj multaj internaciaj strebadoj kaj organizoj estiĝis. Oni povas menci la starigon de la Internacia Ruĝa Kruco laŭ iniciativo de la svisa filantropo Henri Dunant (*ĉiri dūnā*) en 1863.

La saman jaron, kiam Esperanto estis publikigita, en 1887, aperis poemvolumo de la franco Eugène Pottier (*ĉŝen' potje*), kiu enhavis la faman poemon *L'Internationale* (la internacio), al kiu komponis poste Pierre Degeyter (*pjer dŝeter*) melodion. Tiu kanto fariĝis baldaŭ la himno de la tutmonda laboristaro.

Tria internacia agado, kiu sukcesis estis la renovigo de la Olimpiaj Ludoj. Laŭ propono de la franca verkisto Pierre de Coubertin (*pjer dŝ kubertē*) en 1894, oni komencis mondscale organizi internaciajn Olimpiajn Ludojn (la unua estis en Ateno en 1896).

Esperanto estis nur unu celado inter multaj aliaj, kaj la rolo de Esperanto en la elkreskanta internaciismo longe restis malklara. Interne de la esperantismo regis la konvinko, ke sen Esperanto tiuj celadoj neniam fariĝos vere internaciaj, kiel skribis ekzemple Charles Minor :

"Ekzistas kelkaj vere gravaj mondscaleaj ideoj celadoj, kiuj tamen estas kriplaj kaj pli-malpli utopiaj sen internacia komprenigilo. ... Ili do devus esti novigataj kaj remetataj sur internacilingvan bazon."<sup>40</sup>

Ivo Lapenna ankaŭ klarigas, ke la du aferoj estas firme interligitaj :

"Kun la nepre venkado de universalismo venkas ankaŭ Esperanto. Kun venkado de Esperanto la vera, sincera universalismo akiras novajn poziciojn? Pri tio ni ĉiuj estu profunde konsciaj !"<sup>41</sup>

Ofte oni prenis motivojn kaj komparojn el la Biblio por trafe priskribi la gravecon de la afero. Tion faris la franca nobel-premiito pri literaturo Romain Rolland (*romā rolā*) kiu skribis :

"Kiel diras la maljuna Evangelisto, Johano "la Parolo estas ĉe la komenco, kaj la Parolo estas Dio" ... Nu, tiu Parolo portanta la flagon de la nova kredo, tiu Parolo portanta la glavon de la unuiginta popolo el homoj, ĝi jam ekzistas ; ĝi estas kreita de la genio de homo, kiu ardis pro amo al la homaro kaj apostola pasio rekolekti la dispelitan samkredantaron - la eterne fama Zamenhof. Kio faras la grandecon de la kreinto de Esperanto, tio estas, ke, kiel ĉiu vera genulo, Zamenhof ne estis la inventinto de lingvo kaj movado nenaturaj, sed la klarvida pioniro kaj la perfekta interpretisto de potenca bezono nova, de malklaraj kaj nekontraŭstareblaj aspiroj, kiuj prilaboris la siatempan homaron - tiu krizalido, kiu povas disrompi siajn ligilojn."<sup>42</sup>

Alia grava afero en la internaciigo de Esperanto estis la internacieco de ĝia socia portanto. Multaj homoj el plej diversaj landoj kontribuis por la evoluado de Esperanto, kiel antaŭvidis Zamenhof. Tio multe influis la evoluadon de origina esperanta poezio kaj Zamenhof mem estis la unua poeto.<sup>43</sup> K. Kalocsay (*kaloĉaj*) trafis priskribis tion en *Lingvo, Stilo, Formo* :

"Kaj vere, oni povas diri, ke ne per Esperanto li faris poezion, sed per la poezio li faris Esperanton."<sup>44</sup>

Por denove pritrakti la dekomence starigitan demandon pri la rilato inter lingvo kaj ĝia mesaĝo, kaj kio dependas de kio, oni iel divenas, ke ili fakte estas interrilataj, ĉar unu ne povas ekzisti sen la alia. Ĉu entute indas cerbumi pri "kio venas unue, la ovo aŭ la kokino?" Diversaj rimarkoj disŝutitaj en la diversaj tekstoj tamen indikas, ke la problemo ĉeestas kaj ke specifa rilato estas tuŝita. En la hebrea tradiciaj fontoj oni trovas la rimarkon, ke kiam en la *Pirkej Avot* (Diraĵoj de la patroj) 5:1 estas skribita :

"Per dek diraĵoj (MA'AMAROT) la mondo estis kreita" temas pri intencoj kaj ne fizika parolo ĉar oni uzas la vorton diraĵo (MA'AMAR) kaj ne vorto (DAVAR).<sup>45</sup>

Ankaŭ el tradicio pri la unua litero de la hebrea alfabeto, oni povas solvi la starigitan demandon. La unua litero estas ALEF, kaj tio estas skribita per la literoj ALEF, LAMED kaj PE. ALEF LAMED PE estas hebree "majstro instruas buŝon". Prenataj en la mala ordo ili indikas PE LAMED ALEF, "buŝo instruas majstron". Tiu vorto PELE povas esti tradukita kiel mirindaĵo. temas pri neraciaj faktoj kaj okazintaĵoj, kiuj mirigas la menson.<sup>46</sup>

Mi esperas, ke la diversaj komparoj inter la hebrea kiel la sankta lingvo, kaj Esperanto kiel la internacia, ĵetas iom da lumo sur la demando pri la rilato inter lingvoj kaj iliaj mesaĝoj. Eble oni povas trovi trafan analogion el la muziko. Multaj melodioj estas ludeblaj sur ĉiuj instrumentoj, kvankam kelkaj instrumentoj ne taŭgas por tro komplikaj harmonioj. Ofte melodioj tamen estas skribitaj speciale por apartaj instrumentoj kaj la sonkoloroj de tiuj instrumentoj fariĝas esencaj partoj de la fina muzikaĵo.

Jeremi Gishron, Israelo

## NOTOJ

1. Temas pri du vortoj en la Torao (Gen 31:47), unu versiklo en Jeremia (10:11) kaj parto de Daniel (2:4-7:28) kaj Ezra (4:6-6:8 ; 7:12-26).
2. Ĉi tie lingvo estas uzata preskaŭ sinonime kun popolo. Ankaŭ Zamenhof opiniis, ke la vortoj estas ege sinonimaj :  
"Ĉar lingvo estas ĵuste tiu ligo, kiu faras tiun aŭ alian grupon de homoj popolo. ... Kiongrade ne estas penseble apartigi unu de alia nociojn 'lingvo' kaj 'popolo', estas videble el tio, ke en iuj lingvoj ambaŭ tiuj ĉi nocioj rekte esprimiĝas per unu sama vorto." Zamenhof (L. L.), *Hilelismo - projekto pri solvo de la hebrea demando* (1901), en ZAMENHOF (L. L.), *Hebrea el la geto*. - Kloto : Ludovikito, 1976. -(kajero 5), p. 367.
3. *Vajikra Ĥaba* 32:5.
4. *Sifre Dvarim* 46.
5. ZAMENHOF (L. L.), *Unuaj libroj por esperantistoj*. - Kameoka : Ludovikito, 1973. -(kajero 1). - p. 9.
6. Zamenhof 1973, p. 21.
7. LAPENNA (Ivo). - *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj*. - Rotterdam, 1966. - p. 45.
8. Nur unu ekzemplo kiel tezo prezentita en Harvard 1642 : *Hebrea est Linguarum Mater*. Vidu CHOMSKY (William). - *Hebrew : the eternal language*. - Philadelphia, 1982. - p. 19. Tiu kaj aliaj tezoj devenas de antikvaj tradicioj. Vidu HALEVI (Judah). - *The Kusari (Kitab al Khazari)*. - New York, 1964. - p. 90 (I 49) kaj p. 124 (II 68).
9. ZAMENHOF (L. L.). - *Fundamento de Esperanto* / Red. A. Albault. - Marmande : E.F.E., 1963. - p. 106.
10. Zamenhof komparis la Universalajn Kongresojn kun la kunvenado de la hebreaĵoj en Jerusalema dum la kongreso en Cambridge (Kambrigo) :  
"Kiel la antikvaj hebreaĵoj tri fojojn ĉiujare kunvenadis en Jerusalema, por vigligadi en si amon al la ideo monoteisma, tiel ni ĉiujare kunvenadas en la ĉefurbo de Esperantujo, por vigligi en ni la amon al la ideo esperantisma." ZAMENHOF (L. L.). - *Originala verkaro* / Red. J. Dietterle. - Leipzig, 1929. - p. 377.
11. Chomsky, pp. 234-235.
12. ZAMENHOF (L. L.). - *Provo de gramatiko de novjuda lingvo kaj Alvoko al la juda intelektularo* / Red. A. Holzhaus. - Helsinki, 1982. - pp. 10, 38.
13. MAIMON (N. C.). - *Haĥum Slouš - la forgesita pioniro*, en *Esperanto*, 7-8 (859-860), 70, 1977. - p. 131.
14. En la Talmudo oni legas, ke la finaj literoj estis enkondukitaj per la profetoj (T. B. Šabat 104 a). La *Zohar* (*Zohar Ĥadaš - Midraš Ha-Ne'lam* al libro de Rut) diras, ke ili estis origine garditaj de Dio kune kun la "protolumo" por la plej bona futuro. Nur Adam konis ilin kaj ankaŭ al Abraham ili estis revelaciitaj. Li instruis ilin al sia filo Jicĥak (Isaak), kaj tiu sekve al sia filo Jakov (Jakob), kaj Jakov al Josef, sed post la sklaveco en Egiptujo, ili estis forgesitaj. Denove ili estis revelaciitaj kiam la Torao estis donita nur por denove malaperi pro la peko de la ora

bovido. Ili estis perditaj por la popolo kvankam Moseo gardis la scion kaj fine en la Alta Kanto de Salomono ili fine estis kunigitaj kun la ceteraj 22 literoj de la alfabeto.

15. Vidu EGNELL (Ivan). - *Grammatik i Gammltestamentlig Hebreiska.*

- Stockholm : Svenska Bokförlaget-Norstedts, 1960. - p. 15 :

"La hebrea alfabeto ampleksas la sekvaĵn 23 konsonantsignojn."

16. Ĉiuj literoj troviĝas en ĉi tiuj versikloj, inkluzive de la 5 finformoj. La SIN troviĝas en la dua.

17. Kutime oni kalkulas nur 22 literojn en la hebrea alfabeto. Sed eĉ sen inkluzivi SIN kiel la 21-a (aŭ 26-a) oni havas kroman eblecon atingi la nombron 23. Apud SIN kun tri kapoj ekzistas ankaŭ ĜIN kun kvar kapoj. Ĝi troviĝis sur la leĝtabuloj de Moseo, ĉar gravurante la leteron SIN en la ŝtono oni povas palpe senti la negativan impreson kiel kvarkapan SIN. Tiu kvarkapa SIN simbolas la kaŝitan aspekton de la Eternulo aŭ Lian "spiritan manuskribon."

Kiam la ŝtontabuloj estis rompitaĵoj pro la peko de la ora bovido, la literoj supreniris al la ĉielo (T. B. Pesaĥim 87 b) kaj la kvarkapa (metafizika) SIN malaperis de nia skribo. Ĝi estas tamen konservita sur la dekstra flanko de la preĝilo de la kapo (hebree TEFILIN, laŭ PIV eble filakterio) memorigante pri la du aspektoj de la dieca saĝo, la kaŝa kaj la malkaŝa (trikapa SIN sur la maldekstra flanko de tiu sama preĝilo). MUNK (Michael L. Rabbi). - *The Wisdom in the Hebrew alphabet.* - Brooklyn, 1983. - pp. 209-210.

18. Zamenhof 1982, pp. 10 kaj 38.

19. Verkante ĉi tiun artikolon mi kurioze observis, ke Zamenhof interŝanĝis la supersignitan Z (kiu senĉapele estas la komenclitero de lia nomo) de sia jida alfabeto per la supersignitaĵ J kaj Ĝ (kiuj senĉapelaj estas la komencliteroj de mia nomo) kiam li transiris al la Esperanta alfabeto.

20. Halevi, p. 124 (Kuzari II:68).

21. T. B. Sabato 88 b.

22. Ekzistas du diversaj hebreaj alfabetoj kaj ĉar la terminologio estas iom konfuza ni devas klarigi. La unua hebrea alfabeto estas la "origine" hebrea. Por ne konfuzi kun la pli moderna alfabeto oni kelkfoje nomas tiun lastan "asira" aŭ "juda" alfabeto. La plej ofta uzo estas tamen la termino "hebrea" aŭ "kvadratskribo" por la malpli antikva kaj hodiaŭ uzata alfabeto kaj pra-hebrea (aŭ proto-hebrea) por ĝia antaŭirinto. Mi povas rimarkigi, ke la Talmudo klarigas la vorton "asira" t.e. hebree AŠURIT kiel MEUSERET BEKTAV, t.e. la "feliĉa" aŭ "nobla" skribo.

23. Jesaja 19:18.

24. 2 Reĝoj 18:26 ; Jesaja 36:11,13 kaj Nefemias 13:24.

25. SCHOLEM (Gerahom G.). - *Major trends in Jewish mysticism.* - New York, 1973. - p. 75 k.s.

26. Chomsky, p. 12.

27. Laste mi notis anoncon pri libro, kiu uzas la interpretan sistemon nomitan Gematria (oni kalkulas la numerajn valorojn de la literoj) per la angla : PETERSON (Peter K.). - *English is gematria.* - Jerusalem : Apocalypsee Press, 1988. Libro optimiste reklamita kiel "... la plej polemikiga novepoka eltrovo post E = mc<sup>2</sup>."

28. Mi ne povas menci ĉiujn metodojn ĉar tio estas tro longa. Tamen pri tre ellaboritaj sistemoj de interpretado, kiuj ankaŭ havas radikojn en la evoluo de la hebrea lingvo. Moderna klerulo, kiu majstris tiujn metodojn, estis Rabeno Samson Raphael Hirsch, kiu lerte elsciis ĉiun signifon de ĉiu vorto.

29. Alia tradicio estas, ke hebrea devenas el la prapatro de Abraham, Eber. Vidu Halevi, p. 50 (Kuzari I:49). Komparu ankaŭ Gen 10:21 :

"Naskiĝis infanoj ankaŭ al Ĥes, la patro de ĉiuj Eberidoj, pli maljuna frato de Jafet."

30. Ankaŭ Zamenhof rakontas, ke li "transiris riveron" sed li pruntas sian simbolon el la roma historio :

"... sed mi ne povis forlasi la ideon, kiu eniris mian korpon kaj sangon kaj ... mi transiris Rubikonon." (Letero al S-ro Borovko en *Lingvo Internacia*, 6-7, 1, 1896, p. 119.

31. Munk, pp. 34-35.

32. Zamenhof 1973, pp. 74-75.

33. Midraŝ Miŝleaj 30:1.

34. Vidu la ĉapitron "La difino de la 'interna ideo'" en GISHRON (Jeremi). *Lingvo kaj religio.* - Jerusalem, 1986. - pp. 73-75.

35. Zamenhof 1973, p. 93.

36. samloke, p. 103.

37. ZAMENHOF (L. L.). - *Zamenhof Leteroj* / Red. A. Holzhaus. - Helsinki, 1975. - p. 155.

38. ZAMENHOF (L. L.). - *Gentoj kaj Lingvo Internacia* (1911) en Zamenhof 1929, p. 353.

39. *Ora libro de la Esperanto-movado 1887-1937.* -Budapest, 1937. - p. 156.

40. samloke, pp. 212-213.

41. Lapenna, p. 15.

42. DRATWER (Isaj). - *Pri internacia lingvo dum jarcentoj.* - Tel Aviv, 1977. - p. 48.

43. En ĉi tiu mallonga artikolo mi ne povas priskribi la "internacian literaturon", kiu iom post iom elkreskis, sed menciinda estas ekz-e la poemon "Respondo al cent demandoj" de Julio Baghy, konsiderata kiel unu el la plej "Esperantaj" poetoj kaj ĉefe allogita al Esperanto pro ties "interna ideo". La poemo estis publikigita en *Sennaciaca Revuo*, 84 (nova serio), 1956. Mi citas la 8-an strofon :

"Ho venu do mondon  
ci, revoluci' de l'homa anim',  
dus kiu la Plum' kun plugilo, Martelo  
kuniĝas en ĝoj' sub komuna reĝin'  
por jugojn de l'homa spirito forskui,  
ke fine por ĉiu la viv', komenciĝu  
kaj ĝin solidara homeco prestiĝu  
plendigne, libere, inde al nom'  
ke fine aperu la vera - homhom' !"



44. KALOCSAY (K.). - *Lingvo, stilo, formo*. - Osaka : Pirato, 1970, p. 51.
45. Kiel komparo oni povas preni ankaŭ ekzemplon el la Nova Testamento. En Joh 1:1 estas skribita :  
 "En la komenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis kun Dio, kaj la Vorto estis Dio. Tiu estis en la komenco kun Dio. ... Ĉio estiĝis per li ... En li estis la vivo."  
 La Vorto (LOGOS) estis en la komenco kaj kun Dio kaj estis Dio, la du kontraŭaj aspektoj, kiujn ni analizas ĉeestas paralele. Tio estas pli klarigita en la sekvo. La vortoj "per li" signifas "instrumenton" kaj "en li" similas al "interna ideo".
46. GLAZERSON (M.). - *Sparks of the Holy Tongue - the secret behind words and letters in the hebrew language*. - Johannesburg, 1975. - p. 4.

## BIBLIOGRAFO

- CHOMSKY (William). - *Hebrew : The eternal language*. - Philadelphia : The Jewish Publication Society of America, 1982.
- DRATWER (Isaj). - *Pri internacia lingvo dum jarcentoj*. - Tel Aviv, 1977.
- EGHELL (Ivan). - *Grammatik i gammaltestamentlig hebreiska*. - Stockholm : Svenska Bokförlaget-Norstedts, 1960.
- GISHRON (Jeremi). - *Lingvo kaj religio : studo pri la frua esperantismo kun speciala atento al L. L. Zamenhof*. - Jerusalem : Eld. Sivrion, 1986.
- GLAZERSON (M.). - *Sparks of the Holy Tongue : The secret behind words and letters in the Hebrew Language*. - Johannesburg : Pacific Press, 1975.
- HALEVI (Judah). - *The Kuzari*. - New-York, 1964.
- JOHN (Robert St.). - *The Tongue of the prophets : The life story of Eliezer Ben Jehuda*. - Hollywood : Wilshire Book Company, 1972.
- KALOCSAY (K.). - *Lingvo Stilo Formo*. - Osaka : Pirato, 1970.
- LAPENNA (Ivo). - *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj*. - Rotterdam, 1966.
- MEYBOOM (J. C. C.). - *Flowers from the Garden of Eden : a popular introduction to the hidden wonders in the Hebrew Bible and the Hebrew Language*. - Bussum : The Academy for the Hebrew Bible and the Hebrew Language, 1983.
- MUNK (Michael L. Rabbi). - *The Wisdom in the Hebrew Alphabet : the Sacred Letters as a guide to Jewish deed and thought*. - New York : Messorah Publ. Ltd, 1983. -(The ArtScroll Series).
- Ora Libro de la Esperanto-movado 1887-1887*. - Budapest, 1937.
- RABIN (Chaim). - *Anaĥnu Ve-Halaĥon*. - Jerusalem, 1977.
- " " *Mi Hajta Taĥajat Halaĥon*. - Jerusalem, 1980.
- SCHOLEM (Gerahon G.). - *Major Trends in Jewish Mysticism*. - New York : Schocken Books, 1973.
- ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro).
- 1) - *Fundamento de Esperanto* / Red. A. Albault. - Normande : E. F. E., 1963.
- 2) - *Hebreo el la geto*. - Kioto : Ludovikito, 1976. -(kajero 5).
- 3) - *Originala verkaro* / Red. J. Dietherle. - Leipzig : Hirt & Sohn, 1929.

- 4) *Provo de gramatiko de novjuda lingvo kaj Alvoko al la juda intelektularo* / Red. A. Holzhaus. - Helsinki / Fondumo Esperanto, 1982.
- 5) - *Unuaj libroj por esperantistoj*. - Kameoka : Ludovikito, 1973. -(k. 1).
- 6) - *Zamenhof leteroj* / Red A. Holzhaus. - Helsinki : F. Esperanto, 1975.

Jeremi GISHRON (giĥron) (1948) israelano, naskiĝinta en Svedujo, migrinta al Israelo en 1972. Studis ekonomion, geografion kaj religion. Doktorigis pri *Religiaj trajtoj en Esperanto*. Aktivas en Eldonejo Sivrion.

Lingvo kaj religio; Studo pri la frua esperantismo kun speciala atento al L.L. Zamenhof, Jeremi Gishron (1948).  
 Jerusalem: Sivrion, 1986. 212p. 14cm. Prezo: 36,00 gld.

Mi elkore admiris vian klaron elmontron pri la pontoreligio, kiu precize klarigas la "spiriton" de nia lingvo. Vi ja lerte plugis la ĝis nun ne multe esploritan kompon kaj bonege preparis la sulkojn, sur kiuj, per la streboj de postaj studentoj, sendube iam abunde aperos riĉaj rikoltoj. Ĝi estas vere ne malhavebla libro por plene studi kaj la lingvon kaj la ideon kaj la personon de nia Ludoviko. ... Ĉar mi konsas preskaŭ ĉiujn faktojn en via priskribo, krom tiujn pri la judej fonoj, sed se mi kuraĝas eldiri, via studo ja enhavas "ion" novan, kiu min profunde ĉarmis, kaj kiu certe helpas la esplorojn pri Ludoviko kaj Esperanto.

Itô "Ludovikito" Kanzi  
 1986-10-19



## ESPERANTISTA LIGO en la Ekumeno



### KELI ★ DIA REGNO

Kristana Esperantista Ligo Internacia  
Fondita en 1911

Neneŭtrala ligo, kunlaboranta kun U.E.A.  
*Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prez.: A. Burkhardt, Ev. Pfarramt, D-7311 Bissingen/Teck, Fed. Resp. Germanujo.

Sekr.: E. van Dijk-Kuperus, Koningsmantel 4, 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando. Tel. 01720-20222.

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto minimume 25 ned.gld. Membro-subtenanto 37,50 ned.gld. Membro de IKUE 12,50 ned.gld.

Monsendoj al poŝta ĝirkonto n-ro 5506132 de Kristana Esperantista Ligo Internacia KELI, van Hogendorplaan 4, 3135 CF Vlaardingen (Nederlando).

Dia Regno  
Oficiala organo de KELI  
Fond. 1908

Redaktoro: J. van Keulen, v. Beethovensingel 91A, 3131 ED Vlaardingen, Nederlando. Tel. 010-4351198.

Abonprezo, sen membreco en KELI: 21 ned.gld. aŭ egalvaloro. Abonoj kaj anonekosto pagotaj al la kazo de KELI, vidu supre.

Ekspedo de Dia Regno, membrolisto de KELI: L. Hordijk, van Hogendorplaan 4, 3135 CD Vlaardingen, Nederlando.

### Esperanto-Misio

Box 7, Oostonsjö · 694 02 HALLSBERG 2 · Svedujo

## KRISTANOJ ANTAŬ LINGVA DIVERSECO

Oni multe studis esperantismen dum tiuj ĉi lastaj jaroj. Tiu ĉi artikolo estas sekvo de esploro, kiu jam datumas de ok jaroj. El ĝi aperis resumo en *Dia Regno*, 1981, 4. Tiu esploro devenas de la konstato de manko pri "esperantista teologio". Mi deziris iomete malfermi kelkajn pordojn por estontaj esploroj. Mi unue studas du bibliajn tekstojn, kiuj rilatas al la diverseco de lingvoj.

### La Babel-turo

E-TEMEN-AN-KI estas la nomo de la fama zikurato<sup>1</sup> de Babilono. Certe estas ligilo inter tiu ĉi kaj la Babel-turo. Kelkaj komentistoj, kiuj pensas, ke la teksto estis verkita dum la reĝeco de Salomono, pensas, ke ĝi celas la troajn konstruaĵojn de la reĝo.

Jam sumera mito karakterizis la Oran Epokon de la homaro per la uzo de unu sola lingvo.<sup>2</sup> Kvankam Calvin diras, ke la ĝisĉiela supro estas hiperbola dirmaniero<sup>3</sup>, li kredas ke la tero estis unulingva:

"Ĉar la lingvo estas la bildo kaj la viva prezento de la spirito, kiel eblas, ke la homoj, partprenantaj en la sama racio kaj naskitaj por vivi kune en socio, ne uzas inter si unu solan lingvon."<sup>4</sup>

Generale, oni opinias la punon grava, eĉ Luther priskribas ĝin kiel terura. La efikojn de ĉi tiu "puno" ankoraŭ daŭras, kaj videblas ankaŭ ene de la Eklezio. Sed pluraj vidas ankaŭ la bonan flankon de la afero, la pliriĉigon de la homa kulturo per la diferencoj. Ĉu ŝanco aŭ malbeno?

"Tio, kion montras la rakonto, estas peco de origina homa realaĵo: kiel la homoj, en sia lukto por la gloro, la unueco kaj la disvolviĝo de sia potenco, stariĝis kontraŭ Dio; sed ili rikoltis punon: ili, estinte tiel zorgoplenaj pri unueco kaj koncentriĝo, nun vivas disaj en konfuzo, ne kapablaj sin kompreni reciproke."<sup>5</sup>

La homoj ne plu komprenas sin reciproke, ĉar ili perdas siajn komunajn referencojn, kiam la intereso de iu estas lia propra egoisma feliĉo.

Se la diverseco de lingvoj estas puno de Dio kontraŭ la homoj, pro kio ĝi estis donita? Ĉu tutsimple pro milita stato de la homoj kontraŭ Dio? Fakte, multaj komentistoj kuniĝas, dirante, ke la ĉefa riproĉo de Dio al la homaro estas la orgojlo antaŭ Dio, la strebo al aŭtonomeco.

"Laŭmezure, kiel la homo malproksimiĝas al Dio, kredante povi forhavi Lin, lia orgojlo pligrandiĝas: ĉiam allogata

de la Serpento, li imagas al si esti pli granda, pli vira, pli bona, kaj li ne vidas, kiel lia orgojlo lin igas eta kaj malgrandanima. Nur en la humila kunvivado kun Dio, la homo vere iĝas homo."<sup>6</sup>

"La imperio permesas la grandecon, kaj ŝajnigas kaptebla la absoluton, la tutecon. Teoria kaj praktika sistemo ellaboriĝas, lingvo, turo kiu entutigos ĉion : finfarita, ĝi proklamas la aŭtonomecon de la homaro, kaj determinos tute la individuojn."<sup>7</sup>

"Ĉiu homa generacio, ĉiu kolektivo konas sian Babel-turon, ĉar ĉiu 'totalisma' celado, t.e. homa projekto celante entutigi la tuton de la realaĵo, estas iel Babel-turo. Sufiĉas rigardi nian jarcenton por ekvidi, ke ne malmultenombros la Babel-turojn. Kelkaj el ili jam estas ruinoj, aliaj estas plene progresantaj."<sup>8</sup>

Nur la humila vojo kun Dio permesas veran komunikadon inter homoj, kiam la egoismo kaj grand-homaranismo sen Dio kondukas al konfuzo. Ĉiu "perfekta socio" estas nova Babel-turo.

La laste citita komentisto oponas la v. 4 "ni akiru al ni nomon" (franca traduko) al 12:2 "Mi grandigos vian nomon."<sup>9</sup> Kiel rimarkis la juda komentisto Emmanuel, la universaleco estas Abraham, ne Babel.<sup>10</sup> La alvoko de Abraham estas la ŝlosilo de Babel. La promeso al Abraham pri multenombra popolo, kaj pri beno por ĉiuj familioj de la tero, havas respondon en la Apokalipsa bildo de homoj el ĉiuj triboj, lingvoj, popoloj kaj nacioj. Eĉ Calvin parolas pri la mirinda boneco de Dio, kiu tamen permesas al homoj komuniki super la lingvo-bariloj, kiu donis la Evangelion en diversaj lingvoj, kaj donis al la apostoloj paroli diversajn lingvojn.<sup>11</sup>

#### Pentekosto

Dio rompis tiun konfuzon, metinte ĉiujn antaŭ Sia Filo, kaj donacinte la komunikadon en Pentekosto.

Kion parolis la apostoloj ? Oni konjektas, ĉu vere malsamajn lingvojn, ĉu proksimajn dialektojn, ĉu variajn akcentojn, ĉu fremdajn esprimojn, ĉu supernaturan lingvaĵon mirakle komprenatan de ĉiuj ? Ĉi maniere, en tiu okazo, la Sankta Spirito sukcesis komuniki.

"La Sankta Spirito kunigas en vivantan komunumon la homojn disigitajn de ilia raso, ilia nacieco, ilia kulturo, ilia lingvo. Ĉie ĉiu homo povas kompreni la Bonan Novaĵon pri la savo, kiu estas en Jesuo Kristo."<sup>12</sup>

Alia komentisto aldonas :

"Ĉiujn liajn infanojn, ĉiujn homojn, lia koro volas. Neniu lingvo, neniu limo, neniu koloro aŭ kulturo diferencigas

ilin. Ĝis la fino de la historio kaj ĝis la ekstremaĵo de la mondo, Li ilin serĉas, vokas, kaj oferas al ili Sian vivon."<sup>13</sup>

#### Lingvo kaj kulturo

Estas en la mondo 5 000 aŭ 5 500 lingvoj, sed inter ĉi tiuj lingvoj, dekopo kunigas pli ol 60 % el la tutmonda loĝantaro kiel gepatra lingvo, kaj multe pli kiel kultura lingvo.<sup>14</sup>

La lingvo estas speguliĝo de la kulturo, de la civilizacio, kiujn ĝi peras.

"Unu el la fundamentaj eroj de iu kulturo estas la vidado de la mondo, kiun ĝi implicas, nome ĝia kompreno pri la naturo de la universo, kaj pri la loko de la individuo en ĉi tiu universo." "Ĉiu kulturo estas mallarĝe ligita al la lingvo."<sup>15</sup>

Ofte estas dirate, ke la lingvo estas prismo por vidi la mondon, sed fakte, estas ĉar ĝi peras kulturon, kaj ties mond-vidadon.

La influo de lingvo estas tia, ke kiam lingvo fariĝas oficiala aŭ komerca, la kulturo ŝanĝiĝas. Sed ankaŭ kiam lingvo alprenas skribadon, aŭ kiam ĝi estas trudata, la kulturo ŝanĝiĝas. Tion pripensu ankaŭ la Biblio-tradukantoj, krom la fakto, ke la alveno de nova religio, de nova religia pens-maniero, ankaŭ certe ŝanĝos la kulturon. Por esti komprenata, Biblio-traduko ne devas esti tro fremda al la kunteksta kulturo, ne sufiĉas ke ĝi estu lingve korekta. En niaj "kristanaj" landoj, oni tiel ofte uzas en predikado, eĉ en evangelizo, la t.n. dialekton de Kanaan. Pro tio estas gravaj la tradukoj en la modernan lingvon. Fakte, kiam oni tradukis la Bibliion en lingvon, oni ofte formis la lingvon. La KIKONGO estis forĝita de la sveda misiisto Laman. Ĝi korespondis al neniua dialekto. Ĝi estas relative arbitra mezaĵo de tio, kion parolas la BAKONGO inter la Stanley Pool kaj la Atlantika Oceano.<sup>16</sup> Same faris ankaŭ Luther.

"Sed, rimarkeblas, ke estas el mia tradukarto, kaj el mia germana lingvo, ke ili lernas paroli kaj skribi la germanan."

"Ili ŝtelas do mian lingvon, pri kiu ili sciis nur malmulton antaŭe."<sup>17</sup>

Claude Piron aludis al la psikologia sento de identeco, kiu estas ligita kun kulturo kaj lingvo.<sup>18</sup> Tial, la kristanoj tradukas la Bibliion, kiel klarigas la tradukisto Bearth :

"La gepatra lingvo, kiu estas la kerno mem de kulturo, kies valorojn kaj konceptojn ĝi perfekte esprimas, estas ankaŭ la privilegia instrumento por komuniki, ene de ĉi tiu kulturo, la Dian veron."<sup>19</sup>



## Internacie

La fina rezolucio de la Internacia Kolokvo pri Dulingvismo en Aosta, diris i.a. :

"Ĉiu persono havas la rajton je edukado dulingva, nome :  
- rajto je ĝisfunda kono de la gepatra lingvo,  
- rajto je utila kono de lingvo de tutmonda komunikado,  
kiu, trans la nacia kulturo, kiun ĝi peras kaj devas ricevi,  
permesas al li plene kaj rekte partopreni en la tutmonda  
kulturo kaj en la universala interparolado."<sup>20</sup>

Sed, se tiu lingvo estas nacia lingvo, kaj la supra teksto supozigas tion, certe estos avantaĝo por tiuj, kies gepatra lingvo ĝi estas. Ne nur en la fakoj diplomacia, komerca, scienca, teknika, naciaj lingvoj fariĝis mondlingvoj, sed ankaŭ en la kristana mondo, kie ĉefe la angla, kaj je reduktita grado la germana kaj la franca, kun eble unu du aliaj, fariĝis la komunikaj kaj teologiaj lingvoj.

## Interna ideo

Ĉu tiun ĉi internacian rolon ne povus ludi Esperanto ?

Kio estas Esperanto ? Ĝi estas lingvo, tion ni scias. Ĝian historion ni iomete konas. Sed mia demando ne estas tia. Ĉu Esperanto estas "nukso sen kerno, nur propagando",<sup>21</sup> ĉu ĝi enhavas "kvazaŭ-religian koncepton de utopia estonteco", ĉu ĝi estas nur teknika rimedo de internacia komunikado ? Oni nun ĝenerale konsentas pri la kulturo portata de Esperanto, kaj pri ĝia karaktero, ni diru, de frateco homa, aferoj, kiujn oni resumas per la esprimo "interna ideo."

## Kristanoj inter esperantistoj

Ni kristanaj esperantistoj devus atenteme rigardi "nian" kulturon, ene de kiu ni proklamas kaj vivas nian fidon, ke ĝi ne trudiĝu al ni. En ĉi tiu kulturo estas certe grandaj idealoj, grandaj esperoj, sed oni ankaŭ povas imagi novan Babel-turon, t.e. nova sistemo por rekonstrui la mondon, por aŭtonomeco de la homo. La greka filozofo Platôn skribis : "La dioj favorus la homaron, se ili donacus al ĝi komunan lingvon."<sup>22</sup> Ĉu vere estus favoro, ĉu pli ekzakte estus venenita donaco, danĝero ? Ni memoru la komentojn rilate al Babel kaj al la pretendemo de la homa raso. Aliloke : "La 'artefarita' en nia praktiko diference de la 'natura' signifas pli altan atingon de la scienca, teknika kaj socia evoluo."<sup>23</sup> Ĉu ĉi tiu evoluo ne estas konstruado de Babel-turo ? A. Burkhardt diris :

"Esperanto sen Kristo povas esti homa provo, per propra forto eliĝi el Dia verdikto, feliĉigi la mondon propriniciate."<sup>24</sup>

Ĉu ne estas danĝere, ke, kiel esperantistaj kristanoj, ni alprenu la "internan ideon", nome paco kaj justeco pere de Esperanto ? Ŝajne multaj tion faris. La *Pontoto* citas diskuton ene de la nederlanda sekcio de K.E.L.I. :

"Krome, la ideoj de Esperanto (mi substrekas) pri la interkompreno, la pacigo, kaj la formado de granda rondo familia estas ankaŭ la ĉefaj ideoj de la tri tutmondaj religioj."

"La eklezioj restas for malantaŭ en la internaciisma movado de la lastaj jardekoj."<sup>25</sup>

Ĉi tiu problemo ne estos facile solvata, ĉar temas fakte pri teologia problemo. Cetere, la Internacia Lingvo estas tiel bona rimedo, en kulturo kies valoroj multege similas la kristanajn, ke ni ne povas malhavi ĝin, ke ni ne povas ne uzi ĝin, ke ni ne povas ne reklami ĝin. Sed abrupte avertas G. B. Dorrow :

"Se kono kaj uzado de Esperanto mem fariĝas la celo, estas pli bone se ni bruligas ĉiujn niajn Esperantajn librojn."<sup>26</sup>

Ni devas zorge atenti, ke ni ne konstruas novan Babel-turon, en formo de Dia Regno surtera, eĉ utopia aŭ estonta. Ni iom pripensu ĉu ni restas en "la mano de Dio", kondukataj de Li, aŭ ĉu ni iom trudiros Lian manon, ke Li "konstruu kun ni" nian utopion, rilate aŭ senrilate al Esperanto. Kiel diris W. Grillenberg : "Esperanto ne povas esti por ni artikolo de kredo."<sup>27</sup>

Ni devas esti ardaĵ, konvinkitaĵ de Dio, sed ankaŭ agantaj ene de la eklezioj, por la eklezia laboro. Ni ne lasu la eklezian vivon por Esperanto. Ni atentu, ke ĝi ne fariĝu nian novan paroŝon, eĉ nian novan Eklezion. Sed tamen, kiel notis en 1935 Eric Carlén :

"La tuta Esperanto-movado (estu nia) misia tereno."<sup>28</sup>

Ĉu fakte ne estas nia devo alparoli pri la Evangelio la esperantistojn, plenplenaj aŭ ne je humanisma "interna ideo", en ilia "kara lingvo" ? Ĉu ni kuraĝus anonci inter niaj samideanoj, ke savo kaj estonteco estas nur en Jesuo Kristo kaj en pento ?

Tiun komunikadon al la samideanoj esperantistoj ni ne povas ne havi, almenaŭ simile kiel al la anoj de nia nacia, najbara, laboreja socio.

## Esperantistoj inter kristanoj

Nia daŭra problemo estas, kiel alparoli la fratojn kristanojn.

"La ĝenerala sinteno de la publiko estas ne malfavora, sed indiferenta kaj ofte plena de miskomprenoj pri bazo, celo kaj utilo de la Kristana Esperantismo."<sup>29</sup>

Tiu ĉi konstato de H. de Hoog pri Nederlando estas valida ankoraŭ

nun, kaj multloke. La sinteno de la kristanaro rilate al Esperanto estas indiferenteco, skeptikeco.

En dokumento de Mission 80 estis notita: "la kristana komunikado devas esti persona."<sup>30</sup> Ĉu Esperanto helpas al persona komunikado, dum la modernaj inform-periloj, radio, televido, samtempa tradukado, estas nepersonaj kaj kiel sama muldilo por ĉiu. Ni parolis pri la rilato inter la kulturo kaj la gepatra lingvo. Kio estas la rilato inter internacia, tutmonda kulturo kaj la Internacia Lingvo?<sup>31</sup> Kaj kiel tio konsekvencas por la tuta ekumeno. Macmillan listis du motivojn por lernado de lingvo: la integriĝa motivo kaj la instrumenta motivo.<sup>32</sup> Kial iu kristano lernus Esperanton? Se li facile eniras en la idealojn de la esperantisma kulturo, tio povas sufiĉi, sed se li estas pli pragmata, por kiu uzo li lernus? Ĝenerale, jam estas en la propra lingvo la Biblio, himnaroj, ktp. La vojaĝemuloj ne estas tiel oftaj. Eble oni fosu en la direkto de la ekkono de la Universala Eklezio. Por bone koni alian eklezion, oni bone konatiĝu kun anoj el ĝi, do tiurilate Esperanto povas esti bona ekvilibro inter kvalito kaj kosto. Sed ni tamen restu konsciaj, ke multaj pensas, ke kono de ekzemple la angla multe helpas internacie, kaj ili fakte pravas. Ĉu vere ĉi tion ni celu? Ĉu nia eco ne estas la etoso, la multnacia frateco?

Kien?

Estis notita post la unua kongreso de K.E.L.I. en Tostarp "efika kontakto inter kristanoj!"<sup>33</sup> Jen kelkaj motivoj de kristanaj Esperanto-agadoj. La celo de la kontakt-komisiono en 1954 estis:

"instigi ilin (la internaciajn kristanajn movadojn) al praktikado de Esperanto en iliaj internaciaj rilatoj."<sup>34</sup>

Hübner donis al sia revuo la taskon:

"Montri la grandan utilon de nia lingvo por la rilatoj inter la kristanoj de la tuta mondo. Ĝi devas esti la informilo komuna pri la kristana vivo en ĉiuj partoj de la tero... Fine ĝi devas esti gvidisto al Jesuo Kristo."<sup>35</sup>

La celoj de K.E.L. en 1912 estis:

"Propagandi, enkonduki kaj utiligi Esperanton inter kristanaj societoj por faciligi la disvastigon de la Evangelio pri Jesuo Kristo, la vera Filo de Dio kaj la sola Savinto de la homaro, laŭ la Sankta Biblio; disvastigi kristanan Esperantan literaturon."<sup>36</sup>

kaj tiu de *Kristana Revuo* en 1927:

"Ni ne celas propagandi Esperanton, nek Esperantajn entreprenojn, ni nur celas uzi nian karan Didonitan lingvon por diskonigi kolektitajn interesaĵojn, precipe pri la misiaj kampoj al la Esperantistoj kaj al la kristanoj, kiuj

ne estas Esperantistoj."<sup>37</sup>

Kio do antaŭenpuŝas nin? Mi jetas kelkajn ideojn. Tiu lingvo utilis al ni. Ni do pensas ke ĝi ankaŭ utilis al aliaj. Ni spertis per ĝi tion, ke estus tro domaĝe, ke aliaj fratoj preterpasus ĝin. Kaj eĉ estas tiel stulte perdi tion da mono pro lingvaj malfacilaĵoj en organizoj, kaj estus tiel bone se...

Konklude

La diverseco de lingvo, ĉu puno aŭ ne, estas certe ĝeno, eĉ se ĝi estas riĉeco. Nia kristana alvoko estas, ke ĉiu povu aŭdi la Evangelion. Do, oni traduku la Biblion, enkulturigu la mesaĝon, ke ĝi estu komprenata. Sed ni devas frate interrilati, do ankaŭ super la lingvo-bariloj. Kaj tiudirekte por personaj kontaktoj, Esperanto montris sian efikecon.

Philippe Cousson, Francujo

#### NOTOJ

- 1) zikurato, en Slipara Vortaro (zikurato en P.I.V.)
- 2) LIPINSKY (E.). - *La Tour de Babel*. - Paris: Cerf. -(Assemblées du Seigneur). - p. 8
- 3) Jean CALVIN. - *Commentaires: Genèse*. - Genève: Labor & Fides. - p. 182.
- 4) samloke, p. 181.
- 5) VON RAD. - *La Genèse*. - Genève: Labor & Fides. - p. 150.
- 6) C. ROCHEDIEU. - *Introduction pratique à la Genèse*. - Vennes s. L.: Emmaus, 1932. - p. 40.
- 7) Henri BLOCHER. - *Révélation des origines*. - Lausanne: P.B.U., 1979. - p. 200.
- 8) A. de PURY. - *La tour de Babel et la vocation d'Abraham en Etudes théologiques et religieuses*, 1978/1, p. 94.
- 9) samloke, p. 89.
- 10) EMMANUEL. - *Pour commenter la Genèse*. - Payot. - p. 149.
- 11) Calvin, citita verko, p. 184.
- 12) *Notes pédagogiques en Journal des Ecoles du Dimanche*, 1970/3, p. 45.
- 13) perdita referenco.
- 14) R. BRETON. - *Géographie des langues*. - Paris: P.U.F., 1976. - p. 4.
- 15) *La Culture au risque de l'Évangile, rapport de Willoubank*. - Lausanne: P.B.U., 1979. - p. 14.
- 16) A. HAUSER citita de M. COHEN. - *Pour une sociologie du langage*. - Paris: A. Michel. - p. 93.

- 17) Martin LUTHER. - *Oeuvres, tome VI, Essai sur l'art de traduire.* - Genève : Labor & Fides. - p. 633.
- 18) C. PIRON en *Heroldo de Esperanto*, 1667.
- 19) T. BEARTH en *L'Appel de la Côte d'Ivoire*, 130, p. 20.
- 20) *L'Éducation*, 137, 1972, p. 38.
- 21) K. O. SANDGREN, en *Dia Regno*, 1971/5.
- 22) V. PEEVSKI, en *Scienca Revuo*, 27/2-3, 1976, p. 63.
- 23) B. M. KREDOV, citita samloke, p. 66.
- 24) citita de K. O. SANDGREN, en *Dia Regno*, 70/12.
- 25) diskuto de KUNE, en *La Fonteto*, 1975/2.
- 26) G. B. DORROW. - *Kio estas nia devo ?* en *Dia Regno*, 1978/3, p. 1812.
- 27) W. GRILLENBERGER, en *Dia Regno*, 1971/3.
- 28) E. CARLÉN, citita de H. DE HOOG. - *Nia Historio.* - Ede : KELI, 1964. - p. 84.
- 29) De Hoog, citita verko, p. 136.
- 30) P. BUTLER, en *Ateliers, Mission 80.* - Romanel : TEMA, 1979. - p. 11/3.
- 31) vidu en J. KORYTKOWSKI. - *Internacia lingvo en Eklezio kaj mondo.* - Roma : IKUE-centro, 1976.
- 32) MACMILLAN, en *The Problem of linguistic communication in the modern world.* - London, Rotterdam : CED, 1971. - p. 138.
- 33) De Hoog, citita verko, p. 113.
- 34) samloke, p. 127.
- 35) samloke, p. 7.
- 36) samloke, p. 28-29.
- 37) samloke, p. 51.

Philippe COUSSON (*filip kuoŝ*) franco (1953), mezlerneja bibliotekisto, vic-prezidanto de K.E.L.I., esperantisto de 1975, redaktoro de ŝi tiu revuo, presbitero en lia reformita paroŝo.



## LA LINGVO DE LA KATEDRALOJ

"Unu bildo parolas pli ol mil vortoj" estas malnova vero. Same parolas konstruaĵoj, do ankaŭ la katedraloj. Oni ankaŭ povas lernadi la lingvon de la katedralo, por pli bone kompreni ĝin.

La katedralo rakontas, 1-e pri la epoko kiam ĝi estis konstruata, 2-e pere de simboloj kaj atributoj pri la veroj de kristanismo kaj 3-e ĉiu vizitanto spertas kaj sentas persone multajn aferojn.

## Arkitekturaj stiloj

Ĉiu katedralo, kiel ankaŭ tute aliaj konstruaĵoj, portas mesaĝon de la epoko, kiam ili estis konstruataj. Ili reprezentas la arkitekturan stilon de sia epoko. Dum la tempo de la kristanaj preĝejoj ekzistas pli ol dek arkitekturaj stiloj. Ĉiu stilo estas pli aŭ malpli malsimila en malsamaj landoj. La komenco de la stilepoko ankaŭ en la sama lando ofte ne similas al la fino de la stilepoko. En multaj landoj oni distingas inter substiloj. Se oni plue konsideras la nombregon da preĝejoj, estas kompreneble, ke ni povas pritrakti nur kelkajn ekzemplojn. Sole en la franclingva regiono de Eŭropo estas dek mil preĝejoj!<sup>16</sup>

Frua kristana estas nomata la unua stilepoko. Ĝi naskiĝis en Proksima Oriento. Sed ĝi disvastiĝis kaj en orienton kaj en okcidenton. La preĝeja plano havas la formon de ortangulo. La ortangulo estas dividita per kolonoj en tri aŭ kvin navojn. La meza navo estas pli alta kaj pli larĝa ol la aliaj. Ĉar la apudaj navoj estas pli malaltaj, eblas havi fenestrojn supre en la muro de la meza navo. Ĉi tiu tipo de konstruaĵo estas nomata baziliko.

Konataj ekzemploj estas la Bet-Leŝema preĝejo de la Naskiĝo, kaj *San Lorenzo fuori le mura* kaj *San Paolo fuori le mura* en Roma (Romo).

Egiptujo estis kristana lando antaŭ ol esti islama. La plej malnova egipta preĝejo estas *Abu Sarga* en El Qāhira (Kairo). Laŭ la tradicio, la preĝejo estas konstruita en la loko, kie situas la kaverno, kie Maria kaj Jozef kun la fileto Jesuo loĝis dum sia fuĝo en Egiptujon. Jozef laboris en la romia kastelo. La sinagogo estis kaj estas hodiaŭ proksima.

*Abu Sarga* estas frua kristana baziliko. Ĝi havas tri navojn, malgrandajn fenestrojn sen vitro kaj subteran kripton en la kaverno.



Bizanca stilo naskiĝis samtempe kun la fru-kristana. La preĝeja plano havas rondan aŭ okangulan formon. En Kapernaŭm oni povas vidi ruĝon de malnova, okangula preĝejo. Ĝi eble estas la unua kristana preĝejo. En la sama loko situas nome la domo de Petro, kiu unue plivastiĝis kaj poste fariĝis preĝejo.<sup>11</sup>

Komence la kristanoj kunvenis ja dimanĉe en domoj por dispecigi panon (Aĝoj 20:7), sed ni scias, ke almenaŭ en la kvara jarcento ekzistis sanktecaj kontraŭaĵoj, preĝejoj.

La bizanca stilo ankaŭ disvastiĝis kaj en Orienton, kaj en Okcidenton. En Okcidento estas kelkaj famegaj kreaĵoj, kiel *San Vitale* en Ravenna kaj *San Marco* en Venezia (Venecio). Sed la plej fama bizanca preĝejo estas *Hagia Sofia* en Istanbul. Ĝi ŝanĝiĝis al moskeo en la jaro 1453, sed estas nuntempe muzeo. Oni rigardas ĝin kiel la plej belan kaj malfacilan arkitekturan kreaĵon. Ekzemple ĝi havas kupolon kun diametro de 31 metroj kaj la kupolo havas kvardek fenestrojn. Ŝajnas, ke ĝi ŝvebas en aero. La preĝejo estis konstruata en la sesa jarcento.<sup>10</sup>

La ortodoksa eklezio konstruas siajn preĝejojn ankaŭ hodiaŭ laŭ la bizanca stilo, aŭ la konstruaĵoj baziĝas sur la bizanca stilo.

Romanika stilepoko regis dum la jaroj 1000 - 1250, ne samtempe en ĉiuj landoj, kaj ankaŭ ne same nomata. Ĉiuokaze dum ĉi tiu epoko la kristanismo jam disvastiĝis en ĉiujn partojn de Eŭropo, el Mediteraneo al Skandinavio, el Pollando al Anglujo.

La romanika stilo estas ankaŭ nomata rondarka stilo, ĉar la fenestroj kaj pordegoj havas supre rondan arkon. La plano de romanika preĝejo estas ankaŭ ortangulo. Okcidente staras turo kaj oriente estas absido, la plej malalta kaj plej mallarĝa parto. La grandaj preĝejoj, la katedraloj, havas planformon de kruco. Ĉiuj navoj havas absidon, duonrondan fundan parton. La absido enhavas fiorejon kaj altaron.

Tri famaj romanikaj katedraloj estas la tri imperiestraj katedraloj en Germanujo, nome Speyer (*ŝpajer*), Mainz (*majnc*) kaj Worms (*vorms*).<sup>5</sup> Sed oni trovas ĉie romanikajn preĝejojn: oriente en Pollando Cieszyn (*cieŝin*)<sup>17</sup> *Kaplica grodowa ŝw Mikolaja*, okcidente en Anglujo Norfolk (*noofolk*)<sup>13</sup> (En Anglujo, la stilo estas nomata normanda), sude en Hispanujo Santiago de Compostella, kaj norde en Skandinavio Ribe, Viborg, Lund.

Gotika aŭ ogiva stilepoko (1140-1500) naskiĝis en Francujo. La stilo malsimilas al la romanika per la grandaj, akrepintaj fenestroj kaj pordegoj. Karakterizaj por la gotika katedralo estas

grandega, ronda rozfenestro kun vitralo, kelkfoje altegaj turoj, kelkfoje multego da malgrandaj turetoj, fialoj.<sup>2</sup>

Konataj francaj katedraloj estas Reims (*rēs*), Amiens (*amjē*), Chartres (*ŝartr'*) kaj *Notre Dame* de Paris (Parizo). Ĝi staras jam de ok jarcentoj en la centro de Paris. Oni konstruis ĝin dum 140 jaroj. La okcidenta fronto estas majstra verko de alta gotiko. La francaj, kiel britaj kaj ofte ankaŭ hispanaj, katedraloj havas rompitaĵajn turojn, sed la germanaj havas altajn, pintajn turojn.

Ignorante sekvantajn stilojn ni nomas kelkajn modernajn ekzemplojn. La plej famaj mezepokaj preĝejoj sendube situas en Meza Eŭropo. Hodiaŭ la pezcentro estas en nordaj landoj. Certe oni povas trovi ĉie kelkajn arkitekture bonajn ekzemplojn (la monaĥejo *La Tourette* aŭ la preĝejo *Notre Dame du Haut* en Ronchamp (*rōŝā*). Sed en la nordaj landoj estas multe da arkitekture bonaj preĝejoj kaj eble la plej famaj hodiaŭaj preĝejoj situas tie.

En København (Kopenhago) oni konstruis dum la jaroj 1920-1940 *Gruudvikerkirke*-n. Ĝi estas tre simpla kaj senornama, iamaniere laŭ gotika principo konstruita katedralo. La sola materialo estas briko. Ankaŭ la ŝtuparoj estas de briko.

La islanda katedralo, *Hallgrímskirkja*, en Reykjavík estas ankaŭ tre simpla. Sed se vi paciencie restas sidante tie, la katedralo komencas paroli al vi.

La katedralo de la Arkta Oceano en Tromsø parolas pere de siaj buntaj kaj plurkoloraj vitraloj. Laponoj uzas samajn kolorojn en siaj vestoj.

La preĝejo *Markuskyrkan* en Stockholm-Björkhagen plaĉas pere de rafinita laboro kaj efikaj brikmuroj. En Helsinki estas la Preĝejo en la Roko. La natura roko formas murojn sur kiuj akvo verŝiĝas al plankdefluilo. La plafono estas granda, kupra kupolo tra kies fenestroj la preĝejo ricevas abunde da lumo.

**Bildoj, ŝimboloj kaj atributoj**

Dum la Mezepoko, kiam la popolo ne havis popollingvan Bibliion, bildoj estis grava rimedo, pere de kiu la popolo ricevis scion pri bibliaj rakontoj (Certe jam estis popollingvaj predikoj). Al ni hodiaŭaj homoj, samaj bildoj rakontas multajn aferojn pri la mezepokaj homoj, pri iliaj vestoj kaj kutimoj, pri iliaj laboroj kaj pri ilia vivo.

Bildoj ankaŭ enhavas simbolojn. La fiŝo estis dum la tempo de persekutoj sekreta simbolo de la kristanoj. Malnovaj mozaikoj ofte enhavas fiŝfigurojn. Se oni skribas la komencliterojn de la grekaj

vortoj *I(esus) CH(ristos) TH(eou) U(íos) S(oter)* (Jesuo Kristo Filo de Dio Savanto) formas I-CH-TH-U-S, kiu signifas fiŝo.<sup>b</sup>

La simboloj de la kvar evangeliistoj estas ĝenerale konataj. Ireneus (Ireneo) de Lyon (130-200) estis la unua kiu interpretis, ke la kvar kreitaĵoj de profeto Jeŝezkel signifas la kvar evangeliistojn (Jeŝ 1:15; 10:14; Apo 4:6) nome : (flughava) homo (ne anĝelo) Mateo, leono Marko, bovo Luko, kaj aglo Johano.

Aliaj simboloj estas : okulo, triangulo Dio Patro,  
kolombo Sankta Spirito,  
ŝipo la Eklezio.

La kruco estas certe la plej ofte uzata simbolo. Ni vidas ĝin sur la turo kaj sur la tegmento de la preĝejo, en la frontono, interne, en paramentoj<sup>c</sup>, ktp. Ĝi estas la simbolo de la releviĝo kaj de la vivo (ne de la morto).

La kruco povas esti atributo. La renversita latina kruco estas atributo de Petro. Laŭ la legendo Petro estis krucumita kun la kapo malsupren. Tamen ŝlosilo aŭ du ŝlosiloj estas konataj atributoj de Petro. Ankaŭ aliaj apostoloj havas siajn proprajn atributojn :

|                    |                  |
|--------------------|------------------|
| Andreo             | oblikvan krucon, |
| Paŭlo              | glavon,          |
| Jakobo pli juna    | lignan batilon,  |
| Jakobo pli maljuna | konkon.          |

Sanktuloj havas siajn proprajn atributojn, ofte librorulaĵon aŭ libron.

Koloroj, ornatoj kaj aliaj vestoj, kandeloj, almenaŭ ĉiuj aferoj en la preĝejo povas simboli ion en la eklezia jaro. La koloro de pureco kaj senkulpeco estas blanka, la koloro de la Dia amo ruĝa, de pento viola kaj de printempo kaj espero verda.

#### Personaj pensoj

Kiam mi eniras preĝejon por partopreni Diservon, mi ofte pensas pri la jarmila tradicio, kiun mi renkontas tie. Ni uzas la saman benon de la Eternulo, kun kiu Moseo benis sian popolon. Jesuo mem instruis la Preĝon de la Sinjoro, kiun ni en ĉiu Diservo preĝas.

Kiam mi genuiĝas ĉe la altaro por partopreni la Sanktan Manĝon, mi ofte pensas kaj sentas, ke la tempaj kaj lokaj limoj malaperas. Mi imagas, ke la sanktamaŝa tablo kontinuas el mia hejmpreĝejo al aliaj preĝejoj kaj tra multaj landoj kaj miloj da kilometroj ĝis Jerusalemo, ĝis la supra ĉambro. Mi sentas, ke miaj karaj vivantaj kaj jam mortintaj parencoj kaj amikoj ĉeestas, kaj Jesuo mem donas al ni la panon kaj la vinon (2 Pet 3:8; Heb 13:8). Ĉar la sakramento estas dividata de la altaro, la altaro estas la

plej grava punkto, la centro de la preĝejo.

En la evangelia Diservo ankaŭ la vorto, la katedro, kaj la muziko, la orgeno, estas gravaj (Mat 26:30, Lk 4:16-21). Post la Diservo, mi ofte ne multe rememoras pri la prediko. Sed la kuneco de la eklezio estas tiel grava por la religia vivo, kiel la manĝo por la fizika, sendepende de rememoro.

Sed ne nur la grandaj, episkopaj preĝejoj, la katedraloj parolas al ni. Ankaŭ malgrandaj kaj malgravaj lignaj preĝejoj kaj preĝejoj parolas.

Oni povus nomi multajn belegajn ekzemplojn el Pollando, kiel Dębno (*dębno*) aŭ Powroźnik (*povroźnik*) ĝis Norvegujo. Norvegaj lignaj STAVKIRKE (stangopreĝejoj) kiel Urnes, Borgund, Gol jam spitis kontraŭ la vetero dum almenaŭ mil jaroj. Iliaj arkitekturaj ornamoj baziĝas sur la prakristana periodo, kaj pere de nigraj muroj kaj malgrandaj fenestroj estas la interno krepuska kaj mistika.

Sed eble la plej impresan Diservon mi spertis en sveda Laponujo, En Saltoluokta. Tie estas malgranda tendopreĝejo (KYRKKÄTA). Ĝi estas konstruita ĉefe de tero kaj torfo, kiel la laponaj dometoj pli frue ofte estis. La homoj sidas sur la tero sur boacaj feloj, la fajro brilas en la centro kaj la fumo foriras tra la truo en la plafono (same kiel ĉe la laponoj pli frue ankaŭ hejme). Tiun preĝejon kaj la Diservon tie mi ne forgesos !

Olavi Kantele, Finnlando

#### notoj

a) fialo : akra, malgranda turo, kiu havas dekoracian karakteron. Aperas en la gotika kaj ĝin imitanta arkitekturojn. (kp. P.I.V. pinaklo)

b) vidu en *Evangeliaj Kajeroj*, 1, 1987, pp. 73-74.

c) paramento : eklezia tekstilaĵo (*antependium, palla altaris, pulvinarium, corporale, velum* kaj liturgiaj vestoj).

## BIBLIOGRAFIO

1. SAAHTIO (Rafael). - *Kristilliset vertaankuvat* (Kristanaj simboloj). - Helsinki, 1963.
2. DAHLBY (Frithiof). - *De heliga tecknena hemlighet* (Sekreto de sanktaj insignoj). - (Svedujo), 1963.
3. BERTHELSON (Bertil). - *Kyrkor i Sverige* (Preĝejoj en Svedujo). - Stockholm, 1965.
4. FABER (Tobias). - *Dansk arkitektur* (Dana arkitekturo). - København, 1965.
5. WOLFF (Paul). - *Drei Kaiserdoms* (Tri imperisetraj katedraloj). - (Germanujo).
6. PINDER (Wilhelm). - *Deutsche Dome des Mittelalters* (Germanaj katedraloj de Mezepoko). - (Germanujo), 1952.
7. HENZE (Anton). - *La Tourette Le Corbusier's erster Klosterbau* (La Tourette la unua monaĝejo de Le Corbusier). - Starnberg, 1963.
8. SEIBERT (Jutta). - *Lexicon christlicher Kunst* (Leksikono de la kristana arto). - Breisgau, 1960.
9. MÜSELER (Wilhelm). - *Europäische Kunst* (Eŭropa arto). - Berlin, 1942.
10. NORWICH (John Julius). - *Weltarkitektur* (Monda arkitekturo). - Braunschweig, 1979.
11. LOFFREDA (Stanislao). - *A visit to Capharnaum* (Vizito en Kapernaŭm). - Jerusalem, 1976.
12. ROBERTS (H. Ernest). - *Medieval monasteries and minsters* (Mezepokaj monaĝejoj kaj katedraloj). - London, 1949.
13. CHILD (Mark). - *English church architecture* (Angla preĝeja arkitekturo). - London, 1981.
14. SMITH (G. E. Kidder). - *The new churches of Europe* (La novaj preĝejoj de Eŭropo). - London, 1964.
15. *Great cathedrals* (Grandaj katedraloj) en *Horizon Magazine*, 1984.
16. *Eglises de France* (Preĝejoj de Francujo). - Paris : R. Laffont, 1966.
17. ZACHWATOWICZ (Jan). - *Architektura polska* (Pola arkitekturo). Warszawa, 1966.

Olavi KANTELE (1920), finno. Arkitekto, havis propran oficejon, kaj laboris 1971-1985 en la finna konstruista administracio. Esperantisto ekde la jardeko 1940.

## PERCEPTI LA AŬSKULTANTARON

La temo de ĉi tiu artikolo estas la objektiva percepto, kiun radio-komunikanto devas havi pri la adresatoj de la radio-elsendoj, por ke ĉi-lastaj estu celtrafaj. Anstataŭ abstraktaj konsideroj, mi proponas, ke la legantoj sekvu min "malantaŭ la kulisoj", por konstati konkrete la aferojn.

Jen kiel mi faras Esperantlingvan radio-elsendon : mi eniras en akustike izolitan ĉambron, surmetas aŭskultilon ĉe-orelan kaj, ĉe eklumiĝo de ruĝa signalo, "Karaj geaŭskultantoj !" sentoplene mi elkrias, direkte al ... altfidela mikrofono pendanta super tablo. Ĉu vere iu ie aŭskultas min ? Ĉu mi ne estas skizofreniulo alparolanta aparaton, kiu dissendas diraĵojn neaŭskultatan, ĉar al neniu ĝi interesas ?

Mi ekmemoras pri fama novelo titolita *L'eresia catara* (La katarista herezo) de la itala Nobel-premiito Luigi Pirandello, kiu rakontas pri universitata profesoro erudicia kaj fervore lekcia en duonluma klasĉambro tute senhoma, sed kie manteloj pendigitaj sur la fono de la malhela lekcio ŝajnigis ĉeeston de studentoj. La profesoro pasie prelegis pri la katarista herezo, ironie polemikante kontraŭ alia erudiciulo, kiu havis pri tiu herezo malsaman opinion. Klera disertacio ... direktata al pendantaj vestaĵoj.

Mi demandas min : kiam mi faras radio-elsendon, ĉu iu aŭskultas min, aŭ ĉu mi vane alparolas mikrofonon ? Kion fari, por ke oni aŭskultu, aŭ por ke la nombro da aŭskultantoj pligrandiĝu ? Mi ne povas devigi onin ŝalti radio-aparaton, aŭ elekti mian ondo-longon ! Oni min aŭskultos nur se mia parolo iel respondos onian intereson, scivolon, demandon, problemon. Sed kiel percepti la efektivajn aŭ potencialajn aŭskultantojn ?

Kiel redaktoro de la Esperanto-programo ĉe Radio Vatikana, mi povas rakonti jenon. Antaŭ dekduo da jaroj estis lanĉita kampanjo de leteroj al Radio Vatikana, por peti enkondukon de Esperanto inter la parol-lingvojn de tiu radio-stacio. Ĉe la stabo de la radio, kaj ĉe la superaj instancoj en Vatikano, la ĝenerala opinio pri Esperanto ne malsimilas al tiu de la kutima neesperantista mondo : oni taksas ĝin utopia projekto, sen realisma ŝanco. Tamen la amaso da alvenintaj petleteroj estis tioma, ke la kompetentaj instancoj verŝajne faris ĉi tian pragmatan rezonadon : sendepende de nia pritakso pri la taŭgeco de ĉi tiu artefarita lingvo, ni konkrete konstatas, ke ekzistas potenciala Esperanto-aŭskultantaro. Tial ili decidis enkonduki mal-longajn programojn en Esperanto.



Nu, por celtrafe plenumi sian taskon, la redakcio komisiita pretigi la Esperanto-dissendojn devas respondi plurajn demandojn. Interalie :

- 1) Kion celas Radio Vatikana ?
- 2) Kiaj estas la esperantistoj ĝenerale ?
- 3) Kiaj estas la esperantistoj radio-aŭskultantoj ?
- 4) Kiujn, kiajn aŭskultantojn celi ? Kiel ?

1) Celo de Radio Vatikana estas la kristanaj kredo, pensomaniero kaj vivo. Sed kristana vivo ne estas nur individua, konscienca rilato kun Dio, nek nur funkciigo de samkredaĵaj komunumoj. Laŭ la Evangelio, la kristanaro devas esti lumo, salo, fermento de la mondo (kp. Mat 5:13-16). Kristo Savanto celas la tutan homaron ; tial la kristanoj, krom proponi la kredon, devas konkrete klopodadi, kunlabore kun ĉiuj, por ke en la mondo estu justeco, solidareco kaj paco.

Konsekvence de tio, la enhavon de niaj elsendoj devas konsistigi la Biblio kaj la kristana instruo, la Eklezia vivo, sed ankaŭ humanaj temoj kaj problemoj.

2) Por ekkoni kia estas la esperantistaro, necesas, krom la persona sperto, trastudo de la socikultura fono de Esperantujo. Mal-longe dirite : la esperantistoj ĝenerale havas idealojn de tutmonda interkompreno, humana solidareco, kaj paco ; ili estas sentemaj pri lingvaj problemoj kaj aparte celas al agnoskigo kaj disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto. Surbaze de ĉi tiu ecaro, ni konkludas, ke al niaj Esperanto-aŭskultantoj interesas temoj kiaj : mondaj kaj internaciaj problemoj, humanaj iniciatoj por transnacia solidareco, interkulturaj ŝanĝoj, interreligia kunlaboro, ekumenismaj iniciatoj, ekologio, interlingvaj problemoj, Esperanto-movado...

3) Por ekscii, kiaj estas la Esperanto-aŭskultantoj, kaj iliaj deziroj kaj petoj, ni havas duspecajn rimedojn : la leterojn de radioaŭskultantoj, kiuj proprainiciate skribas al la radio-redakcio ; kaj la respondojn al ĉi-celaj enketoj (dandaroj) prezentitaj al la aŭskultantaro aŭ radio-parole, aŭ skribe (per leteroj aŭ per programbulteno) al tiuj kies adreson la redakcio konas. Jam el la kvanto da leteroj, kiuj alvenas al la Esperanto-sekcio de la radio, evidentiĝas, ke la samideanoj ege ŝatas aŭskulti ĉiujn kapteblajn Esperanto-programojn, sendepende de iliaj enhavo kaj ideologio. La kialo estas, ke la esperantistaron konsistigas diasporo (= disa minoritato), kiu celas komunan lingvon por interkompreno kun alinacianoj. La radio-aŭskulto havigas la oportunon de internacia komunikado sen vojaĝado eksterlanden.

Kompreneble, por "percepti la aŭskultantaron" gravas, pli ol la kvanto, la enhavo de la leteroj mem. Ili estas tre diversaj, ekz-e : teknikaj raportoj pri aŭskulteblo (SINPO-kartoj) ; specifaj rimarkoj, kritikoj ktp. pri aparta programo ; ĝeneralaj konsideroj pri pri-taksoj pri la enhavo, la lingvo, la prononco ... ; sugestoj, konsiloj, petoj, demandoj ...

Tre gravas ankaŭ aliaj ecoj : la deven-lando, la kredo (aŭ nekredo), la aĝo, la profesio, la kulturo ktp. de la aŭskultantoj.

La redakcio atente legas kaj konsideras ĉiujn leterojn, el kiuj eblas imagi kia estas la radio-aŭskultantaro. Ekz-e, el la ricev-itaj leteroj ni konkludas, ke granda parto de niaj aŭskultantoj loĝas en Orienta Eŭropo. Do niaj programoj devos aparte priatenti la situacion kaj la eventojn de la kristana vivo de tiuj regionoj, des pli ke en kelkaj kazoj la informoj de Radio Vatikana estas preskaŭ la ununuraj religiaj sciigoj, kiujn ili ricevas. Alia ekzemplo : la konstato ke multaj aŭskultantoj estas nekatolikaj kaj foje nekred-antaj, devigas nin elekti ankaŭ ekumenajn kaj humanajn temojn supoz-eble interesajn por ĉiuj, kaj krome ni devos uzi ne fakan, sed laikan terminaron, klarigante la nekutimajn vortojn (ekz-e : kanonjura kodo = eklezia leĝaro ; kuria kongregacio = konstanta papa komisiono).

En la lasta dimanĉo de ĉiu monato nia programo parolas pri la ricev-itaj leteroj kaj laŭeble respondas demandojn kaj kritikojn.

Ni mencias nur unu ekzemplon, por klarigi kion signifas "percepti la aŭskultantaron." En iu programo ni diris, ke la naskiĝo de Jesuo ja estas historia evento, sed ĝia jaro kaj dato estas nekonataj. Jugoslava katolika aŭskultanto reagis, tute malaprobante tiun deklaron. Ni estus povintaj respondi, ke eĉ la papo faris ĉi-specan aserton, sed ni preferis konjekti la kialon de tiu reago, kaj ni konkludis ke, ĉar en tiu lando la 25-a de decembro (Kristnaskofesto) estas - sed nur ekde ĉirkaŭ 40 jaroj - labortago, la kredantoj, kiuj tion bedaŭras, trovas maloportuna la suprediritan deklaron flanke de Radio Vatikana. Ni do klarigis, ke historia vero pli oportunas ol porokaza konvenaĵo ; kaj aliflanke sektanoj kiel la Atestantoj de Jehovo, argumante ke la naskiĝtago de Jesuo estas nekonata, asertas, ke oni devas ne celebri Kristnaskon ; nia programo celis respondi ĝuste tiajn kontraŭdirojn, koncedante la nekonatecon de la dato, sed samtempe emfazante la historiecon de la evento.

Alia maniero por percepti la aŭskultantaron estas la enketoj (ĝis nun ni faris nenion ĉi-sence).

4) Laŭ la spirito de la katolika (= universala) kristanismo kaj de Esperanto, ni celas ĉiuspecajn homojn, en la tuta mondo. Por ke tiu universaleco estu ne nur teoria, tre gravus ke la programoj havu, krom kristanaj, ankaŭ ekumenajn, humanajn, kaj eĉ Esperanto-movadaĵajn temojn. Ni klopodas ion fari, sed per malmultaj minutoj ne multo fareblas...

Ĉiokaze, por sin perceptigi, aŭskult-antoj (kaj -untoj) skribu menciante sian aĝon, profesion, (ne-)kredon. Por peti plioftigon aŭ plilongigon de la Esperanto-programoj skribu nacilingve (Esperantlingvanoj jam estas pri tio konvinkitaj...): mallonge, afable, kaj... senblufe (blufaj, kaj tro oftaj leteroj de sama persono ne helpas).

Mi pensas, ke radio-komunikado estas distanca dialogo, en kiu ĉiu partnero havas sian parton de respondeco.

Battista Cadei, Italujo

Battista CADEI, italo (1937), romkatolika pastro de 1963, doktoro pri klasika filologio, instruisto pri greka kaj latina lingvoj, vic-paroĥestro, redaktoro de la Esperanto-sekcio ĉe Radio Vatikana, posteno kiun li baldaŭ lasos.



## KIEL KOMUNIKI FILOZOFION

1. La abstrakta karakterizo de filozofio malfaciligas ne nur ĝian komprenon, sed ankaŭ la komunikadon, kiu fariĝas preskaŭ nur per vortoj.

La abstrakteco de filozofio rezultas el ĝia difino mem kiel pure racia scienco. Dum la empiriaj sciencoj solvas siajn problemojn per empiria konstato, filozofio solvas ilin nur per rezonado. Ĝi ne havas aliajn rimedojn por decidi pri pensoj ne atingeblaj de la empirio. Por la racia konstato, tio, kio estas racia, povas esti akceptita; tio, kio estas absurda, ne povas esti akceptita. Do, filozofio operacias en abstrakta kampo. Tie la atento estas malfacila kaj ofte oni eraras.

La fakulo de empiriaj sciencoj ne havas tiujn malfacilaĵojn. Ekz-e, la fizikisto montras koloritajn foliojn, kiam li parolas al siaj lernantoj pri la diferenco inter ili. Dum la lernantoj atentigas unudirekte la koloritajn foliojn, li daŭrigas la klarigojn ĉiam en rilato kun la empirie perceptitaj koloroj. Li ne eliras el la nivelo de konceptoj pri empiriaj konstatoj.

La filozofo tuj distingas inter tio, kion oni tute ne perceptas empirie, kaj tio, kion oni empirie perceptas. Li okupiĝas nur pri kompreneblaj konceptoj, kiel substanco kaj akcidento, ento kaj enteco de la ento, divido de la ento en ekziston kaj esencon, divido de la ento en aktualon kaj potencialon. La filozofo demandas pri kio estas la ento; tiam li demandas pri la enteco. Li povas priskribi la enton kiel tion, kio ekzistas. Poste li daŭrige demandas: kio estas ekzisto? Aldone li diros, ke ĉiu ekzisto havas iun esencon. Sed kio estas esenco? La respondo eble estos: esenco estas la maniero, laŭ kiu la ekzisto ekzistas. Fine, li resumas: la ento dividiĝas per du partoj, la ekzisto kaj la esenco.

Tamen, iu povas kontesti ĉion diritan, ĉar la filozofia penso estas ankaŭ devige kritika penso, tio ekzistas, filozofia penso devas konsideri ankaŭ la kontraŭan vidpunkton, kompari inter ili ĉiujn eblecojn por pruvi la efektivan veron. Sed ankaŭ ĉiuj tiuj aliaj kontraŭaj vidpunktoj estas same tute ekster la empiria nivelo. Iu povas ekz-e kontraŭproponi, ke la esenco estas la samo kiel enteco. Ĉu li pravus? Jen tute ne empiria diskutado. Se iu neas la distingon inter empiria percepto kaj mensa kompreno, tiu ankaŭ enmetas tute ne empirian diskutadon pri la empirieco mem.

Tamen, nia celo ne estis la solvo por tiuj demandoj, sed nur montri, ke filozofio estas tre abstrakta afero, kaj pro tio malfacile pritraktebla, kaj sekve malfacile komunikebla, preskaŭ nur per vortoj.

2. Ĉar abstraktaj temoj estas malfacile esprimeblaj, malmulte helpas la filozofian komunikadon la didaktika prezentado per konkretaj aĵoj, kiel faras la fakulo de empiriaj sciencoj. Nur enkonduke helpas tiuj rimedoj. Ekz-e, se oni mencias, ke, laŭ la leĝoj de iu lando, tie oni mortigis krimulon, la filozofia demando fariĝas : ĉu la socio, per ŝtata leĝo, povas mortigi iun ? Sed tuj poste la tuta afero trairas per raciaj prikonsideroj.

Tamen, se filozofio estas almenaŭ esprimebla per vortoj, la didaktikaj rimedoj, por esprimi kaj komuniki ĝin, devas esti serĉataj ene de la lingvo mem. Bona komunikado en filozofio supozas subjektivan kapablon de la filozofo mem (kiel verkisto kaj kiel instruisto) kaj objektivan taŭgecon de la uzita lingvo.

Pri tiuj postuloj ni diru ion, por firme elstarigi la filozofian instruiston kiel homon de bona parolado. Preter tiuj supozoj rilate la filozofon kaj la lingvo-instrumenton, oni konsideru ankaŭ la ricevanton. Tiu ricevanto ordinare estas intereso nur pri kelkaj flankoj de la filozofie eksplikendaj problemoj. Ekz-e, li povas interesiĝi pri la filozofia fono de la religio kaj ne pri la filozofiaj klarigoj pri la matematikaj aksiomoj. Aŭ renverse, pri la matematikaj aksiomoj, kaj ne pri la antaŭe menciita fono de la religio. Ordinare ĉiu ŝatas aŭdi pri la filozofio pri arto ; ekde tiu deirpunkto eblas facile enirigi aliajn filozofiajn temojn. Krom tiuj priatentoj, oni aktivigu la mensojn per la dialogo, se la komunikado estas klaso-leciono ; tiel same oni petu la kreon de tekstoj flanke de la lernanto ; oni komprenas facile, ke per tiu aktivado la parolado pliboniĝas.

3. Pri la subjektiva kapablo de la filozofo ni jam avertis, ke la afero rilatas precipe la lingvo-uzon, ĉar la aliaj didaktikaj rimedoj ne multe helpas la komunikadon. Tamen tio ne gravas, ĉar la esenca instrumento de komunikado de la homoj estas ja arto, precipe la arto de la lingvo. La aliaj didaktikaj rimedoj estas nur almetitaj al la didaktike fundamenta instrumento. Por komuniki filozofion, ni, do, lernu kapable uzi la lingvon, kaj la komunikado fariĝas sufiĉe bona, kvankam kun la malfacilaĵo de la abstraktaj temoj.

La redaktado fare de la filozofo estu esprime perfekta. Li distingu inter ideoj, juĝoj, argumentoj. Ĉiuj el tiuj mensaj operacioj estu same klaraj en la lingvo-esprimo. Beletraj frazoj, kiuj

lasas tiujn distingojn de la mensaj operacioj ĉe la kunteksto, riskas lasi ĉion al necerto. Oni uzu ilin prudente.

Se liaj ideoj estas klaraj, li sciu ankaŭ kiel esprimi ĉiujn tiujn ideojn per la ĝusta vorto. Pro la lingva graveco en la filozofia esprimo, estas bone distingi plursencecojn kaj nuancojn per aparta analizo kaj difino de la vortoj uzotaj. Foje estas bone eĉ atentigi pri la etimologio. Filozofo estas homo de multaj vortoj kaj kapablas fiksi ankaŭ per kunteksto la precizan nuancon de ĉiu aparta vorto.

Nun pri la dua mensa operacio : bona komunikado en filozofio postulas trafajn frazojn por ĉiu distinga aserto. Ni pensas ĉiam per juĝo. Ne okazas izolitaj konceptoj. Ĉiam estas subjekto kun predikato. Ekz-e, se ni pensas pri libro, ĉio komenciĝas, ne per izolita koncepto de libro, sed per la aserto : tio estas libro. Se la penso progresas, la predikato metiĝas en la sama flanko de la subjekto, por ke nova elemento fariĝu la predikato. Ekz-e : tiu libro estas granda. Per nova daŭro : tiu libro granda estas mia. Sed la tendenco estas sintezi, kaj ni forigas parton de la subjekto, par la simpla dirado : la libro estas mia (anstataŭ tiu libro granda estas mia). Pli amplekse, sen sintezo, oni devus ripeti ĉiujn asertojn, unu post la alia, kaj diri : tio estas libro, tiu libro estas granda, tiu granda libro estas mia (aŭ tio estas libro, la libro estas granda, la libro estas mia). Por klare komuniki filozofion oni ne sintezu multe la asertojn. Frazoj, kiuj enhavas multajn asertojn samtempe estas tro pezaj, precipe se la enhavo estas tre abstrakta, kiel okazas en filozofio.

Foje, pro la tendenco de sintezo, oni kunmetas eĉ la frazojn per la uzo de pronomo kiel subjekto en la dua parto. Ordinare tiuj kunmetitaj frazoj havas substantivon kiel subjekton de la komenciĝinta frazo, kaj pronomon kiel subjekton de la dua. Por bone kaj facile komuniki filozofiajn abstraktajn pensojn, rekomendiĝas dividi la kunmetitajn frazojn, kaj precipe ne uzi pronomon por krei duan subordigitan frazon. Oni preferu dividi, por elstarigi ĉiun paŝon de la sinsekvo de la asertoj. Ordinare, por dividi sufiĉas ripeti aŭ la subjekton, aŭ la predikaton per nova frazo sendependa per substantivo. Tiam ĉio fariĝas pli komparebla kaj sekve malpeza. Jen ekzemplo de tiu divido, kiel ni mem faris pli supre :

"... oni konsideru ankaŭ la ricevanton. Tiu ricevanto ordinare estas intereso nur pri kelkaj flankoj de la filozofie eksplikendaj problemoj."

Ni evitis la formon per pronomo, pli sinteza kaj peza :

"... oni konsideru ankaŭ la ricevanton, kiu ordinare estas intereso..."



Jen aliaj du formoj, pri la ento :

"ento estas io, kio ekzistas kaj havas manieron de ekzisto, kiun oni nomas ĝian esencon." ;

malpli sinteze, la samo :

"ento estas io, kio ekzistas, kaj tiu ekzisto havas manieron de ekzisto ; tiun manieron de ekzisto oni nomas ĝian esencon."

Rilate la esprimon de argumento (tria mensa operacio) estas ĉiam klare ĉu estas indukto, ĉu dedukto. En abstraktaj aferoj de filozofio, tiu distingo faciligas la percepton de la ordo per kiu la asertoj enkondukas la konkludon.

Por bone indukti oni atentu, ke en la serio de la donitaĵoj, estas konataj tiuj donitaĵoj per la individua karakterizo, ne per la ĝenerala. Tiu nekonado de la ĝenerala karakterizo nomiĝas problemo. La dua fazo de la indukto okazas per la kreo de hipotezo. Oni distingu trian fazon, kiam okazas la testo de la hipotezo per kolektado de novaj donitaĵoj. Por indukti ja per adekvata didaktika metodo nepras prezenti tiun pruvon laŭorde : problemo, hipotezo, testo.

Por bone dedukti oni prezentu klare iun ĝeneralan principon, alian malpli ĝeneralan, per du asertoj nomitaj premisoj. Ofte unu el la premisoj, kiel en la entinemo, estas nur esprimita per la kunteksto. Tiu kunteksto estas konata facile per la titolo aŭ per la enkonduko. Sed en abstraktaj aferoj, oni faciligas la komprenon se la kunteksta premo ankaŭ vorte esprimiĝas. En filozofia ekspono tiu kunteksto fariĝu prefere eksplicita per klara frazo. Ekzemplo de entinemo : Dio kreis senbezone la mondon ; do Dio estas bona. Jen per eksplicita formo la tuta dedukto-vojo : Dio kreis senbezone la mondon (malpli ĝenerala premo) ; nu, kiu kreas senbezone estas bona (ĝenerala premo) ; do, Dio estas bona (konkludo).

4. La objektiva taŭgeco de la uzita lingvo de la filozofo povas okazi kun ĉiuj naciaj lingvoj. Sed unuavide oni povas konstati, ke planita lingvo kiel Esperanto estas pli taŭga pro ĝia teknika perfekteco. Ĝi estas tre fleksebla por esprimi nuancojn. Ĝiaj reguloj ne havas esceptojn, tiamaniere, ke ĉiu vorto akceptas senprobleme ĉiujn gramatikajn rimedojn de esprimo. Pro tio Esperanto estas tre logika, tiel ke oni povas ĉiam klare distingi, ekz-e inter abstraktaj kaj neabstraktaj signifoj. Ne havante idiomaĵojn, la lingvo-uzo funkcias ĉiam logike. Do, se vi deziras efike komuniki filozofion, uzu planitan lingvon, tio estas, Esperanton.

Evaldo Pauli, Brazilo

Evaldo PAULI, brazilano, prof. pri filozofio en la federacia universitato de Santa Catarina, prez. de Filozofia Asocio Tutmonda, ĉefred. de *Simpósio*, verkas en Esperanto kaj en la portugala.

Verkoj en Esperanto :

- *Rekta pensado* (1983)
- *Pri dubo kaj certeco* (1984)
- *Mil jaroj de kristana filozofio* (1985)
- *Enkonduko en la kategoriojn de Aristotelo*, de Porfirio, tradukado el la greka kun komentarioj (1984)
- *Baza Esperanto*, gramatiko (1985).

En preparo eseoj pri edukado, pri estetiko, pri historio de filozofio, pri filozofio ĝenerale.

# SIMPOZIO

## Filozofia Revuo

FILOZOFIA ASOCIO TUTMONDA (FAT)

### ELDONANTO:

Gersi Alfredo Bays (Fonto)  
Caixa Postal 49  
BR-89800 CHAPECÓ - SC  
Brazilo

APERADO: 2 numeroj jare (marte, sept.)

ABONKOSTO: - 3 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro  
ĉe niaj Perantoj - escepte por  
Brazilo (egalvaloro al 2 usonaj  
dolaroj).



plurlingva kristana tesauro  
multilingual christian thesaurus  
thésaurus chrétien multilingue  
mehrsprachiger christlicher Thesaurus  
tesauro cristiano multilingüe

La revuo EVANGELIAJ KAJEROJ konsideras la pretigon de plurlingva tesauro, pritraktanta la sferojn de *teologio* kaj *religio*, kaj la *apudajn* sferojn.

Se vi ne estas bibliotekisto aŭ dokumentadisto, via unua demando estas, kio estas tesauro. Pri tio ĉi eraris ambaŭ redaktoroj de Dia Regno kaj Espero Katolika. Tesauro ne estas vortaro, terminaro, indekso. Ĝi estas listo de terminoj (nomoj aŭ nomgrupoj) kun iliaj rilatoj. Tiuj ĉi terminoj estas aŭ deskriptoroj aŭ ne-deskriptoroj. Deskriptoro estas termino uzata por indeksi dokumenton, ankaŭ dirita ŝlosilvorto. La ekzemplo estas la terminoj skribitaj majuskle en la resumoj de la lastpaĝaj slipoj de Evangeliaj Kajeroj. Ĉiu termino devas priskribi *nur unu nocion*, kaj ĉiu nocio utila devas esti priskribata de *nur unu termino*. La sinonimoj fariĝu ne-deskriptoroj, do ne uzataj en la indeksado.

La unua fazo de la laboro estos listigi la jam uzatajn tesaurojn aŭ ŝlosilvortarojn. Poste vidi ĉu unu el ili estas adaptebla, aŭ ĉu nova tesauro estas farenda. Ĉiukaze, poste listigi terminojn el plej diversaj fontoj (terminaroj, ŝlosilvortaroj, tesauroj, vortaroj, faka literaturo, glosaroj, ktp.), instali la rilatojn, provi la unuan rezultaton, kaj finfine poluri la tesaŭron, kaj ĉio ĉi tio *kvinlingve*. Tiu ĉi giganta laboro necesigas kunlaborantojn, kial ne ankaŭ ekster la Esperanto-movado.

TETH, Philippe Cousson, Le Hameau des Ploids, Nouaillé-Maupertuis, 86340 La Villedieu du C., France.

## LA POETA LINGVO : BILDOJ, VORTOJ

"La ... harmonio estas la tielnomata spirito de la lingvo, ĝin oni sentas ĉe la bonaj stilistoj, kies lingvo vivas ... Estas evidente, ke ĉi tiu afero, ĉi tiu vibra vivo ne povis naskiĝi el gramatikaj skemoj. Kaj unu el la plej genia trovaĵo de la majstro estis, ke Esperanton tuj post ĝia naskiĝo, li fianĉigis al la poezio."

Tiel skribas Kalocsay (*Kalodaj*), nia fama stilisto, poeto kaj art-tradukisto en lia *Prelego por la Somera Universitato dum la Oksforda Kongreso*. Kaj plue en la sama loko :

"... vere oni povas diri, ke ne per Esperanto li faris poezion, sed per la poezio li faris Esperanton. Oni povas diri, ke la tuta Esperanto estas poezia lingvo."

Kaj vere estas tiel.

De tiu tempo jam mondscale evidentiĝis, ke nia lingvo samvaloras la naciajn lingvojn, ne nur ĉe traduklaboro, sed ankaŭ ĉe origin-alaj verkoj. Do plu ne estas dubo, ke nia lingvo taŭgas por esprimi ĉion riĉe, flekseble, kaj tiel, ke ĝi vekas la samajn sentojn en la leganto, kion la verkisto intencis.

Nun mia tasko estas verki pri Poeta lingvo, bildoj, vortoj.

En tiu kajero, kies titolo kaj enhavo estas KOMUNIKADO, mi havas ne tre malfacilan taskon. Ĉar ĉiuj legantoj scias : ankaŭ la poeto volas komuniki. Komuniki pensojn, sentojn, travivaĵojn, sed precipe sentojn, kaj tiamaniere, ke la leganto tute ne sentu mankon, ĉar li povas senti tion, eble ĉe scienca verko, se li ne bone komprenas la terminologion de la koncerna scienca fako. Sed literaturo, kaj en ties kadro la poezio, peras neeviteble la pensojn kaj sentojn de la poeto. Se ne, la poeto fuŝis...

La BILDOJ estas la praaĵ iloj de la komuniko. Nun mi pensas ne nur pri la unuaj skribmanieroj, hieroglifoj egiptaj, ktp., sed mi pensas ankaŭ pri la prahistoriaj pentraĵoj. Ankaŭ ili havis la taskon : komuniki ion. Eble ion realan, eble ion mistikan. Jam la prahomo, mi pensas, komprenis la pensojn, kiuj estis malantaŭ la pentraĵo, pli frue, ol la vortoj estus aperintaj.

La poeto havas similan taskon ol la pentristo. Sed li devas pentri per vortoj. Li devas atenteme elekti el la koloroj, por ke la bildo fariĝu tute hela kaj trarigardebla. Ankaŭ la konturojn li devas atenteme desegni por ke la bildo ne disfalu, ne disfluu, sed

estu unuece bela, kaj esprimforta. La desegno estas la elektita formo de la poemo, ankaŭ la konturojn tio decidus. La koloroj povas esti la direndo de la poemo. Tio nepre estu bone komprenebla, ĉar alimaniere la koloroj disfluas, kaj estiĝas ne poema bildo, sed kolora makulo.

Mi montras kelkajn ekzemplojn el serio de *Naturaj bildoj*.

#### Monto

Aspiras ĉielen la montosupro,  
la lumo rebrilas, oro kaj kupro.  
Pinto ne videblas, ĝin nuboj kovras.  
Super bruanta mond' la pinto sobras.

Ĉi tie la leganto devas senti, kaj espereble sentas, la altecon de la monto kaj vidas la naturajn kolorojn de la rebrilanta sunlumo. Kaj nepre eksentas la majestecon de la montpinto, eĉ tiam, se ĝi ne estas videbla.

#### Rojo

Ekfontas el la mont',  
kuregas al river'  
sub brila horizont'  
natura kurier'.

Espereble la leganto vidas antaŭ si la mallarĝan, sed kurantan puran akvon, kiu elvenas el la sino de la monto. La desegno, do la formo, estas vere simpla, eble tamen esprimforta.

#### Rivero

Akceptas la river' rojon post rojo  
kaj al senfina mar' gvidas la vojo.

Tie la leganto vidas kiel ŝveliĝas la rojoj riveren. Nepre ĉiuj homoj vidis ja, ke la majeste ondaj riveroj estiĝas el malgrandaj rojoj. Kaj tiuj kelkaj grafikaj vortoj sentigas la jam viditajn, do, vekas asociaciojn.

Eble simile efikas ankaŭ la sekva :

#### Maro

Rivero fluas fine  
en la senbordan maron.  
Ondas ĝi ja senlime,  
ne konas iun baron.  
Lulil' kaj ĉerko estas  
grandega ĝia sino,

kaj ĝin ravita spektas  
la povra homanimo.

Nepre oni devas senti la senfinon de la maro. Kaj eble tion, ke la maro estas la lulilo de la vivo. Kiu jam vidis la maron, nepre eksentas, kion diras tiuj kelkaj versoj. Kaj espereble, vekigas ankaŭ asociacioj pro la, eble ne tre lerta, desegno kaj la naturaj koloroj...

Naturas ekzemploj ankoraŭ estas, sed mi pensas, ke sufiĉas. Nun sekvu la VORTOJ.

Poetaj vortoj ne ekzistas aparte, sed la elektado, kaj la uzo de la vortoj kaj esprimformoj faras la poetan lingvon tia.

Pri ili Kalocsay skribas jene en la jam citita *Prelego*.

"Ĉar la Esperantaj vortoj tute ne estas tiel abstraktaj, pendantaj en la aero, kiel oni tion opinius teorie. Unue, la Esperantaj vortoj estas prenitaj el vivanta materialo, por diri komparon, ili ne estas floroj faritaj el papero, sed floroj plantitaj en bedon. Ili daŭrigas tie sian antaŭan vivon kaj ju pli multa fariĝas ilia tero, des pli ili disbranĉos kun riĉaj asociacioj kaj rememoroj."

Kaj se tiuj "bedoj" estas la koroj de la esperantistoj, la vortoj nepre ekfloras, vivas, kaj vivigas. Kaj ni nepre konsentas ankaŭ al la sekvaj pensoj de Kalocsay.

"Poste, ĉar ili (la vortoj) estas prenitaj el internacia materialo, jam dekomence ili havas tiujn asociaciojn internaciajn. La Biblio, la antikva mondo, la ĝenerala moderna kulturo provizas multajn vortojn per nuancoj ĉie senteblaj. En lerta mano ĉi tiuj nuancoj povas havi surprizan efekton."

Kaj kio donis la asociaciojn al la nacilingvaj vortoj? La historio, la moroj, sed precipe la literaturo. La efiko de la samaj faktoroj estas ja atendebla ankaŭ en Esperanto. La historio de nia movado, la komunaj aspiroj kaj esperoj, niaj kongresoj, nia publika vivo iom post iom riĉigis kaj riĉigos multajn vortojn per speciale esperanta kromenhavo. Kaj la efiko de la verkistoj devas ja same manifestiĝi, kiel en la naciaj lingvoj."

Mi pensas, ke nia lingvo jam atingis tiun aĝon kaj nivelon. Ja, se ni rigardas la verkojn de bonaj esperantistaj verkistoj kaj poetoj, ni povas konvinkiĝi pri tio. Nature, la evoluo daŭras plu, ĝis ekzistas unusola esperantisto en la mondo...



Denove Kalocsay :

"Originalaj poetoj kantas, kaj iliaj versoj stampas vortojn per neeviteble aperantaj rememoroj. Komunaj klopodoj kaj ekfloranta literaturo, jen la du rimedoj, per kiuj la lingvo akiras egalrajtecon al la naciaj lingvoj."

Sed la samon diras li eĉ en *Stancoj*, el kiuj mi nun unu citas :  
Streĉita kordo

Streĉita kordo ! ĝojo kaj lamento  
Vibrigis vin. Sed ili al la brust'  
De longe fremdas kaj indiferenco  
Jam kovras ilin per dikpolva krust'  
Kordo, vi longe kuŝis en silento,  
Jam eble vi eĉ raŭkas pro la rust'  
Resonu tamen la kaŝitajn kantojn,  
Vi eble povos trovi aŭskultantojn.

Jen, la "esperanta kromenhavo" de la vortoj... Ja, vere ĉiuj vortoj devas havi enhavon. Eĉ en la naciaj lingvoj nur tiam valoras iom la poemo, se ĝi enhavas vortojn multenhavajn, vortojn efikajn, fortajn, kaj esprimriĉajn. Tio estas necesa, ĉar la poemoj ne devas esti pleonasmaj, eĉ, ili devas esti kompaktaĵoj, masivaj. Eĉ, ĉe la longaj poemoj, versegaj lirikaĵoj, epopeaj poemoj, devas esti tiel.

La poeto devas elektadi la plej efikajn, plej esprimriĉajn vortojn. Ne egale, se mi diras : "la panjo", aŭ "panjo mia !" (en la hungara ekzistas esprimo "panjo dolĉa !"). Ne egale diri : "la patrujo", aŭ "patrujo kara mia !" Ne egalas : "paco" sen la "kromenhavo" : "vera paco", "mondpaco", "paco de animo", aŭ simpla "kvieto". Ne egalas diri : "amo", sed "amo al la homaro !" Aŭ diri : "ideo", sed "ideo de vera amo". Aŭ "interna ideo, de Esperanto !"

Tiun lastan alimaniere esprimas William Auld en poemo aperinta en *Esperanto en Skotlando*, 144, aŭtuno 1987.

Pensoj okaze de la centjara Jubileo de Esperanto

Cent jaroj - plej mirinda el mirakloj :  
Planita lingvo, kiun oni uzis  
Tutmonde, malgraŭ moko kaj obstakloj,  
Spite al spitoj, kiuj ĝin rifuzis ;  
Tra krizoj kaj militoj kaj masakroj,  
Kiam la mondo muĝis kaj meduzis  
Obstinis homoj, kvazaŭ en tranĉeo,  
Pri la interna lingvo de l'ideo.

Do, ne "interna ideo de la lingvo" sed inverse "interna lingvo de l'ideo". Do, mi sentas tie ĉi, ke la lingvo estas pli grava ol la ideo. Sed same : ankaŭ la ideo estas tiom grava, ke ĝi havas propran lingvon. Ankaŭ tion mi povas vidi tie ĉi, ke Kalocsay pravis : "la kromenhavo de la vorto" jam evoluís multe. Ja, ĉiuj esperantistoj povas senti la diritajn, povas mezuri en si mem.

Sed ankaŭ la sekvan strofon de la komencita citaĵo el la poemo de Auld ni legu atenteme :

...

Tio do estas la mirinda fakto,  
Kiun ne povis skeptikul' forviŝi :  
Ke ne sukcesis moko kaj mistrakto,  
Nek provoj nian tezon subtapiŝi,  
L'adeptojn trompi. Kun aŭ sen kontakto,  
La veron plu konservis ili-iŝi,  
Ke estas rajto de l' homar' surtere  
Komunikiĝi rekte kaj libere.

Denove Kalocsay :

"La evoluo de la poezia lingvo, do povas okazi laŭ du vojoj. Per la efiko de la naciaj lingvoj, kaj par si mem, per la libera disvolviĝo de la eblaĵoj en ĝi kaŝataĵ."

Do, eblaĵoj estas, oni nur vivi devas per ili.

Kiel ni vidis, kaj la bildoj, kaj la vortoj estas same gravaj en la poeta lingvo. Nature, la vortoj esprimas ankaŭ la bildojn, sed ĉar la krudmaterialo estas la vorto, alimaniere eĉ imagi ne eblas. Tiuj iom diferencas de la ĉiutage uzataj vortoj, sed ne tro. Prefere nur ilia uzo, lokigo en la poemo, kaj la ioma eleganteco diferencigas ilin.

Same gravas : ne la pleonasmaj, sed la kompaktaĵoj, masiveco estu grava. La poeto klopodu multon diri per malmultaj vortoj. Tiuj vortoj estu bone elektitaj, kaj se estas tiel, en la poezia lingvo estiĝas ne nur forto, sed potenco ! Ĉar kaj la bildoj, estas bone kompreneblaj por ĉiuj homoj, kaj la vortoj : se estas tiel, tiag la vorto kapablas krei. Krei la saman senton, pensmanieron en la leganto, kio estis en la poeto dum la verkado. Kaj tio estas la celo.

Tiam la komunikado sukcesis.

Bessenyei Tibor, Hungarujo

BESSENYEI Tibor (*Beŝenĵei*) : (1927) Hungaro, esperantistiĝis en 1967. Emerita mezlerneja instruisto. Ekde 1972 verkas poemojn, recenzojn, prozaĵojn, ĉefe originale verkitajn poemojn. Tiuj verkoj aperis en *Fonto*, *Hungara Vivo*, *Monato*, *Dia Regno*, *Espero Katolika*, k.a. Presbitero en budapeŝta (Budapest) reformita eklezio, sekretario de Esperanto-grupo, la dua en la urbo.  
La poemdetaloj en la unua parto de la artikolo estas propre verkitaj, por montri la "naturajn bildojn".



## LINGVO KAJ RELIGIO - ANALIZA PARALELISMO

Lingvo kaj religio ne estas realaĵoj inter si fremdaj.

En multaj civilizoj, la skriba lingvo referencis al simboligo de la realo. La sumera sintakso preferis ke la frazoj eku per dativo aŭ akuzativo, la kazoj por la ofero. Kaj Pānini kodis per artefarita lingvo la religian saĝon de sia popolo : tiele naskiĝis sanskrito. Kaj Moseo nomis la mondon per vortoj, kiujn lia lingvo sugestis : tiele la unua viro nomiĝis Adam, kio mem signifas "naskiton el la tero", kaj la unua virino Eva, kio mem signifas "patrinon de la vivantoj".

Ĉe primitivaj popoloj, la ŝamano kuracis kaj magiis per la forto de siaj vortoj. Väinämöinen per sia kanto transformis al kano la glavon de Joukahainen, kaj ĝis la mentono li perkantis sian defianton en la marĉon.

En pli evoluintaj religioj, en la revelacioj, la lingva perilo ne estas disigebla de la mesaĝo : la hebrea por la Malnova Testamento, la latina kaj greka por la kristana tradicio, la araba por la islama. La araba mem sanktigas la tekston : preĝo valoras nur se arabe dirita, eĉ se tute ne komprenebla por la preĝanto mem.

Konata estas la signifo de la "donaco de la lingvoj" : la lingvoposedo estis la plej grava distingo en la pentekosta miraklo. Kaj renverse, en la mezepoka kristanismo la scipovo de multaj lingvoj atestis suspektindan signon de Satano, se ne estis evidenta la "sankteco" de la parolanto.

Por esperantistoj, la paralelismo de lingvo kaj religio estas same evidenta, ĉar ambaŭ elementoj konceptiĝis ĉe Zamenhof kiel fundamentaj por nova socia ordo. Neŭtrala lingvo kaj neŭtrala homa religio solvus, laŭ Zamenhof, la hebrean demandon, kaj entute akcelus la tutmondan fratecon, laŭ la geneza kredo :

"Jen estas unu popolo, kaj unu lingvon ili ĉiuj havas."  
(Gen 11:6)

Pli frue ol Zamenhof, la katolika pastro Johann Martin Schleyer koncipis sian Volapukon kiel rivelaĵon de Dio, en Litzelstetten apud Konstanz, dum la nokto inter la 30-a kaj la 31-a de marto 1879. El tio cetero fontis lia rezisto kontraŭ ĉia reform-propono, kaj per tio ni komprenas jenan epizodon.

Iom malbonhumora Schleyer foje, dum la vizito de fama volapukisto, "naturkuracisto" Ruppert Kniele, plendis al la lasta pri

malbona traktado flanke de kelkaj personoj. Kniele rimarkis, ke interalie estas jam tempo enkonduki en volapukon vorton "envio", kaj tiam Schleyer respondis: "Mi ne scias ĉu Dio volus ke ni havu tiun vorton, mi ĝin ne kreis, faru ĝin vi mem." Tiamaniere nokte la 24-an de februaro 1884 aperis la malsarena vorto GLÖT.

La tuta planlingvistiko svarmas je kuriozaj projektoj, kies radiko situas ene de plej serioza mistikismo: tia estis *Lingua Ignota* de Hildegarde von Bingen, tia estis *Balaibalân* en la islama mezepoko.

Ĉi tiu premiso pli ol pravigas la emon apliki al la teologia kampo analizan metodon rekte pruntitan de la lingvistika.

\* \* \* \* \*

La unua teoria elemento, kiun mi pruntas de lingvistiko estas koncepta distingo. Mi nomas ekde nun "religio" la socian produkton de la religio, kia ĝi realiĝas en difinita komunumo. Mi nomas "kredo" la individuan rezulton de la konscienco.

Religio kaj kredo estas realaĵoj klare distingeblaj, sed la dua subordiĝas al la unua. Same kiel nacia lingvo referencas al difinita kolektiva modelo, supera al la regionaj paroloj kaj al la stilaj nuancoj, tiel ĉiu kredanto referencas al iu komuna ideologio, kun ĝiaj dogmoj, profetoj, martiroj, ritoj, ordonoj. Kaj tamen, ene de la religio, li konservas proprajn votojn, preferatajn preĝojn kaj festojn, patronajn sanktulojn, personajn penson kaj praktikon. Des pli evidenta estas ĉi tiu distingo, se la religio toleras la individuan kaj liberan interpreton pri la Sanktaj Skriboj (jen la kazo de protestantismo) aŭ eĉ agnoskas ĝia principo la liberan kaj individuan serĉadon de la vero (bahaismo).

Malgraŭ tiu subordeco de kredoj al religio, ĉiu teologia novaĵo havas individuan originon, ĉar nenio eniras la religion, se ĝi unuavice ne pasis tra kredo. Aliflanke, ĉiu individua novaĵo estas kondiĉita de la eblecoj entenitaj de la religia sistemo, kiu ja konservas formojn kaj enhavojn delonge klasitajn kaj ordigitajn. Luther (Lutero) alportas teologiajn novaĵojn kiuj fontas el lia kredosperto; ili enradikiĝas en la vasta mozaiko de kristanismo, kaj fariĝas mem religio (objekto de kolektiva konscio).

Efektive, neniu Majstro venas por ŝanĝi. Esenco de ĉiu religio restas, por diri islamece, la eterna leĝo de amo. Jesuo agnoskas la instruon de Moseo, kaj Muĥammad (Mahometo) tiun de Jesuo; ili volas renovigi la interkonsenton kun Dio, aktualigi ĝin, religi la popolon al ties Dio. Kaj el malnova religio naskiĝas nova, same kiel el malnova lingvo naskiĝas nova.

La opozicio religio/kredo reliefas en la sinteno de individuo vidalvide al la socio. Se kredi signifas serĉi internan pacon, tiam la homo povas ne bezoni la aliajn: sufiĉas la vertikala rilato inter homo kaj Dio, kaj la vera religio estas tiu de anakoreto; alivorte dirite, al iluminito ne necesas la normoj de religio, ili estis kiel pramo, per kiu li trairis riveron, kaj transborde lia kredo ne plu bezonas ĝin.

En la opozicio religio/kredo oscilas do ankaŭ la konstanta pendolo de ĉiu teologio: kaj engaĝo favore al la aliaj, al la proksimulo, al la suferanto, kaj retiriĝo en sin mem, meditado, kontemplado.

\* \* \* \* \*

La dua elemento proponenda de lingvistiko al teologio koncernas la akson sur kiun situigi la sciencan esploradon pri religioj. Sinkronio kaj diakronio eniras tiel nian terminaron.

La akso de la samtempaĵoj, aŭ sinkronia akso, koncernas la simultanajn rilatojn inter konekzistantaj elementoj, sen interveno de la tempa faktoro.

La akso de la tratempaĵoj, aŭ diakronia akso, ebligas la analizon de unuopa fenomeno laŭ ties ŝanĝoj en la tempo.

Ni konsideru specifan temon: la pozicio de la virino en kristanismo. Laŭ la letero de Paŭlo al la Romanoj, la virinoj sidu en silento fone de la preĝejo. Se tiu ĉi admono (kaj la konsekvenca interpreto) estus apokrifa, neeviteble baldaŭ la virinoj ludus en la eklezioj rolon pli grandan ol en la 17-a jarcento, ekz-e: el sinkronia vidpunkto, iu registrus amendon de eraro. Sed el diakronia vidpunkto ne multe gravas, ĉu la teksto de Paŭlo estas apokrifa aŭ ne: gravas, ke tra multaj jarcentoj kristanismo evoluis kun tiu ĉi negativa kondiĉado. La konkludo povas esti, ambaŭkaze, en ĉiu religia fenomeno Dio planas, sed homoj plenumas; kaj en la dialektika rilato inter la Arkitekto kaj la masonistoj, ĉi-lastaj ludas rolon unuarangan.

Diakronia kaj sinkronia analizo, en teologio, pritraktas ĝuste tiun rolon. Sinkronio fotas la situacion de religio en certa epoko kaj loko; diakronio konsideras la tutan disvolvon de religia fenomeno ekde ĝia komenco. Sinkronio estas kvazaŭ la sekco de arbo laŭ horizontala akso, diakronio sekcas la trunkon vertikale.

Analoge funkcias diakronio kaj sinkronio en lingvistiko. Ekz-e, mi rajtas aserti, ke en 1901 Esperanto uzis ekskluzive la finaĵon -uj<sup>o</sup> por marki la naciojn (Germanujo, Polujo, eĉ Nederiandujo), sed en 1987 oni uzas tute regule ankaŭ aliajn formojn. Kaj ĉi tiu ke la



esprimo Pollando renkontiĝas pli ofte ol Polio, hodiaŭ, ja estas sinkronia rimarko. Se mi ekzamenus, kiu unuafoje sisteme utiligis la sufikson -i° (la Centra Oficejo de U.E.A. en Genève (Genevo), 1910), de kiu lingvo ĝi estas pruntita, ekde kiu jaro la Lingva Komitato formale "toleris" la uzon de la nova sufikso, kaj tiel plu ĝis hodiaŭ, mi farus diakronian analizon.

En ĉiu religio diakronio/sinkronio kunekzistas same kiel etiko kaj moroj. Etikon konstituas "la leĝo de amo neniam ŝanĝebla" (se uzi islaman esprimon), kaj ĝi situas konstante sur la diakronia akso. Male, la moroj varias tempe kaj loko: malpermesoj diversaj, pri alkoholo, sekso, krp. Ili estas finfine sinkroniaj incidentoj, kiuj dependas de la cirkonstancoj, ene de certaj limoj.

o o o o o

Sed ĉi tiu konsidero elvokas jam trian elementon de lingvistiko: la kontrasto inter signifato kaj signifanto. Fakte, ĉiu religio funkcias kvazaŭ lingva sistemo, kie la reguloj varias ene de certa krado. Eĉ la "eternaĵo", la leĝo de amo, estas dubinda. Ni kutimas je religioj de amo, same kiel ni kutimas je fleksiaj lingvoj. Sed ekzistas ankaŭ alispecaj lingvoj (aglutinaj, ekz-e), kaj ne ĉiuj religioj estas asimileblaj al tiu postulato de amo; konsideru ekzemple la sikan fenomenon. En tiu kazo ni devus revizii multajn sintenojn, akiri novan pensmanieron por kompreni la novaĵon.

Nu, provu daŭrigi mem ĉi tiun analizon!

Giorgio Silfer, Italio

## LITERATURA FOIRO

**Redaktejo:** via Pantano 17, I-20122 Milano - **Ĉefredaktoro:** Perla Ari Martinelli **Redaktoroj:** Georges Lagrange (*arta*), György Nanovfszky (*lingvistika*), Reto Rossetti (*pedagogia*), Giorgio Silfer (*socikultura*) - **Konstantaj kunlaborantoj:** Roger Bernard, Ed Borsboom, Giulio Cappa, Tazio Carvelaro, Ada Csiszár, Liven Dek, Reino Eriksson, Claude Gacond, Bernard Golden, Hagen Hirte, Kris Long, Herbert Mayer, Elio Migliorini, Julian Modest, Gabriel Mora i Arana, István Nemere, Gaudenzio Pisoni, Nicolino Rossi, Poul Thorsen, Pierre Ullman, Gaston Waringhien - **Grafika stabo:** Stella Agostini, Antonina Apollo, Gianluigi Gimelli, Giancarlo Mangini, Perla Ari Martinelli, Mikaela Picasso - **Administrejo:** CP 33, CH-1211 Genève 8 -

## KONFERENCO PRI LINGVO EN RELIGIO

Kelkaj dekoj da fakuloj pri lingvoj kaj lingvistiko renkontiĝis kun reprezentantoj de religiaj organizaĵoj en dutaga konferenco pri Lingvo en Religio, sub aŭspicio de la *Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-problemo (CED)*, en Paramus, New Jersey (*nju ĝerse, Nov-Jerzeo*), Usono, la 15-an kaj 16-an de majo, 1987.

La sesioj, kiujn invitis la Centro pri Internaciaj Studoj en Bergen Community College - dujara universitat-nivela kolegio apud la urbo New York (*nju jork, Nov-Yorko*) - celis analizi la rolon kaj praktikon de lingvoj en religio.

"Estas ĝenerale komprenate," asertis preparita referaĵo de la organizantoj de la konferenco, "ke iel tiuj du (lingvo kaj religio) komplementas kaj suplementas unu la alian, sed la karaktero de tiu rilato restas relative neesplorita."

Komentoj pri lingvo en religio kutime envidiĝas en tri kategoriojn, laŭ la referaĵo:

"(1) la rolo de la lingvo en la strukturo de kredo, (2) la funkcio de la lingvo en la diversaj praktikoj de la diversaj religioj aŭ kredoj, kaj (3) la lingvo kiel faktoro en si mem en la organizado de religiaj movadoj kaj en komunikado inter anoj de la sama religio."

Fakuloj esploris la gravecon de transkultura sentemo en la komunikado, la karakteron de religiaj lingvaĵoj, la debaton (foje tre varman) koncerne utiligon de genro-specifa lingvaĵo en biblia tradukado, kaj plurajn similajn temojn.

Dum la malferma sesio en la vespero de la 15-a de majo, Ted Mall, direktoro de kristana servado al la United Nations Community (komunumo de Unuiĝintaj Nacioj), organizaĵo de la Southern Baptist Home Mission Board (Sud-Baptista Enlanda Misia Komitato), informis la ĉeestantojn, ke

"la kristanan Evangelion oni devas komuniki en la kultura kunteksto de la aŭskultantoj kaj en lingvo komuna al ilia komprenkapablo." Li aldonis: "Oni povas plej efike komuniki tion per rekono de la graveco de lingvaj kaj kulturaj faktoroj."

"Ĉiu lingvo havas sian unikan strukturon kaj stilon," diris Adnan Yusuf, estro de la Araba Traduka Servo de Unuiĝintaj Nacioj, dum referaĵo la postan matenon pri la lingvo de la Korano. "La tera lingvo estas limigita al la sfero finita," diris Elvera Berry,

profesoro ĉe Roberts Wesleyan College. "Animo similas vorton. Oni ne povas vidi ĝin, sed oni scias, ke ĝi realas", tiel esprimis sin la sesjara filo de Berry, kun pli da intelekta profundo ol li konsciis.

"Inkluziva lingvo-uzo rekonas la valoron de ĉiuj personoj kaj ne limigas Dion,"

meditis Barbara Withers, de la Presbyterian Church, USA (usona presbiteriana denominacio). La demando ĉu eviti genro-specifan (aŭ ne-inkluzivan) lingvo-uzon generis multan diskutadon inter la sesioj. La legolibro de la National Council of Churches (Nacia Konsilantaro de Eklezioj), evitas genro-specifecon, "krom se la kunteksto aludas la historian Jesuon," diris S-ino Withers. Kiam Jesuo diris (en la angla traduko), "Let your light so shine before men," (homoj), tion oni ŝanĝu al "before others (aliaj), por eviti eventualan virseksecon de "men" (homoj kaj viroj) (Mat 5:16).

"Lingvo-uzo respegulu kiu ni estas kaj kies ni estas," aldonis S-ino Withers.

La gvidanto de la konferenco kaj direktoro de CED, Humphrey Tonkin, kiu estas prezidanto de la Ŝtata Universitato de New York en Postdam, resumis la demandon dum la diskutado jene: "Dio parolas Ĉiujn lingvojn..."

Dan Nicholas, Usono

La ĉi supran raporton tradukis H. Tonkin el la anglalingva originalo en la revuo de CED *Language Problems and Language Planning (LPLP)*, 1, 1988. La referaĵojn de la konferenco oni baldaŭ aperigos en la angla lingvo. LPLP estas abonebla ĉe Universala Esperanto Asocio, kaj la referaĵoj estos aĉeteblaj de la Libroservo de UEA.

Dan NICHOLAS, usonano, ĵurnalisto, help-direktoro de la National Communications Department, Salvation Army, en Verona, New Jersey (nacia komunikada fako de Sav-Armeo).

Humphrey TONKIN, usonano, prezidanto de Universala Esperanto Asocio, prezidanto de State University College, en Postdam, New York.

## Resumaro de la referaĵoj

afable transdonita de Humphrey Tonkin

Humphrey TONKIN : *Antaŭparolo*

La tri ĉeftemoj de la konferenco estis : (1) la rolo de la lingvo en la strukturo de religia kredo ; (2) la funkcio de la lingvo en la diversaj praktikoj de malsimilaj religioj kaj kredoj, kaj (3) la lingvo kiel faktoro en la organizado de religiaj movadoj kaj en la komunikado inter samreligi-anoj. La referaĵo kovras la formalajn prezentaĵojn en la konferenco, sed neformalaj interŝanĝoj kaj prezentaĵoj estis ankaŭ ampleksaj kaj viglaj.

Theodore E. MALL : *Lingvo kaj kulturo : unu perspektivo*

Kombino de lingvo kaj kultura kunteksto konsistigas la ĝustan komunikan kanalon en la praktikado de religio. Gravaj rekonas la diversecon de kulturaj valoroj, heredaĵo kaj vivostilo en la komunikado de la kristana Evangelio al homoj en plurisma socio. Dum ili prizorgas la kreskigon de la eklezio inter anoj de diversaj lingvaj kaj kulturaj grupoj, la Sudaj Baptistoj (Southern Baptists) aliras la demandon per uzo de du komunikkanaloj, lingvo kaj kulturo, simultane. El tio rezultis la plej rapide kreskanta sektoro de la Sudbaptista Kongreso (Southern Baptist Convention). La sektoron aktuale konsistigas duonmiliono da homoj en preskaŭ 5000 preĝejoj el 84 etnaj aŭ kulturaj grupoj kun 87 lingvoj kaj dialektoj.

Ankaŭ gravas eldoni materialojn por uzo en tiuj preĝejanaroj, kiujn oni ne simple tradukis el alia lingvo sed kulture akordigis al la grupo. Dinamisma ekvivalenteco preferindas al laŭvorta tradukado.

Lingvo kaj kulturo miksiĝas por formi kanalojn por komuniki la kristanan Evangelion. Por transdoni la mesaĝon, gravas interrilatoj, kiuj nutras komprenon kaj esprimon de lingvo kaj kulturo. Oni ne povas disdividi ies religion disde la aliaj aspektoj de ties ekzisto. Sekve, religia esprimado devas preni en konsideron la totalan homon en ties lingva kaj kultura medio.

Gilbert S. FELL : *Esploroj pri lingva praktiko kiel fonto de religiaj polusecoj, aŭ la neeviteblo de nesprimeblo*

Dupolusa aŭ oponeca pensado situata en duvaloraj logiko kaj parolado ŝajnas pli kaj pli kontraŭa al aktuala interpreto de la fizika-sciencia kompreno de la mondo. La okcidentan religian sintenon aparte aflikta tiu problemo, tia, kia ĝi manifestiĝas en teologia diskurso, tiel ke tiu sinteno riskas fariĝi ĉiam pli ignorinda. La aŭtoro mencias plurajn klarigajn sugestojn koncerne tiun profunde lokitan dupolusan pensadon. La mistika insisto pri reiro al simpla unueco estas rekonata sed ne akceptita.

Robert W. HALL : *La signifo kaj pravigo de religiaj propositioj*

La lingvaĵo de la kristanaj Sanktaj Skriboj estas plej bone komprenata kiel predikado sed ne instruado de la KERUGMA. Tiaj eldiroj malsimilas priskribajn eldirojn, kiuj postulas pruveblon en tio, ke ilin ne koncernas liverado de scio pri la estonteco. La lingvaĵo de la Sanktaj Skriboj similas prezentecajn deklarojn, kiuj alvokas al la aŭdanto, ke tiu adoptu difinitan vivovojon. Samkiel limigaj demandoj, ili malkaŝas unikan dimensio de la homa sperto.

Elvera BERRY & David BASINGER : *Inkluziva lingvouzo : formo aŭ substanco ?*

La termino "inkluziva", rilate al lingvaĵo pri Dio, ŝajnas interesi kaj koncerni la homojn ĉiam pli kaj pli intense. Dum pluraj ĉefaj eklezioj respondis al petoj pri lingvoreformo, multaj preĝejanaroj nur nun komencas sperti la tension, kiu rezultas el lingvoperturbo. La aŭtoroj asertas, ke vortoj estas pli ol iloj. Vortoj ne nur reprezentas homan sperton; ili formas kaj transcendas la sperton. Tio aparte veras se temas pri religia kredo, kiun la lingvo dominas, sed ne determinas. Ĉar, sen lingvo, oni ne povas elformi la kredon, tiu, kiu kreas lingvon pri supernaturaj temoj, kreas (aŭ komencas krei) la kredon. La aŭtoroj finas per priskribo de aktualaj petoj pri lingvoreformo kaj per pritakso de la kosto de ŝanĝo, la prezo de neŝanĝo, kaj la avantaĝoj de kompromiso.

Michael HUNTINGTON : *Mistikismo kaj la limoj de la lingvo*

Analizante la uzadon de la lingvo por esprimi ontologiajn kaj epistemologiajn konceptojn en la *Mistika teologio* de Ŝajn-Dionisio Areopagano kaj en partoj de liaj *Diaj nomoj*, la aŭtoro klopodas montri, ke, aldone al la tradicia distingo inter apofata kaj katafata teologio, ekzistas ankaŭ implicita distingo inter ontologiaj (meta-fizikaj) deklaroj kaj epistemologiaj deklaroj. Alivorte dirite, ekzistas du specoj de asertoj en tiuj mistikaj verkoj: la unua koncernas predikatojn aplikatajn al Dio, dum la dua koncernas asertojn pri la naturo de tio, kion oni povas efektive predikati pri Dio. Tiu distingo estas iagrade kaŝita pro la naturo de la lingvo kaj pro certaj karakterizoj de lingvouzo. Krome, iuj interpretoj de tiuj verkoj igis aŭtorojn kaj legantojn konfuzi ontologion kaj epistemologion. Post kiam oni klarigis kaj eksplikitigis tiun distingon, oni povas pli profunde kompreni la tekstojn kaj mistikismon ĝenerale.

Tiu analiza laboro iagrade implicas, ke oni devas "retrolegi" en la mezepokajn tekstojn nociojn el lastatempa pritrakto de la filozofio de la lingvo. Aliflanke, la mezepokaj mistikaj deklaroj pri tio, kion oni povas aŭ ne povas predikati pri Dio, povas ankaŭ kontribui al nia nuntempa kompreno pri la limoj de la lingvo. Oni povas plivastigi la mezepokajn nociojn pri tio, kion oni povas aŭ ne povas predikati pri Dio, tiel ke ili korekte aplikigu al granda parto de la homa sperto. Krome, mistikaj nocioj pri la transcendo de Dio estas pli kompreneblaj per analogioj kun ordinara homaj spertoj. En tiu rilato, oni povas distingi inter la transcendo ene de imanento kaj transcendo de imanento. Fine, la aŭtoro faras mallongan komparon kun la esprimo de similaj ideoj en la Zena tradicio, specife en la Diamanta sutro.

John B. ALPHONSO-KARKALA : *Mitaj kaj simbolaj vortaj strukturoj kaj laŭvorta signifo en la literaturo*

Lingvo kaj literaturo intime rilatas unu al alia. Kvankam la lingvo en sia primara funkcio komunikas ordinaran signifon laŭ lingvistikaj principoj, dum ĝi estas subigita al estetika esprimiĝo ĝi liveras matricon por komunikaj ekster-ordinaran literaturan signifon. Tia signifo estas sugestita, implicita aŭ elvokata el heredita kultura sperto. La mita konscio estas egale parto de la homa personeco kiel la racia kapablo aŭ la sentokapablo. Preter la sentokapablo, logiko kaj racio povas pluporti la serĉadon por la scio. Sed preter la limoj de la racio, kiam nenio alia ol "nubo de malscio" aperas, mita konscio liveras la kapablon de tiu "salto en la mallumon" kaj intucie "kaptas" iun aspekton de vero aŭ elementojn de eterne. Tiaj viziaj perceptoj,

transigitaj en abstraktajn aŭ homformajn imagojn, esprimiĝas en vortaj strukturoj en la literaturo. Tiuj intuiciaj "kaptaj" aŭ "proksimaĵoj" al vero kaj realo, en la formo de literaturaj mitoj kaj simboloj, radias pluralecon de signifoj preter la "laŭvorta" signifo. Vestitaj en sono kaj silento, tiuj mitaj kaj simbolaj DARSHANA, aŭ "indikoj de senmorteco", funkcias kiel nevortaj komunikiloj, kiuj strukturigas la signifon en centripetaj kaj centrifugaj formacioj. Esplorante ĉefverkojn de la monda literaturo, ni devas ekzameni la literaturajn sentformojn envolvitajn en tiuj verkoj aldone al la "laŭvorta" signifo. Eble la profundo de fido je kredosistemo pli firme radikigiĝas en "nubo de malacio" kaj nevortaj komunik-sistemoj ol en la evidenta laŭvortaj signifoj. Ĝis tiu grado, kompreno de mitaj kaj simbolaj vortostrukturoj fariĝis esenca, precipe dum epoko en kiu la diversaj fakoj teleskopigas tutmondajn spertojn, kaj tradicioj trovas ekumenan najbarecon ene de multfolia homa spiriteco.

J. P. van NOPPEN : *Fides quaerens verbum hodiernum : alternativaj kredoj kaj parolaj agoj*

"Alternativajn" kristanajn kredojn formas grupoj kaj individuoj, kiuj opinias, ke la tradiciaj formuliĝoj de la establita eklezio neadekvate respegulas la substancojn de ilia kredo. Unuflanke, oni agnoskas tiujn kredojn kiel aŭtentikajn esprimojn de la religia travivo, aliflanke oni malestimas ilin kiel egoismajn esprimiĝojn malhelpajn al la unueco de la eklezio. Se oni rigardas tiujn kredojn kiel alispecajn parolajn agojn, oni ne devas rigardi ilin kiel konkurencajn aŭ reciproke ekskluzivajn esprimojn de fido. La aŭtoro esploras kelkajn ekzemplojn de alternativaj kredoj, klopodas starigi klasifisistemon, kaj prikomentas ilian utiligon kaj akcepton en katolikaj kaj protestantaj medioj.

Arild Juel PETERSEN : *La bahajismo kaj universala lingvo*

Se ni akceptas la aŭtoritaton de la dia revelacio, ĉiuj lingvoj estas kunligitaj kiel en porĉiama progressa organismo, unuigitaj en sia babela origino, diversigitaj pro la eksploda dismigro de la homa familio, kaj neeviteble destinitaj kunfandiĝi en unu lingvon pro la maturiĝo de la homaro en la Ora Epoko de universala civilizo, nome la Dia Regno sur la tero. Ĉiun jarmilon, pli-malpli, la religioj plibonigas la daŭran dialogon inter la homoj tiel profunde, ke kompletaj civilizoj ekfloras ĉirkaŭ la mistero de la Vorto de Dio. La Nekonebla fariĝas konata per la Vorto, kaj pere de unu el la plej insistaj homaj kapabloj en asignita simbolo aŭ spegulo, kiu povas redoni kaj reprezenti la realon. La principo, kiu montriĝis decida al la unueco de la Bahaa Monda Komunumo, kuntirita el la plejmulto de lingvaj kaj religiaj originoj, estas, ke, same kiel la surteraj lingvoj estas interrilatitaj, progressaj kaj evoluantaj harmonie kun la mensa kaj socia ordo de la homaro, tiel la Vorto de Dio progresse malkaŝiĝas pere de la grandaj mondaj religioj, ĉapitroj de unu universala dia indiĝena lingvo, kiu evoluas harmonie kun la spirita kapacito de la homaro.

Jerzy KORYTKOWSKI : *Esperanto por religiaj celo*

Kiel helpa lingvo, Esperanto povas plenumi transcendan rolon en la moderna mondo. La pretendo de Esperanto, ke ĝi fariĝu internacia lingvo, trovas sian subtenon ĉefe en la fakto, ke, unue, la latina restas malfacila lingvo por internacia komunikado; due, ekzistas larĝa konscio pri la urĝa bezono de helpa lingvo por faciligi internaciajn kontaktojn, ankaŭ ene de la




Katolika Eklezio, kaj, trie, la plej taŭga lingvo por tia celo ŝajne estus lingvo kiel eble plej neŭtrala kaj ne ligita kun iu ajn unuopa lando aŭ nacio. Se utiligo de la latina kaŭzus nek ĵaluzon nek reziston flanke de iu ajn nacio kaj speciale avantaĝus nenium, tio eĉ pli validas rilate Esperanton. Sekve, esperantistoj el diversaj kristanaj eklezioj, judoj kaj anoj de aliaj religioj, frue en la historio de la lingvo komencis uzi la lingvon de Zamenhof por religiaj celoj. Interesiĝo pri Esperanto kreskadis inter kristanaj institucioj de supera edukado - seminarioj kaj universitatoj. Ĉiam pli kaj pli, la (Romkatolika) Eklezio akceptas Esperanton kiel liturgian lingvon. Praktika sperto kaj esploroj ŝajnas sugesti, ke Esperanto, nun en sia centa jaro, estus la plej taŭga solvo al la problemoj de internacia komunikado por ĉiuj eklezioj tra la tuta nuntempa mondo.

Frank A. WRIGHT : *Preĝu, preĝu, praktiku kaj proklamu : ekleziaj lektoroj kaj la enradikiĝo de lingva konduto*

Oni ofte konsideras lingvolernadon en la kunteksto de fremdlingva lernado. Tiu vidpunkto malatentas la fakton, ke homoj daŭrigas la lingvolernadon en la propraj lingvaj komunumoj dum ili trairas sian vivon. La vidpunkto ankaŭ limigas la nocion de lernado al akiro de gramatiko. La etnografiaj donitaĵoj en tiu ĉi referaĵo ekzamenas kiel tiuj, kiuj deziras fariĝi lektoroj en katolika paroĥo, lernas la lingvon kaj la socian rolon de tiu posteno. Uzante "dikan priskribon" de trejna sesio, la aŭtoro montras kiel lingvolernado inkluzivas gravajn estetikajn konsiderojn aldone al gramatiko. Li ankaŭ esploras kiel lingvolernado estas integra parto de la socihistoria procedo.



Published by the University of Texas Press,  
Box 7819, Austin, TX 78713, U.S.A., in cooperation with  
the Center for Research and Documentation on World Language Problems



EKZEGEZO : KIEL KOMPRENI ?

Studente teologion, oni "survoje" renkontas multajn fakojn. Kompreneble tio iom diverĝas depende de la lando, kie, aŭ la jardeko, kiam, aŭ la eklezio, en kies mezo oni vivas. Tiel, ekz-e, unu mia ekslernantino pri klasikaj lingvoj, kiu ĉijare fariĝis reformita pastorino, dumstude multege devis okupiĝi pri psikologio kaj sociologio apud la plej tradiciaj fakoj ; en la (reformita) Libera Universitato de Amsterdam (kiun oni nepre ne konfuzu kun la "neŭtrala" Urba Universitato de Amsterdam) la teologia studo konsistas el unu tute interplektita tutaĵo, konsistanta el fakoj tradicie teologiaj, biblioscienco, dogmatiko, ekzegezo, k. s., kaj fakoj pli "humanismaj", helpe de kiuj la gestudentoj trejniĝas por la pli praktika flanko de la pastora laboro. En la pli tradiciema Ŝtata Universitato de Utrecht, kie mi mem studis teologion, oni sin preskaŭ ekskluzive limigis al la plej tradiciaj teologiaj fakoj.

Por eksteruloj, tio ĉi eble sonas iom mirige. Kutime teologion oni konsideras iom stranga universitata fako. Sed laŭleĝe - kaj laŭfakte - teologio ne estas unu sola "fako universitata", sed tuta fakultato. Apud la fakultatoj jura, lingva, medicina, natursciencia, k. a.

Unu el la fakoj nomiĝas Ekzegezo. Por ekzameniĝo oni distingas inter "ekzegezo malnov-testamenta" kaj "ekzegezo nov-testamenta". La profesoroj-fakuloj instruas ĉe ni neniam pri ambaŭ : por tio la lingva baro estas tro granda.

Traktante certan eron el la Biblio, la ekzegeza profesoro, unue skizas la totalan verkon, kies parton oni ekzegeze prilaboros : ekz-e ĉapitron de Jeremia elektinte, li unue skizas la historian fonon de Jeremia mem, politike kaj religie, poste li skizas la problemojn ligitajn al la estiĝo de la biblia verko Jeremia (ĉu en ĉiuj ekzistantaj formoj, en la Masora Teksto, en Peŝita, Septuaginto, Vulgato, k. s., en Targum k. a. judaj tekstoj ĉiam samas la teksto, kaj se ne : kion instruas pri ĝia historio tiuj diferencoj ? Ekz-e tuta grupo da ĉapitroj estis foje "bloke" transmetita aliloken : kial ?) kaj kion el la verko mem aŭ el pli malpli samepokaj tekstoj oni povas dedukti rilate ĝian verkiĝon : ĉu la aŭtoro mem verkis aŭ ĉu sekvantoj (eble "stenografie" ?) notis liajn profetajn diraĵojn kaj kiamaniere finfine, kaj kiuepoke, redaktiĝis la tutaĵa nuna biblia libro ? Kaj el ĉi tiuj nur kelkaj etaj atentigoj oni ja facile povas kompreni, ke envere temas (certe rilate la tutan Biblion) pri la proverbeca "maro trinkota". Kompreneble do la profesoro por siaj gestudentoj devas elekte limigi la eblajn temojn

traktotajn. Ja ne gravas, trakti ĉion, sed verŝajne multe pli gravas, ke li montru al ili, laŭ kiaj metodologiaj procedoj oni kapablas solvi (aŭ eĉ nur solveti) certajn ĉi-terenajn demandojn.

Poste venas do la elektita ĉapitro mem. Unue ĝia teksto-formo : kiel fidinda estas la transdoninta tradicio, specife rilate al ĉi tiuj versikloj ? Kaj precipe ĉe la N.T. oftege estas teksto-problemoj, multe pli ol ĉe la MNT. Tamen, ankaŭ ties Masora Teksto foje liveras interesajn problemojn : por tiujn kompreni, la gestudentoj bezonas la tekstkritikan eldonon de *Biblia Hebraica Stuttgartensia* : en la grandaj kaj malgrandaj masoraj notoj, kiujn uzas la profesoro krome, ankaŭ troviĝas multo sciinda. Por vere serioze kompreni tekston, unuavice necesas sufiĉa fidinda scio pri la koncerna lingvo ; tiujn do - la grekan kaj la latinan jam antaŭ ekstudo pri teologio, la hebrean komence de la teologia studo, oni plurjare pristudadis antaŭ ol ekstudi pri ekzegezo.

Unue grupe oni ĝenerale tradukas la tutaĵon. Kaj ĉe tio pri-traktas eventualajn lingvajn apartaĵojn de la koncerna aŭtoro. Poste oni okupiĝas pli funde pri difinitaj "frapaj" terminoj, ekz-e en ĉapitro de Jeremia la esprimo "homoj de la lando" : ĉu temas pri "kamparanoj" kaj se jes, ĉu kun kromnocio de "stultuloj" aŭ ĝuste male en pozitiva senco de "ne influitaj de la aĉa urba etoso" ; aŭ ĉu nur temas pri "genta aparteno" kontraste kun "eksterlandanoj" aŭ "vagantaj migruloj" ; ktp. Ĉe tia pri-termina analizado oni oftege konsultas retrovitajn elkavaĵojn, surskribojn, tekstojn ekster-bibliajn de ĉirkaŭaj popoloj, ktp.

Nova stadio estas struktura analizo de la tuta elektita ero : ĉiu teksto, iel, estas literature strukturita. Sed grande diferencas ĉu temas pri aro da leĝaj preskriboj aŭ pri ekzalta am-deklaro, pri pli malpli mitologia rakonto aŭ pri okulatestaĵo historia, pri profeta eldiro aŭ pri ajna konversacio : do : kiu literatura formo estas, kiun celon tiu formo kutimas havi, kiel la aŭtoro dozas siajn sciigojn, ĉu tuj mezen en la ĉefajon aŭ ĉu singarde per kvazaŭa ĉirkaŭvojo ? ktp.



La fakta celo de tia pritraktado de la bibliaj tekstoj, estas : provi atingi certan relative fidindan komprenon pri tio, kion siaepoke la origina aŭtoro mesaĝis al sia publiko. Ekzegezo ne povas liveri trafajn predikojn tuj uzeblajn en la nunaj preĝejoj por edifi aŭ por admoni, por fortigi aŭ riproĉi la kristanaron. Ekzegezo pri tia apliko de la Biblia mesaĝo ne okupiĝas. Tion faras alia fako, la predikarto, homiletiko. Sed anticipe ankoraŭ inter-ŝoviĝas la hermeneŭtiko\* !

Ekzegezo per sia strebado al kiom eble plej pura kompreno pri la origina mesaĝo de la teksto, provas averti nin nuntempulojn kontraŭ tro facilanima identigo inter la malnovaj vortoj kaj esprimoj de la Biblio unuflanke kaj nia kristana tradicio kun ties dogmaj eldiroj, ties liturgiaj kristaliĝoj, ties ekleziaj kutimoj aliflanke. Kaj kiel tia, Ekzegezo estas ege grava fako en la fakultato teologia.

Gerrit Berveling, Nederlando

Hermeneŭtiko\* : en la senco, kiun oni donis al ĝi misstude, estas subfako filozofia, kiu ĉefe cirkulas ĉirkaŭ aferoj, kiel : ĉu entute pruveblas, ke kiam persono A diras kompreni personon B, ke tiam vere okazas kompreno ; kio estas kompreno ; kiel eblas ke por nuna situacio senhave oni uzas vortojn, origine diritajn en tute alia alkultura aliepoka situacio ; ktp. Sed tio estas demandaro ampleksa - eble por alia fojo.

Gerrit BERVELING (Ĥerit), nederlandano (1944), fakulo pri klasika filologio latina kaj helena, teologo, esperantisto depost 1972, pastoro en la Remonstranta Eklezio, kunlaboras en diversaj revuoj, eldonas la serion *Voĉoj Kristanaj*.



serieto celanta aŭdigi la plej diversajn vxojn  
de kristanismo:  
de liberala ĝis ortodoksa  
de rom-katolika ĝis protestanta  
sendepende de dogmaj limigoj  
depost Praktistanismo ĝis la nuno  
intern-eklezie, ekumene, interreligiĝe kaj tuthomare

aperis ĝis nun nur kelkaj numeroj. Ĉiu estas plene memstara.  
kiu havas ion seriozan por prezenti, sciigu tion al ni. kiu  
volas subteni nian entreprenon, ĉu per donaco ĉu per prunto  
ĉu alimaniere, sciigu tion al ni.  
diskonigu niajn eldonaĵojn! diskonigu niajn eldonaĵojn!

Jam aperis:

- 1: La Evangelio laŭ Petro & La Morto de Jesuo kaj kio poste? apokrifa evangelio k eseo originala. 12 paĝ. 1,80 guld.
- 2: Tertuliano - Apologio (el la jaro 197 p.Kr) gravega latina verko el la frua eklezio. trad. Gerrit Berveling. 116 p. 9,90 guld.
- 3: Sin-konservo eseoj k predikoj pri kristanismo k nukleaj armiloj. 52 p. 6,30 guld.
- 4: Al Diogneto. apologieto el la komenco de la 2a jc. el la helena trad. Isai Sumber. 16 p. 1,80 guld.  
ĉiuj ĉi tiuj en dua eldono
- 5: Kenneth Twinn - Unitariismo; skizo pri la kredoj historio k organizo de la religiuloj nomitaj Unitarianoj. la aŭtoro estas unitaria pastro. 24 p. 1,80 guld.
- 7: Gerrit Berveling - Dio/Kristanismo/Aliaj Religioj. studaĵo pri 'teologio de la religioj'. 36 p. 4,20 guld.
- 8: La Evangelio laŭ Maria Magdalena. prelego k traduko de la restantaj fragmentoj de apokrifa evangelio. grava pro la rolo de virinoj en la frua kristanismo. 12 p. 1,80 guld.
- 9: Jam Temp' Está!; la "Kairos-dokumento" de Sudafrikaj kristanoj. kontraŭ ras-apartigo. 32 p. 4,20 guld.
- 10: Beatrijs. mezepoka romkatolika Maria-legendo. el la nederlanda. 24 p. 3 guld.
- 11: Isai Sumber - Kie oni trovas tion en la Korano? malgranda konkordanco. 32 p. 4,20 guld.
- 12: Tertuliano - Kuraĝigo por la Martiroj. por edifo de estontaj martiroj en Kartago, ĉ. 197 p.Kr. el la latina. 12 p. 1,80 guld.
- 13: Kantu al la Eternulo. kantaro de (ĉefe ĉeĥaj) kristanoj. trad. el diversaj lingvoj de Jiří Kořínek k.a. 44 p. 6 guld. 2a eld.
- 14: M.de Goeij - La virino en la Judismo. el la nederlanda. 48 p. 6 guld.
- 15: SERELI POETAS; poemoj el la K.E.L.I.-rondo. komuna eldono de K.E.L.I. kaj VoKo. por honori la 100-jariĝon de Esperanto. 48 p. 6 guld.

krome prepariĝas verkoj  
(i.a.) pri sameksmo k Kristanismo  
pri arta fekundigo k moralo  
praktistanaj kantoj en traduko  
ekzegeza komentario pri JONA

k.m.a.

eld. VoKo  
Coornhertstraat 50  
3132 GR VLAARDINGEN  
NEDERLANDO

## EVANGELIZO

Demando : Evangelizo, via tasko ĉe la Ekumena Konsilantaro de Eklezioj, estas iel precipe problemo pri komunikado. Ĉu vi povas fari mallongan historiaĵon pri la solvoj tentitaj dum la pasintaj jarcentoj ?

Respondo : Evangelizo kuntrenas komunikadon, sed ĝi ne estas problemo pri komunikado. La eklezioj, kiuj rigardas evangelizon kiel problemon, mortas. Evangelizo estas la komunikado de la Bona Novaĵo pri Jesuo Kristo. Tia, ĝi devas zorgi pri la konsideroj de homoj provantaj komuniki, filozofiaj, sociologiaj, lingvistikaj, kulturaj. Sed, gravaj kiel estas tiuj ĉi konsideroj, ili estas duarangaj al la teologia, la abismo inter Dio kaj la falinta homaro, ne escepte de la evangelizisto. Tiel, la konfeso de Paŭlo :

"Kristo sendis min... por prediki la Evangelion, ne en saĝeco de vortoj, por ke la kruco de Kristo ne vantiĝu."

Tio ĉi metas la sciencon pri komunikado, en ĝian ĝustan lokon temante pri evangelizo, humilan sed gravan lokon.

Tiel, kristanoj eraras, se ni pensas, ke kiam ni mastras la rimedojn kaj medion de komunikado, ni mastras evangelizon. Christendom (Kristanaro), la kampanjoj, kultura kristanismo kaj Church Growth (Eklezia Kresko) per la Homogenous Unit Principle (Principo de Homogena Unuo), ĉiuj diras la saman, ke kiam kristanoj direktas, ni evangelizas pli bone. Mi timas, ke ĉi tiu kompreno ne multe rilatas kun la kruco.

Demando : La kultura kunteksto estas esenca por la religia komunikado. Kiu ekzemplo povus ilustrati tion, kio nun tamen ŝajnas esti vero ?

Respondo : La kultura kunteksto estas esenca por la religia komunikado. La klasika bildo de Jesuo pri homa persono, perdiĝinta ŝafo sen paŝtisto, estas interpretita kiel pekanto, iu kiu atencis la leĝojn de Dio. Tio ĉi estas ofte la legado de eŭropa kristanismo, kun ĝia grava rango en la дума ordo. En aliaj kulturoj, speciale kie kristanismo estas malforta kaj malestimata, la tieaj kristanoj ofte interpretas la saman bildon de la ŝafo sen paŝtisto, kiel la re-pekinton. Ambaŭ interpretoj agnoskas la hororon de peko en la homa ekzisto, sed grande varias en ĝiaj implikoj por evangelizo, ja, por la signifo de kristanismo.



Demando : De via posteno, vi povas konstati la grandan variecon de la situacioj de la Eklezio. Miskomprenoj povas naskiĝi en la ekumenisma dialogo. Kiu, ekzemple ?

Respondo : Mi bedaŭras, neniu bona respondo !

Demando : En via laboro, vi multe uzas la perleteran komunikadon. Kiujn avantaĝojn kaj malavantaĝojn vi spertis ?

Respondo : E. K. E. havas multajn ilojn en sia komunikado al eklezioj kaj socio. La *Monata Letero pri Evangelizo* estas nur unu inter multaj. Kiel leteró, kiel aparta de novaĵletero aŭ ĵurnalo, ĝi agadas sur pripensiga kaj prova nivelo. Ĝi donas la procezon kaj ne nur la bazlinion. Ĝi tial invitas al partopreno de personoj, kiuj ankaŭ pripensas pri evangelizo. Kaj multaj el ili hodiaŭ estas pripensemaj pastoroj kaj laikaj gvidantoj en la komunumoj. La *Monata Letero* probable spegulas ekzakte, kie E. K. E. kaj ĝiaj aliĝintaj eklezioj situas pri evangelizo : klaran devontigon kaj fortegan deziron pri evangelizo laŭ la maniero de Kristo.

Raymond Fung, Svislando  
intervjuita kaj tradukita de Philippe Cousson

Raymond FUNG, hongkonga ĉino (47-jara), baptisto. Post 15 jaroj en industria misio en Azio venis al Genèvo (Genevo) kiel sekretario por evangelizo ĉe Ekumena Konsilantaro de Eklezioj. Ne esperantisto. Edzo kun 2 infanoj. Plej fama libro : *Households of God on China's soil* (Domanaroj de Dio sur la grundo de Ĉinio).



A MONTHLY LETTER ON EVANGELISM

MONATLICHER INFORMATIONSBRIEF ÜBER EVANGELISATION

LETTRE MENSUELLE SUR L'ÉVANGÉLISATION

每月宣教音信

Case postale N° 66 · 150, route de Ferney · CH-1211 Genève 20/Switzerland

KRISTANA KONGRESO

EN ANNAN COURT

La 22-an ĝis la 29-a de julio




David Featherstone,  
121 Limsfield Road,  
Sanderstead, Surrey, CR2 9LF

GERMANUJO

Bad Wimpfen

Biblia Sabato-Dimanĉo  
(plilongigita)  
28 aprilo - 1 majo 1989

Bernhard Eichkorn,  
Romäusring 20,  
D-7790 VS-Villingen



EN LA KVINA NUMERO

oooooooo

*La reveno de Jesuo - motivo por la Eklezio*  
(Hugh Martin)

*Realigo de la Regno (Jelly Koopmans)*

*Elizeoj, nirvanoj kaj alireligiaj paradizoj*  
(Bedegi Gyöző)

*La veno de la dommastro (J. F. Willey)*

*Regno de Dio - revo de Dio (Gerrit Berve-  
ling)*

*La reveno de Jesuo - kion atendi ? (David  
Featherstone)*

*Konsolo por la homaro (Karol Baklarz)*

*Homoj konstruas al si malregnon - Gen 11*  
(Jacques Tuinder)

*Sabato - premisoj de la Regno (Alain Martin)*

FEATHERSTONE (David). - *La Biblio - skriba komunka-  
aĵo de Dio.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 4, 1988, pp. 3-6.

Tra la Sanktaj Skriboj, nome la BIBLIO, DIO parolas  
al ni.



PORTMANN (Douglas). - *Jesuo - la modela komunikanto.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 4, 1988, pp. 7-14.

JESUO KRISTO venis kun mesaĝo. En JOHANO 4:1-26 li  
modele komunikis.



Tiuj ĉi paĝoj estas modeloj por reprodukti  
katalog-slipojn. Sur ĉiu estas indeksa resumo, kun  
la deskriptoroj (ŝlosil-vortoj) majuskle indikitaj.  
Malantaŭ ĉiu estas la tradukoj de tiu ĉi resumo.  
Vidu p. 64.

A travers les Saintes Ecritures, c.à.  
d. la BIBLE, DIEU nous parle.

In der Heiligen Schrift, nämlich der  
BIBEL, spricht GOTT zu uns.

Attraverso gli Scritti Sacri, cioè la  
BIBBIA, DIO ci parla.

GOD speaks to us through the Holy  
Scriptures, i.e. the BIBLE.

A través de las Sagradas Escrituras,  
o sea la BIBLIA, DIOS nos habla.

JESUS CHRIST est venu avec un message.  
Dans JEAN 4:1-26 il est un modèle de  
communicateur.

JESUS CHRISTUS kam mit einer Botschaft.  
JOHANNES 4,1-26 hat er sie beispielhaft  
vermittelt.

GESÙ CRISTO è venuto con un messaggio.  
In GIOVANNI 4:1-26 ha dato un modello  
di comunicazione.

JESUS CHRIST came with a message. In  
JOHN 4:1-26 he communicated it per-  
fectly.

JESUCRISTO vino con un mensaje. En  
JUAN 4:1-26 es modelo de comunicación.

TWILLEY (John F.). - *1 Korintanoj 14:11.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 4, 1988, pp. 15-19.

Komentante la versiklon 1 KORINTANOJ 14:11, la  
aŭtoro mencias la PAROLON PER LINGVOJ.

ZHAO Zhilian. - *La Vorto de Dio enkarniĝinta en  
homan lingvon.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 4, 1988, pp. 21-24.

DIO serĉas komuniki, komunikas per JESUO KRISTO,  
tra la homaj LINGVOJ, tra la KULTUROJ.



Commentant le verset 1 CORINTHIENS  
14:11, l'auteur mentionne le PARLER  
EN LANGUES.

In seiner Auslegung des Verses  
1 KORINTHER 14,11 erwähnt der Verfas-  
ser das ZUNGENREDEN.

Commentando il versetto 1 CORINZI 14:  
11, l'autore menziona il PARLARE IN  
LINGUE.

In his commentary on 1 CORINTHIANS  
14:11 the author mentions SPEAKING IN  
TONGUES.

Comentando el versículo 1 CORINTIOS  
14:11, el autor menciona el HABLAR EN  
LENGUAS.

DIEU cherche à communiquer, communi-  
que par JESUS CHRIST, par les  
LANGUES humaines, par les CULTURES.

GOTT sucht sich mitzutellen ; er teilt  
sich mit durch JESUS CHRISTUS, in den  
SPRACHEN der Menschen, durch die  
KULTUREN.

DIO cerca di comunicare ; comunica  
mediante GESÙ CRISTO, attraverso le  
LINGUE umane, attraverso le CULTURE.

Trying to communicate, GOD communi-  
cates through JESUS CHRIST, through  
human LANGUAGES and through CULTURES.

DIOS busca comunicarse, se comunica  
por JESUCRISTO, a través de la  
LENGUAS humanas, a través de las  
CULTURAS.

GISHRON (Jeremi). - *La Sankta Lingvo kaj la  
Internacia.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 4, 1988, pp. 25-39.

LINGVO estas ligita kun MESAĜO. La aŭtoro komparas  
ESPERANTOn kaj la HEBREAN LINGVOn, i.a. pri la  
INTERNA IDEO.

COUSSON (Philippe). - *Kristanoj antaŭ lingva  
diverseco.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 4, 1988, pp. 41-48.

Post aliro al GENEZO 11:1-9 kaj AGOJ 2:1-13, la  
aŭtoro studas la LINGVAN SITUACION kaj la ekziston  
de ESPERANTO. Kiel agadus KRISTANAJ ESPERANTISTOJ ?

Une LANGUE est liée à un MESSAGE.  
L'auteur compare l'ESPERANTO et  
l'HEBREU, entre autre au sujet de  
l'IDEE INTERNE.

SPRACHE ist gebunden an eine  
BOTSCHAFT. Der Verfasser vergleicht  
ESPERANTO mit dem HEBRÄISCHEN, u.a.  
im Blick auf die INNERE IDEE.

LINGUA e MESSAGGIO sono tra loro  
collegati. L'autore mette a paragone  
l'ESPERANTO e l'EBRAICO, tra l'altro  
in riferimento all'IDEA INTERNA.

LANGUAGE is tied up with a MESSAGE.  
The author compares ESPERANTO and  
HEBREW, and amongst other things the  
INNER IDEA.

La LENGUA va ligada al MENSAJE. El  
autor compara el ESPERANTO y la  
LENGUA HEBREA, en relación, entre  
otras cosas, con la IDEA INTERNA.

Après une référence à GENESE 11:1-9  
et ACTES 2:1-13, l'auteur étudie la  
SITUATION LINGUISTIQUE et l'existen-  
ce de l'ESPERANTO. Comment devraient  
agir les ESPERANTISTES CHRETIENS ?

Nach der Beschäftigung mit GENESES  
11,1-9 und APOSTOLGESCHICHTE 2,1-13  
untersucht der Verfasser die SPRACHEN-  
SITUATION und das Vorhandensein des  
ESPERANTO. Wie sollen sich CHRISTEN  
ALS ESPERANTO-SPRECHER verhalten ?

Dopo un approccio a GENESI 11:1-9 e  
ATTI 2:1-13, l'autore esamina la  
SITUAZIONE LINGUISTICA e l'esistenza  
dell'ESPERANTO. Come agirebbero gli  
ESPERANTISTI CRISTIANI ?

With reference to GENESIS 11:1-9 and  
ACTS 2:1-13, the author studies the  
LANGUAGE SITUATION and the existence  
of ESPERANTO. How should CHRISTIAN  
ESPERANTISTS act ?

Después de acudir a GENESES 11:1-9 y  
HECHOS 2:1-13, el autor estudia la  
SITUACIÓN LINGÜÍSTICA y la existencia  
del ESPERANTO. ¿ Cómo actuarían unos  
ESPERANTISTAS CRISTIANOS ?

KANTELE (Olavi). - *La lingvo de la katedraloj.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 4, 1988, pp. 49-54.

La aŭtoro trairas la diversajn ARKITEKTURAJN STILOJN  
de la PREĜEJOJ, kaj la diversajn uzitajn SIMBOLOJN.



CADEI (Battista). - *Percepti la aŭskultantaron.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 4, 1988, pp. 55-58.

RADIO-ELSENDADO postulas AŬSKULTANTOJN, kaj konon  
pri ili.



L'auteur parcourt les divers STYLES ARCHITECTURAUX des EGLISES (BATIMENTS), et les divers SYMBOLES utilisés.

Der Verfasser behandelt die verschiedenen BAUSTILE von KIRCHEN und deren verschiedene SYMBOLE.

L'autore percorre i diversi STILI ARCHITETTONICI delle CHIESE e i diversi SIMBOLI usati.

The author reviews the various STYLES OF ARCHITECTURE in CHURCHES, and the various SYMBOLES used.

El autor recorre los diversos ESTILOS ARQUITECTÓNICOS de la IGLESIAS y los diversos SIMBOLOS usados.

La RADIODIFFUSION demande des AUDITEURS, et une connaissance de ceux-ci.

RUNDFUNKSENDUNGEN brauchen HÖRER, die man kennt.

La TRANSMISSIONE RADIOFONICA richiede ASCOLTATORI e conoscenza di essi.

RADIO BROADCASTING requires LISTENERS, and knowledge about them.

La RADIODIFFUSIÓN exige OYENTES y conocimiento de los mismos.

PAULI (Evaldo). - *Kiel komuniki filozofion.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 4, 1988, pp. 59-63.

Komuniki FILOZOFION postulas bonan uzon de LINGVO.

BESSENYEI Tibor. - *La poeta lingvo : bildoj, vortoj.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 4, 1988, pp. 65-70.

POEZIAN LINGVON konsistigas elvokivaj LITERATURAJ BILDOJ kaj elektitaj VORTOJ por efike komuniki sentojn.

Se vi posedas tiun ĉi revuon, aŭ antaŭan numeron, ne pere de abono, bonvolu indiki tiun ĉi posedon al la administracio, tiel vi povos esti pli bone informita.



Communiquer la PHILOSOPHIE demande un bon usage de la LANGUE.

Die Vermittlung von PHILOSOPHIE verlangt eine gute Beherrschung der SPRACHE.

Comunicare FILOSOFIA richiede un buon uso della LINGUA.

Communicating PHILOSOPHY necessitates good use of LANGUAGE.

Comunicar FILOSOFIA exige un buen uso de la LENGUA.

La LANGUE POETIQUE comporte des IMAGES MITTERAIRES évocatrices et des MOTS choisis pour communiquer efficacement les sentiments.

DICHTERISCHE SPRACHE besteht aus aussagekräftigen LITERARISCHEN BILDERN und eines besonderen WORTSCHATZ, um Gefühle eindrücklich mitzuteilen.

La LINGUA POETICA consta di FIGURE LETTERARIE evocatrici e di PAROLE scelte per comunicare sentimenti in maniera efficace.

POETIC LANGUAGE is made up of evocative LITERARY PICTURES and selected WORDS to communicate feelings effectively.

La LENGUA POÉTICA la constituyen IMÁGENES LITERARIAS llamativas y PALABRAS escogidas para comunicar eficazmente los sentimientos.

SILFER (Giorgio). - *Lingvo kaj religio - analiza paralelismo.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 4, 1988, pp. 71-74.

LINGVO kaj RELIGIO havas komunajn trajtojn. La aŭtoro paralele analizas ilin.

BERVELING (Gerrit). - *Ekzegezo : kiel kompreni ?*

*Evangeliaj Kajeroj*, 4, 1988, pp. 81-83.

Kio estas la teologia fako EKZEGEZO ?

Sur via adres-etikedo troviĝas du numeroj. La unua estas la numero de via adreso en mia sliparo, kaj la dua, interkrampa, estas la numero de la lasta *Evangeliaj Kajeroj*, kiun vi ricevos, se vi ne plu abonos aŭ ne plu verkos.

LANGUE et RELIGION ont des traits communs. L'auteur les analyse parallèlement.

SPRACHE und RELIGION haben gemeinsame Kennzeichen. Der Verfasser stellt in seiner Analyse beide nebeneinander.

LINGUA e RELIGIONE hanno caratteri comuni. L'autore ne fa un'analisi parallela.

LANGUAGE and RELIGION have common characteristics. The author analyses them in parallel.

LENGUA y RELIGIÓN tienen rasgos comunes. El autor las analiza paralelamente.

En théologie, qu'est-ce que la matière appelée EXEGESE ?

Was versteht man in der Theologie unter EXEGESE ?

Che cosa è la disciplina teologica che va sotto il nome di ESEGESI ?

What is the theological topic of EXÉGESIS ?

¿ Qué es la especialidad teológica llamada EXEGESIS ?

## ABONOJ

Abono por du numeroj, t.e. unu jaro : 70 FRF.  
(vi nepre indiku ekde kiu numero).

- al Philippe Cousson, Le Hameau des Plais, Nouaillé-Maupertuis, 86340 La Villedieu du Clain, Francujo.  
per poŝta konto, Philippe Cousson, 244 45 X, Limoges, Francujo.  
aŭ per internacia poŝta manda > en FRF.  
aŭ per 16 internaciaj respondkuponoj.
- aŭ al Aŭstrujo Heinz Platzer, Brünnerstr. 107-109/2/1, 1210 Wien  
OPK-konto 3675.724, Heinz Platzer  
Belgujo Jacques Lemaire, rue des déportés 100, 6180 Courcelles  
konto 001-0405933-64  
Britujo Thomas Neil, 82 Glasgow Rd, Kilmarnock, KA3 1UN  
nacional giro, FEBC, 65274 0006  
Irlando Maire McIlarney, Mill R., Whitechurch Rd, Rathfarnham,  
Dublin 14  
Israelo Esperanto Centro, P.O. Box 23 180, 91231 Jerusalem  
Italio Centra Oficejo de IKUE, via F. Berni 9, 00185 Roma  
CCF Centra Oficejo de IKUE, 23290000  
Nederlando Leen Nordijk, v. Hogendorplaan 4, 3135 CD Vlaardingen  
post giro, KELI, 5506132  
Svedujo Gustav Stenholm, Domprostgatan 18 B, 532 31 Skara  
poŝtirkonto, Kristlige Esperantoförbundet, 9 14 39-0  
Svislando Lina Neutemann, Iddastr. 34, 9008 St Gallen  
poŝta ĉekkonto, KELI viza sekcio (2 en), 80-52203-8, Zürich  
Usono Edwin C. Harler Jr, 47 Hardy Rd, Levittown Pa 19056
- aŭ al UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ  
Rotterdam, Nederlando, pere de la konto phco-m.  
(vidu en la jarlibro 1987, ĉe la paĝo 41)

Ni daŭre serĉas perantojn en aliaj landoj.

Vi kompreneble povas donace aboni iun alian, kiu cetere havus problemon nor sin aboni.

## ARTIKOLOJ

|  |    |
|--|----|
| David FEATHERSTONE : La Biblio - skriba komunikaĵo de Dio    | 3  |
| Doug PORTMANN : Jesuo - la modela komunikanto                | 7  |
| J.-F. TWILLEY : 1 Korintanoj 14:11                           | 15 |
| ZHAO Zhilian : La Vorto de Dio enkarniĝinta en homan lingvon | 21 |
| Jeremi GISHRON : La Sankta Lingvo kaj la internacia          | 25 |
| Philippe COUSSON : Kristanoj antaŭ lingva diverseco          | 41 |
| Olavi KANTELE : La lingvo de la katedraloj                   | 49 |
| Battista CADEI : Percepti la aŭskultantaron                  | 55 |
| Evaldo PAULI : Kiel komuniki filozofion                      | 59 |
| BESSENYEI Tibor : La poeta lingvo : bildoj, vortoj           | 65 |
| Giorgio SILFER : Lingvo kaj religio - analiza paralelismo    | 71 |

## RAPORTO

|  |    |
|--|----|
| Dan NICHOLAS, Humphrey TONKIN : Konferenco pri lingvo en religio | 75 |
|--|----|

## KONTRIBUAĴO

|   |    |
|---|----|
| Gerrit BERVELING : Ekzegezo : kiel kompreni ? | 81 |
|---|----|

## INTERVJUO

|                           |    |
|---------------------------|----|
| Raymond FUNG : Evangelizo | 85 |
|---------------------------|----|

prezo : 35 FRF